


EL *Popola*
ĈINIO

N.º 8

AŬGUSTO 1967





Plej plej varma celebros pri la 25-a datreveno de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ
Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an



**PAROLADOJ ĈE
LA LITERATURA
KAJ ARTA KUNSIDO
EN JAN-AN**

(Majo de 1942)

MAŬ ZEDONG

ENKONDUKO

La 2-an de majo, 1942)

Gekamaradoj! Vi estas invititaj hodiaŭ al la kunsido por interŝanĝi opiniojn kaj studi pri la rilato inter la laboroj literaturaj kaj artaj kaj la ĝeneralaj laboroj revoluciaj por ke la revoluciaj literaturo kaj arto disvolviĝu laŭ ĝusta vojo, kaj ke la revoluciaj literaturo kaj arto pli bone helpu al aliaj revoluciaj laboroj, tiel ke ni povu faliĝi nian nacian malamikon kaj plenumi la taskon de nacia liberiĝo.

En nia batalo por la liberiĝo de la ĉina popolo sin trovas diversaj frontoj, inter kiuj, oni povas diri, estas du frontoj de la plumo kaj de la pafilo, t. e. la kultura fronto kaj la milita fronto. Por venki la malamikon ni devas nin apogi, antaŭ ĉio, sur la armeo kun pafiloj en la mano. Sed nur tia armeo ne sufiĉas; ni devas havi ankaŭ kulturajn armeon, kiu estas ne mankigebla por unuigi nin mem kaj venki la malamikon. Depost la Majkvara Movado, tiu kultura armeo jam formiĝis en Ĉinio kaj helpis al la ĉina revolucio, reduktante iom post iom la terenon de la ĉinaj feŭda kulturo kaj kompradora kulturo servanta al la imperiisma agresado kaj iom post iom malfortigante ilian influon. Por kontraŭbatali la novan kulturon, la ĉinaj reakciuloj hodiaŭ povas sin helpi nur per la rimedo tiel nomata "per kvanto kontraŭ kvalito"; alivorte, ĉar la reakciuloj havas multege da mono, kvankam ili povas produkti nenion bonan, tamen ili povas tutforte multe eldoni. Sur la kultura fronto depost la Majkvara Movado, literaturo kaj arto estas grava kaj multatinga sektoro. Dum la dekjara enlanda milito, multe disvolviĝis la movado de revoluciaj literaturo kaj arto. Kvankam tiu movado kaj la tiama revolucia milito iris laŭ la sama ĝenerala direkto, tamen ili ne estis kunigitaj en la praktika laboro, ĉar la du frataj armeoj estis tiam apartigitaj de la reakciuloj unu de la alia. Estas tre bona afero, ke post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito ĉiam pli multe da revoluciaj literaturistoj kaj artistoj venis al Jan-an kaj aliaj kontraŭjapanaj baz-regionoj. Sed alveni al la baz-regionoj ankoraŭ ne signifas plenan kuniĝon kun la popolamaso de tiuj lokoj. Por antaŭenpuŝi la revolucion

laboron, ni devas plene kunigi ambaŭ unu kun la alia. Nia hodiaŭa kunsido celas ĝuste tion, ke literaturo kaj arto bone fariĝu konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, servu kiel potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpu la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuanime. Kiuj problemoj estas solvendaj por atingi tiun ĉi celon? Mi opinias, ke ili estas la problemoj de starpunkto, sintenado, objekto de laboro, laborado kaj lernado de la literaturaj kaj artaj laborantoj.

Starpunkto: Nia starpunkto estas tiu de la proletaro kaj la popolamaso. Por membroj de la Komunista Partio, tio ĉi signifas, ke ili tenu sin sur la starpunkto de la Partio, sur la starpunkto de la spirito kaj politiko de la Partio. Ĉu sin trovas iuj inter niaj literaturaj kaj artaj laborantoj, kiuj ankoraŭ ne havas ĝustan aŭ klaran komprenon pri tiu ĉi punkto? Mi pensas, ke jes. Multaj el niaj kamaradoj ofte devias de sia ĝusta starpunkto.

Sintenado: Sekve de nia starpunkto, estiĝas niaj konkretaj sintenoj al diversaj konkretaj aferoj. Ekzemple: Ĉu ni devas prikanti aŭ malkaŝi? Tio ĉi estas demando de sinteno. Kiun el la du sintenoj ni devas preni finfine? Mia respondo estas: Ambaŭ; tio dependas de tio, kiun ni pritraktas. Sin trovas tri specoj de homoj: la malamikoj, la aliancanoj en la unueca fronto kaj niaj propraj homoj, t. e. la popolamasoj kaj ilia avangardo. Al tiuj tri specoj de homoj devas esti tri malsamaj sintenoj. Koncerne al la malamikoj, la japanaj imperiistoj kaj ĉiuj aliaj malamikoj de la popolo, la tasko de la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj estas malkaŝi iliajn kruelecon kaj trompojn, elmontri la perspektivon de ilia neevitebla malvenko kaj kuraĝigi la kontraŭjapanajn armeon kaj popolon por ilin renversi firme decide, unukore kaj unuanime. Rilate al la diversaj aliancanoj en la unueca fronto nia sinteno devas esti unuflanke strebi por unuiĝo kaj aliflanke fari kritikojn, kaj devas esti diversaj specoj de unuiĝo kaj diversaj formoj de kritikoj. Ilian rezistadon kontraŭ Japanio ni aprobas; se ili atingas sukceson, ni ilin ankaŭ laŭdas. Sed ni devas ilin kritiki, se ili ne aktive rezistmilitas. Se iu oponas al la Komunista Partio kaj la popolo kaj surpaŝas iom post iom la



La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Hinhua-presejo, Pekino, laboras tage kaj nokte por rapidigi la presadon de la brila verko de Prezidanto Maŭ Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.

reakcian vojon, ni devas kontraŭbataladi senŝanceliĝe. Koncerne al la popolamasoj, iliaj laboro kaj lukto, ilia armeo kaj ilia partio, ni devas kompreneble ilin laŭdi. Ankaŭ la popolo havas siajn mankojn. Inter la proletoj ankoraŭ multaj konservas etburĝajn ideojn, dum la kamparanoj kaj la urbaj etburĝoj ambaŭ havas postiĝintajn ideojn; tio estas balasto por ili en ilia batalado. Ni devas eduki ilin longdaŭre kaj pacience, helpi ilin deŝarĝi sin de la balastaĵo kaj batali kontraŭ siaj propraj mankoj kaj eraroj por ke ili povu antaŭenmarŝi grandpaŝe. En sia batalado, ili jam sin remuldis aŭ estas sin remuldantaj, kaj niaj literaturo kaj arto devas priskribi la procezon de ilia remuldiĝo. Ni ne devas, nur vidinte apartan flankon, jam erare ilin mokridi aŭ eĉ sinteni malamike kontraŭ ili, se nur ili ne persistas en siaj eraroj. Niaj literaturaj kaj artaj produktaĵoj devas igi ilin unuiĝi, progresi, strebi antaŭen unukore kaj unuanime, forigi de si tion kio estas postiĝinta kaj disvolvi en si tion kio estas revolucia, kaj certe ne devas fari la malon.

Objekto de laboro: La demando ĉi tie estas, por kiuj estas produktataj niaj literaturaĵoj kaj artaĵoj. En la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono kaj la kontraŭjapanaj baz-regionoj en norda kaj centra Ĉinio, la problemoj estas diferenca de tiu en la regionoj sub la regado de Kuomintango kaj ankoraŭ pli diferenca de tiu en Ŝanhajo antaŭ la Rezistmilito. En la antaŭmilita Ŝanhajo, la objekto de verkoj de revoluciaj literaturo kaj arto konsistis ĉefe el parto de la studentoj, oficistoj kaj komizoj. En la regionoj sub la regado de Kuomintango la amplekso estis iom pligrandigita post la eksplodo de la Rezistmilito, sed la ĉefa objekto de verkoj restas ankoraŭ tiuj samaj, ĉar la tiea registaro malbligas al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kontakti al revoluciaj literaturo kaj arto. En niaj baz-regionoj, la situacio estas tute alia. La objekto de verkoj de literaturo kaj arto en la baz-regionoj konsistas el laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj revoluciaj kadroj. Ankaŭ en la baz-regionoj sin trovas studentoj, sed ankaŭ ili estas diferencaj de la malnovtipaj: ili estas

aŭ kadroj estintaj aŭ kadroj estontaj. Diversaj kadroj, batalantoj en la trupoj, laboristoj en la fabrikoj kaj kamparanoj en la vilaĝoj, kiuj scias legi, volas legi librojn kaj gazetojn, kiuj ne scipovas legi, volas almenaŭ ĝui teatraĵojn, rigardi bildojn, kanti kantojn kaj aŭskulti muzikon, kaj ĝuste ili formas la objekton de niaj literaturaj kaj artaj verkoj. Prenu la kadrojn kiel ekzemplon, vi ne pensu, ke ili estas malmultaj en nombro, ili multege superas en nombro la legantojn de unu libro eldonita en la regionoj sub la regado de Kuomintang. Tie unu eldono de unu libro nombras ordinare nur du mil ekzemplerojn kaj tri eldonoj sume nur ses mil, dum ĉi tie sole en Jan-an jam troviĝas pli ol dek mil kadroj, kiuj scipovas legi. Kaj krome, multaj el ili estas bone harditaj revoluciistoj, kiuj venis el diversaj partoj de la lando kaj iros labori en diversaj lokoj, sekve gravan signifon ja havas la edukado de tiuj ĉi homoj. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas bone labori por ili.

Ĉar la objekto de niaj literaturaj kaj artaj laboroj konsistas el laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj iliaj kadroj, do estiĝas la demando kiel ilin kompreni kaj bone koni. Por kompreni kaj bone koni ilin, por kompreni kaj bone koni ĉiujn specojn de homoj kaj ĉiujn specojn de aferoj en la partiaj organizoj kaj registaraj institucioj, en la vilaĝoj kaj fabrikoj kaj en la Oka-voja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo, oni devas multon fari. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas sin okupi pri siaj literaturaj kaj artaj laboroj, sed la unue fareda laboro por ili estas kompreni kaj bone koni la homojn. Kiel statis niaj literaturaj kaj artaj laborantoj en tiu ĉi rilato antaŭe? Mi dirus, ke antaŭe mankis al ili bona kono, kompreno kaj kampo por apliki sian heroan kapablon. Kion signifas manko de bona kono? Ili ne bone konis la homojn. La literaturaj kaj artaj laborantoj ne bone konis siajn priskribatojn nek objekton de siaj verkoj; aŭ eĉ trovis ilin tute fremdaj al si. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj ne bone konis la laboristojn, kamparanojn, soldatojn, kaj ankaŭ iliajn kadrojn. Kion signifas manko de kompreno? Ili ne komprenis la lingvon, t. e. mankis al ili sufiĉa scio pri la riĉa kaj viveca lingvo de la popolamasoj. Multaj literaturaj kaj artaj laborantoj, starante aparte de la popolamasoj,

vivis vivon malplenan kaj nature ne bone konis la lingvon de la popolo, kaj sekve la lingvo de iliaj verkoj estis ne nur sengusta, sed ankaŭ ofte miksitaj kun monstraj esprimoj arbitre fabrikitaj kaj kontraŭaj al la popola lingvouzo. Multaj kamaradoj amas paroli pri "popolamasa stilo", sed kion tio signifas? Tio signifas, ke la pensoj kaj sentoj de niaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas kunfandiĝi kun tiuj de la amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kaj por tion fari oni devas konsciencie lerni la lingvon de la amaso. Se oni eĉ ne komprenas multon el la lingvo de la amaso, kiel oni povas paroli pri literatura kaj arta kreado? Manko de kampo por apliki sian heroan kapablon aludas pri la fakto, ke viajn altajn ideojn ne akceptas kun ŝato la amaso. Ju pli vi pozas veteranon kaj "heroon", ju pli vi intencas altrudi tiujn ideojn, des malpli la amaso vin aŭskultos. Se vi volas esti komprenata de la amaso kaj kunfandiĝi kun ĝi, vi devas fari decidon trapasi longan kaj eĉ doloran procezon de remuldata. Ĉi tie mi menciis mian propran sperton en ŝanĝiĝo de la sentoj. Origine mi estis studento, akiris en lernejo studentajn kutimojn, kaj sentis eĉ nedigna plenumon de ia fizika laboro kia, ekzemple, vektoportado de miaj propraj pakajoj en ĉeesto de amaso da kunlernantoj, kiuj povis porti nek sur la ŝultro nek per la mano. Tiam ŝajnis al mi, ke en la mondo nur la intelektuloj estas puraj, dum la laboristoj kaj kamparanoj estas ĝenerale malpuraj en komparo. Mi povis surporti vestojn de aliaj intelektuloj, ĉar mi pensis, ke ili estas puraj; sed mi ne volis surporti vestojn de laboristoj kaj kamparanoj, ĉar mi pensis, ke ili estas malpuraj. La revolucio metis min en la vicojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la revolucia armeo, kaj iom post iom mi konis ilin, kaj ili ankaŭ iom post iom konis min. Tiam, kaj nur tiam, fundamente ŝanĝiĝis la burĝaj kaj etburĝaj sentoj, kiujn la burĝaj lernejoj instruis al mi. Tiam mi eksentis, ke la ne-remulditaj intelektuloj estas malpuraj kompare kun la laboristoj kaj kamparanoj, ke la plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ke ili estas pli puraj ol la burĝaj kaj etburĝaj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekajon. Tio ĉi estas nomata la ŝanĝiĝo de la sentoj, de

unu klaso al alia. Se niaj literaturaj kaj artaj laborantoj el intelektularo volas, ke iliaj verkoj estu varme akceptataj de la popolamasoj, ili devas ŝanĝi kaj remuldi siajn pensojn kaj sentojn. Sentuŝanĝo kaj sen tiu remuldo, ilipovos nenion bone fari kaj al nenia tasko bone sin adapti.

La lasta problemo estas tiu de lernado, mi volas diri, la studado de marksism-leninismo kaj de la socio. Tiu, kiu konsideras sin kiel marksisman revolucionan verkiston, precipe komunista verkisto, devas havi scion pri marksism-leninismo. Tamen, al iuj kamaradoj nun mankas fundamenta vidpunkto de marksismo. Ekzemple, unu el la fundamentaj marksismaj vidpunktoj estas, ke la ekzisto determinas la konscion, t. e. la objektiva realo de klasbatalo kaj nacia batalo determinas niajn pensojn kaj sentojn. Iuj kamaradoj tamen inversigis la propran ordon de la afero asertante, ke ĉio devas ekiri de “amo”. Nu, koncerne al amo, en klasa socio povas esti nur klasa amo; sed tiuj kamaradoj serĉas ian amon superklasan, amon

abstraktan, kaj liberon abstraktan, veron abstraktan, homecon abstraktan k.t.p. Tio montras, ke tiuj kamaradoj estas profunde influitaj de la burĝaro. Ili devas plene sin liberigi de tiu ĉi influo kaj lerni marksism-leninismen kun modesta sinteno. Estas prave, ke la literaturaj kaj artaj laborantoj devas lerni la verkadon de literaturaĵoj kaj artaĵoj, sed marksism-leninismo estas scienco lernenda por ĉiuj revoluciuloj ne escepte literaturajn kaj artajn laborantojn. Literaturaĵoj kaj artaĵoj devas studi la socion, t. e. ili devas studi la diversajn klasojn en la socio, studi iliajn interrilatojn kaj iliajn respektivajn statojn, studi iliajn trajtojn kaj psikon. Nur kiam ĉio ĉi tio estos klare komprenita, niaj literaturo kaj arto havos riĉan enhavon kaj ĝustan direkton.

Hodiaŭ mi nur elmetas ĉi tiujn problemojn kiel enkondukon kaj esperas, ke vi esprimos viajn opiniojn pri ili kaj pri aliaj koncernataj demandoj.

Sceno el la revolucia moderna pekina opero La Haveno



KONKLUDO

(La 23-an de majo, 1942)

Gekamaradoj! Trifoje ni kunsidis en tiu ĉi monato. Por trovi veron, ni faris varmegajn diskutojn en kiuj dekoj da kompartiaj kaj ne-kompartiaj kamaradoj parolis, la problemoj estas disvolvitaj kaj konkretigitaj. Mi pensas ke tio ĉi multe utilos al la tuta literatura kaj arta movado.

En diskutado, ni devas eliri ne el difinoj, sed el aktualaj faktoj. Ni faros eraron en metodo, se ni unue serĉos difinojn pri literaturo kaj arto en lernolibroj, kaj poste determinos laŭ ili la orientilon de la nuna literatura kaj arta movado kaj prijuĝos la nun sin prezentantajn opiniojn kaj interargumentadojn. Ni estas marksistoj kaj marksismo instruas, ke en traktado de problemoj ni devas eliri ne el abstraktaj difinoj sed el faktoj objekte ekzistantaj, kaj el la analizado de tiuj faktoj, trovi niajn orientilon, politikon kaj metodon. Ni devas fari same ankaŭ en nia nuna diskutado pri literaturaj kaj artaj laboroj.

Kio do estas la aktualaj faktoj? La faktoj estas: la Kontraŭjapana Rezistmilito kiun

Ĉinio jam kondukis dum kvin jaroj; la tutmonda kontraŭfaŝisma milito; la ŝanceliĝado de la ĉinaj grandaj bienuloj kaj grandaj burĝoj en la Rezistmilito kaj ilia politiko de senkompata subpremo al la popolo; la movado de revoluciaj literaturo kaj arto depost la kvara de majo, 1919 — ĝiaj grandaj kontribuoj faritaj al la revolucio dum la dudek tri jaroj kaj ĝiaj multaj mankoj; la kontraŭjapanaj demokratiaj baz-regionoj de la Oka-voja Armeo kaj Nova Kvara Armeo, kaj la kuniĝo de tieaj grandnombraj literaturaj kaj artaj laborantoj kun la armeoj kaj kun la laboristoj kaj kamparanoj; la diferenco inter la cirkonstancoj kaj taskoj de la literaturaj kaj artaj laborantoj en la baz-regionoj kaj tiuj en la regionoj sub la kuomintang-a regado; kaj la disputataj problemoj estiĝintaj en literaturaj kaj artaj laboroj en Jan-an kaj aliaj kontraŭ-japanaj baz-regionoj. Jen estas la neneigeblaj faktoj efektive ekzistantaj, surbaze de kiuj ni devas ekzameni niajn problemojn.

Kio do estas la kerno de la problemoj? Laŭ mia opinio, sin trovas fundamente du problemoj: labori por la popolo kaj kiel labori por ĝi. Se tiuj ĉi du problemoj estas ne solvitaj, aŭ ne ĝuste solvitaj, niaj literaturaj kaj

Sceno el la revolucia baleto Blankhara Knabino



artaj laborantoj ne povos adaptiĝi al siaj cirkonstancoj kaj siaj taskoj, kaj renkontos serion da problemoj de interne kaj ekstere. Mia konkludo koncentriĝos al tiuj ĉi du problemoj kaj tuŝos samtempe ankaŭ kelkajn aliajn problemojn rilatantajn kun ili.

I

La unua problemo estas: Por kiuj estas niaj literaturo kaj arto?

Fakte, tiu ĉi problemo estis solvita jam antaŭ longe de marksistoj, precipe de Lenin. Jam en la jaro 1905 Lenin montris emfaze, ke niaj literaturo kaj arto devas "servi al la milionoj kaj dekoj da milionoj da laborantaj popoloj"¹. Por niaj kamaradoj farantaj literaturajn kaj artajn laborojn en la kontraŭ-japanaj baz-regionoj, tio ŝajnus problemo jam solvita kaj ne plu bezonanta diskutadon. Sed fakte ne. Al multaj kamaradoj tiu ĉi problemo ja ankoraŭ ne estas klare solvita. Sekve en iliaj sentimentoj, iliaj verkoj, iliaj agoj kaj iliaj opinioj pri la gvidaj principoj de literaturo kaj arto neeviteble montriĝas pli aŭ malpli malkon-

formeco al la bezonoj de la amaso kaj de la aktualaj bataloj. Inter la grandaj nombroj da kulturaj laborantoj, literaturistoj, artistoj kaj ordinaraj literaturaj kaj artaj laborantoj kiuj partoprenas, kune kun la Komunista Partio kaj la Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj, en la granda batalo por liberiĝo, kompreneble povas troviĝi iuj karieristoj kiuj nur provizore restos kun ni, sed la plejmulto de ili laboras energie por la komuna afero. Dank' al tiuj kamaradoj, ni atingis tre multe en ĉiuj laboroj de literaturo, teatro, muziko kaj belarto. Multaj el tiuj literaturaj kaj artaj laborantoj komencis sian laboron post la eksplodo de la Rezistmilito; kaj multaj el ili komencis labori por la revolucio jam longe antaŭ la milito kaj travivis multajn malfacilojn kaj influis la vastajn popolamasojn per siaj agadoj kaj verkoj. Kial do mi diris, ke eĉ el tiuj kamaradoj iuj ankoraŭ ne trovis klaran solvon por la demando: Por kiuj estas literaturo kaj arto? Ĉu inter ili estas ankoraŭ iuj, kiuj opinias, ke revoluciaj literaturo kaj arto estas ne por la popolo sed por la ekspluatantoj kaj subpremantoj?

Estas vere, ke ekzistas literaturo kaj arto por la ekspluatantoj kaj subpremantoj. La literaturo kaj arto por la bienularo estas feŭdaj

Sceno el la revolucia moderna pekina opero Surprizatako kontraŭ la Blank-tigra Regimento



literaturo kaj arto. Tiaj estis la literaturo kaj arto de la reganta klaso de la feŭda epoko de Ĉinio. Eĉ hodiaŭ tiaj literaturo kaj arto ankoraŭ havas konsiderindan influon en Ĉinio. La literaturo kaj arto por la burĝaro estas burĝaj literaturo kaj arto. Homoj, kia Liang Ŝikiu², kiun Lusin kritikis, kvankam parolas pri literaturo kaj arto kiel io superklasa, tamen fakte ili estas por la burĝaj literaturo kaj arto kaj kontraŭ la proletaj. La literaturo kaj arto por la imperiistoj, kiel la verkoj de Ĝou Zuoĵen, Ĝang Ziping³ k. s., estas naciperfidaj literaturo kaj arto. Ĉe ni, literaturo kaj arto ne estas por la homoj supre menciitaj, sed por la popolo. Ni jam diris, ke la nova kulturo de Ĉinio en la nuna etapo estas kontraŭimperiisma, kontraŭfeŭdisma kulturo de la popolamaso, sub la gvido de la proletaro. Ĉio ajn vere apartenanta al la popolamaso nepre estas nun gvidata de la proletaro. Tio, kion gvidas la burĝaro, ne povas aparteni al la popolamaso. Nature, tiel same estas pri la nova literaturo kaj nova arto kiuj konsistigas parton de la nova kulturo. La riĉan heredaĵon kaj la bonan tradicion de la ĉinaj kaj fremdlandaj literaturo kaj arto de la pasinteco ni devas heredi, sed ankaŭ tio estas farata por la popolamaso. Ni ja ne rifuzas utiligi la literaturajn kaj artajn formojn de la pasinteco, sed kiam ili venas en niajn manojn kaj estas reformitaj kaj plenigitaj per nova enhavo, ankaŭ ili fariĝas io revolucia kaj servanta al la popolo.

Kio do estas la popolamaso? La plej vasta plimulto de la popolo, kiu konsistigas pli ol 90 procentojn de nia tuta loĝantaro, estas la laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj urbaj etburĝoj. Do niaj literaturo kaj arto estas unue por la laboristaro, la klaso kiu gvidas la revolucion. Due, ili estas por la kamparanaro, la plej multnombra kaj plej firma aliancano en la revolucio. Trie, ili estas por la armitaj laboristoj kaj kamparanoj, t. e. la Oka-voja Armeo, la Nova Kvara Armeo kaj aliaj armitaj trupoj de la popolo, kiuj estas la ĉefaj fortoj de la revolucia milito. Kvare, ili estas por la laborantaj amasoj de la urba etburĝaro kaj la etburĝaj intelektuloj, kiuj estas ankaŭ niaj aliancanoj en la revolucio kaj povas longdaŭre kunlabori kun ni. Tiuj ĉi kvar specoj de homoj formas la plej grandan parton de la ĉina nacio kaj estas la popolamaso plej vasta.

Niaj literaturo kaj arto devas esti por la supre diritaj kvar specoj de homoj. Por servi al tiuj kvar specoj de homoj, ni devas preni la starpunkton de la proletaro, kaj ne tiun de la etburĝaro. Hodiaŭ, verkistoj persistentaj ĉe sia individuisma etburĝa starpunkto ne povas vere servi al la amasoj de revoluciaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sed interesigas ĉefe pri la malmultnombraj etburĝaj intelektuloj. Jen estas la kaŭzo, kial nun iuj kamaradoj ne povas trovi ĝustan respondon al la demando: Por kiuj estas niaj literaturo kaj arto? Ĉi tie mi parolas ne pri ilia teorio. En teorio, aŭ alivorte en parolo, neniuj el niaj vicoj rigardas la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn malpli gravaj ol la etburĝaj intelektuloj. Ĉi tie mi parolas pri ilia praktiko, pri ilia agado. Ĉu en praktiko kaj agado ili rigardas la etburĝajn intelektulojn pli gravaj ol la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn? Mi pensas, ke jes. Multaj kamaradoj kompare pli atentis la studadon de la etburĝaj intelektuloj, analizas ilian psikon, substreke prezentas ilin, pardonas aŭ eĉ proparolas iliajn difektojn, anstataŭ gvidi ilin kune kun si alproksimiĝi al la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, partopreni ties aktualajn batalojn, prezenti kaj eduki la lastajn. Multaj kamaradoj, kiuj devenis de la etburĝa klaso kaj mem estas intelektuloj, serĉas amikojn nur en la vicoj de la intelektuloj, kaj koncentrigas sian atenton al studado kaj priskribado pri la intelektuloj. Tio estus prava, se iliaj studo kaj priskribo estus farataj el la proleta starpunkto. Sed ne estas tiel, aŭ ne tute estas tiel. Ili prenas la starpunkton de la etburĝaro kaj iliaj verkoj estas kreataj kiel ia memprezento de la etburĝaro, kian ni trovas en sufiĉe multaj el niaj literaturaj kaj artaj verkoj. Ili ofte montras grandan simpatian al la intelektuloj etburĝo-devenaj, simpatias aŭ eĉ laŭdas ankaŭ iliajn mankojn. Aliflanke, ili malofte kontaktiĝis kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, malmulte ilin komprenas aŭ pristudas, ne havas intimajn amikojn inter ili kaj ne scias bone priskribi ilin; kaj se ili priskribas ilin, la rezulto estas nur vesto de la laboranta popolo kaj fizionomio de etburĝaj intelektuloj. En iuj rilatoj ili amas ankaŭ la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, ili amas ankaŭ la kadrojn devenintajn el ili, sed kelkiam kaj kelkrilate ne amas ilin: ili ne amas iliajn sentojn, iliajn ma-



Propaganda grupo de la penso de Maŭ Zedong de la Popola Liberiga Armeo profundiĝas en la kamparon kaj propagandas la penson de Maŭ Zedong al la revoluciaj kamparanoj.

nierojn kaj iliajn literaturon kaj arton troviĝantajn ankoraŭ en burĝona stato, kiaj murgazetoj, murpentraĵoj, popolkantoj, popolrakontoj ktp. Kelkfoje ili ja ankaŭ amas ĉi tiujn aferojn, sed nur por ĉasi kuriozaĵon, por ornamis siajn verkojn aŭ eĉ por aprezi postrestintaĵojn en ili. Je aliaj fojoj ili publike ilin maleslimas kaj preferas aĵon de la etburĝaj intelektuloj aŭ eĉ de la burĝaro. La starpunkto de tiuj kamaradoj troviĝas ankoraŭ ĉe la flanko de la etburĝaj intelektuloj, aŭ, en pli eleganta esprimo, la profundo de ilia animo ankoraŭ estas regno de la etburĝa intelektularo. Tiel ne estas solvita, aŭ ne klare solvita por ili la demando: Por kiuj estas la literaturo kaj arto? Mi parolas ne nur pri la novvenintoj al Jan-an; eĉ por multaj el tiuj, kiuj iam iris al la fronto kaj laboris dum pluraj jaroj en niaj baz-regionoj, en la Oka-voja Armeo aŭ en la Nova Kvara Armeo, la problemo restas ankoraŭ ne plene solvita. Por plene solvi tiun ĉi problemon nepre necesas longa tempo, eble de ok aŭ dek jaroj. Sed, kiel ajn longa tempo estas bezonata, ni nepre devas ĝin solvi, ĝin solvi klare kaj plene. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj nepre devas plenumi tiun ĉi taskon; ili nepre devas ŝanĝi sian starpunkton, iom post iom transigi ĝin al la flanko de la laboristoj, kam-

paranoj kaj soldatoj, al la flanko de la proletaro, en la procezo de enprofundiĝo en la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, de enprofundiĝo en la aktualajn batalojn, kaj de studado de marksismo kaj la socio. Nur tiamaniere ni povos havi literaturon kaj arton vere por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vere proletajn.

La problemo por kiuj estas literaturo kaj arto estas problemo fundamenta, problemo de principo. En la pasinteco, la disputoj, diverĝoj, kontraŭstaroj kaj malunuiĝo inter iuj el niaj kamaradoj temis ne pri tiu ĉi fundamenta demando de principo, sed pri demandoj kompare duagradaj aŭ eĉ pri demandoj ne koncernantaj iun ajn principon. Pri tiu ĉi demando de principo, tamen, la disputantoj montris apenaŭ ian diverĝon, sed havis preskaŭ en plena konkordo iagradan tendencon maleslimi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj sin izoli de la amaso. Mi diras "iagradan", ĉar ĝenerale parolate, tiuj kamaradoj estas malsamaj ol Kuomintango en sia malestimo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj en sia izoliĝo de la popolamaso, sed malgraŭ tio, tia tendenco tamen ekzistas. Se tiu ĉi fundamenta demando ne estas solvita, estas malfacile solvi multajn aliajn demandojn. Ni

prenu por ekzemplo la demandon de sektismo en la literaturaj kaj artaj rondoj, kiu estas ankaŭ demando de principo. Sed la celo de forigo de sektismo estas atingebla ankaŭ nur per elmeto kaj strikta plenumo de la sloganoj "Servu al la laboristoj kaj kamparanoj!" "Servu al la Oka-voja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo!" kaj "Iru en la popolamason!", alie la problemo de sektismo estas tute ne solvebla. Lusin iam diris:

La necesa kondiĉo por la unueca fronto estas komuna celo. . . . La maleblo de unuiĝo de nia fronto montras, ke ni ne povas unuiĝi en nia celo, ke iuj laboras nur por sia malgranda grupo kaj aliaj laboras fakte eĉ nur por si mem. Se ni ĉiuj celas je servado al la amaso de laboristoj kaj kamparanoj, certe unuiĝos nia fronto!⁴

La sama problemo sin prezentis tiam en Ŝanhajo, prezentigas ankaŭ nun en Ĉongking. En tiuj lokoj estas malfacile solvi la problemon ĝisfunde, ĉar la regantoj tieaj subpremas la revoluciajn literaturistojn kaj artistojn kaj ne lasas ilin libere iri en la amason de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sed tie ĉi eĉ ni la situacio estas tute malsama. Ni kuraĝigas la revoluciajn literaturistojn kaj artistojn aktive intimiĝi kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj havigas al ili plenan liberon por iri inter la amason kaj plenan liberon por krei verajn revoluciajn literaturon kaj arton. Ĉe ni do la problemo estas proksimiĝanta al solviĝo. Sed esti proksimiĝanta al solviĝo ne signifas plenan kaj ĝisfundan solviĝon, kaj ĝuste por la plena kaj ĝisfunda solvo de la problemo ni devas, kiel ni jam diris, studi marksismon kaj la socion. Per marksismo ni aludas ne marksismon sur la lipoj, sed vivantan marksismon kiu efektive efikas sur la vivon kaj batalon de la amaso. Kiam marksismo surlipa estos transformita en marksismon en la reala vivo, ne plu estos sektismo. Kaj tiam solviĝos ne nur la problemo de sektismo sed ankaŭ multaj aliaj problemoj.

II

Solvinte la problemon, al kiuj servi, ni alvenas al la problemo, kiel servi. Per la

vortoj de niaj kamaradoj: Ĉu ni dediĉu nin al altigo aŭ al popularigo?

En la pasinteco, iuj kamaradoj konsiderinde aŭ eĉ treege malgravigis kaj neglektis popularigon kaj malkonvene tro emfazis altigon. Altigo devas esti emfazata, sed estas erare ĝin emfazi unuflanke kaj ekskluzive, kaj ĝis ekscesa grado. La fakto, ke ne estas klare solvita la problemo, al kiuj servi, montriĝas ankaŭ en ĉi tio. Kaj ĉar ne estas klare por ili al kiuj servi, ili ne havas ĝustan kriterion por la popularigo kaj altigo kiujn ili priparolas, kaj nature ili des pli ne povas trovi la ĝustan interrilaton inter la du aferoj. Ĉar niaj literaturo kaj arto estas ĉefe por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, do ankaŭ la priparolata popularigo devas esti popularigi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj la priparolata altigo devas esti altigi ekde la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kion ni devas popularigi al ili? Ĉu tion, kion la feŭda bienularo bezonas kaj povas facile akcepti? Ĉu tion, kion la burĝaro bezonas kaj povas facile akcepti? Ĉu tion, kion la etburĝaj intelektuloj bezonas kaj povas facile akcepti? Ne, nenio el ĉio ĉi tio taŭgas. Ni devas popularigi nur tion, kion la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj mem bezonas kaj povas facile akcepti. Tial antaŭ la tasko eduki la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn unue sin prezentas la tasko lerni de ili. Des pli tiel estas ĉe la problemo de altigo. Devas esti bazo por altigi de ĝi. Kiam ni levas, ekzemple, sitelon da akvo, ĉu ni ĝin levas ne de la tero sed meze de la aero? Kio do estas la bazo de kiu ni altigos niajn literaturon kaj arton? Ĉu de la bazo de la feŭda klaso? Ĉu de tiu de la burĝaro? Ĉu de tiu de la etburĝa intelektularo? De neniuj el ili, sed nur de la bazo de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kaj tio ĉi ne signifas altigi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn ĝis la "alteco" de la feŭda klaso, burĝaro aŭ etburĝa intelektularo, sed altigi ilin laŭ ilia propra direkto de antaŭenmarŝo, laŭ la direkto de antaŭenmarŝo de la proletaro. Kaj tie ĉi sin prezentas ankaŭ la tasko lerni de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Nur se ni prenas la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kiel nian ekirpunkton, ni povas havi ĝustan komprenon pri popularigo kaj altigo kaj trovi la ĝustan rilaton inter ili.

Kio estas finfine la fonto de ĉiaj literaturo kaj arto? Literaturaj kaj artaj verkoj, kiel ideologiaj formoj, estas produktaĵo de speguliĝo de certa socia vivo en la homa cerbo. La revoluciaj literaturo kaj arto estas produktaĵo de speguliĝo de la vivo de la popolo en la cerboj de revoluciaj literaturistoj kaj artistoj. En la vivo de la popolo ja sin trovas mino de krudaj materialoj por literaturo kaj arto, kiuj estas en sia natura stato, krudaj sed samtempe plej vivecaj, riĉaj kaj fundamentaj; en tiu ĉi senco, ili paligas ĉiajn literaturon kaj arton, kaj ili estas por la lastaj la sola kaj neelĉerpebla fonto. Tio estas la sola fonto, ĉar povas esti nur tia fonto kaj ne alia. Iuj demandas: Ĉu ne estas fonto ankaŭ la literaturaj kaj artaj verkoj en libroj, kaj tiuj de antikveco kaj eksterlando? Fakte, tiuj ĉi verkoj ne estas la fonto sed la fluo; ili estas produktaĵoj kiujn la antikvuloj kaj fremduloj kreis el la literaturaj kaj artaj krudmaterialoj akiritaj el la popola vivo de ilia tempo kaj ilia lando. Ni nepre devas heredi la bonajn literaturajn kaj artajn heredaĵojn, kritike asimili el ili ĉion utilan por ni kaj lerni iliajn ekzemplojn kiam ni kreas verkojn el la literaturaj kaj artaj krudmaterialoj el la vivo de la popolo en nia propra tempo kaj en nia

propra lando. Estas diferenco inter lerni kaj ne lerni tiujn ekzemplojn, ĉi tie estas diferenco inter kulturiteco kaj senkultureco, inter rafiniteco kaj krudeco, inter altkvaliteco kaj malaltkvaliteco, inter rapideco kaj malrapideco. Tial ni nepre ne devas rifuzi la heredaĵojn nek rifuzi lerni la ekzemplojn de la antikvuloj kaj fremduloj, eĉ se ili estas feŭdaj aŭ burĝaj. Sed preni heredon kaj lerni de ekzemplo ja neniam devas anstataŭi nian propran kreadon, ĉar nenio povas tion anstataŭi. Tute senkritikaj transprenado kaj imitado de antikvuloj kaj fremduloj en literaturo kaj arto estas la plej sentaŭgaj kaj malutilaj literatura dogmismo kaj arta dogmismo. Ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj, ĉiuj multpromesaj literaturistoj kaj artistoj en Ĉinio nepre devas iri en la mezon de la popolamaso, nepre devas iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn, en la solan, plej vastan kaj plej riĉan fonton por observi, trasperti, studi kaj analizi ĉiajn personojn, ĉiajn klasojn kaj ĉiajn amasojn, ĉiajn vivecajn formojn de vivo kaj batalo kaj ĉiajn krudajn materialojn de literaturo kaj arto, antaŭ ol ili havos la eblecon komenci kreadi. Alie, ili ne havos objekton por sia laboro kaj

Parto el la argila skulptaĵo Farnpaga Kolektejo: "Deprenu la pafilon el la man' de bienulo. Koncentru la malamon en pafila aperturo. Tenante alte la standardon de l'revolucio, por ĉiam sekvos ni la Kompartion de Ĉinio."



fariĝos tiaj nur laŭnomaj literaturistoj aŭ nur laŭnomaj artistoj, kia Lusin insiste admonis sian filon en la testamento nepre ne fariĝi.⁵

Kvankam la socia vivo de la homo estas la sola fonto de literaturo kaj arto kaj nekompareble pli riĉa kaj pli viveca enhave ol la lastaj, tamen la popolo ne kontentiĝas pri la unua kaj postulas la lastajn. Kial? Ĉar, kvankam ambaŭ estas belaj, la vivo spegulita en literaturaj kaj artaj verkoj, kompare kun la ordinara reala vivo, povas kaj devas esti pli alta, pli intensa, pli koncentrita, pli tipa, pli ideala kaj sekve kun pli da universaleco. Revoluciaj literaturo kaj arto devas krei diversajn karakterojn laŭ la reala vivo kaj helpi la popolon antaŭenpuŝi la historion. Ekzemple, unuflanke estas suferado de malsato, malvarmo kaj subpremo, dum aliflanke estas ekspluatado kaj subpremado de homo al homo; kaj tiu ĉi fakto ekzistas ĉie, kaj tion oni rigardas kiel ĉiutagan kutimaĵon; literaturistoj kaj artistoj koncentrigas tiajn ĉiutagajn fenomenojn, tipigas la kontraŭdirojn kaj batalojn interne de ili kaj produktas literaturajn kaj artajn verkojn, kiuj vekas kaj entuziasmigas la popolamasojn kaj ilin puŝas al unuiĝo kaj batalado por reformi sian ĉirkaŭaĵon. Sen tiaj literaturo kaj arto tiu ĉi tasko ne povus plenumiĝi aŭ almenaŭ ne povus tiel efike kaj rapide plenumiĝi.

Kio estas popularigo kaj altigo en literaturaj kaj artaj laboroj? Kia estas la rilato inter la du taskoj? Popularaj verkoj, kiuj estas kompare pli simplaj kaj facile kompreneblaj, estas pli facile tuj akceptataj de la hodiaŭaj vastaj popolamasoj. Verkoj de alta artnivelo postulas pli subtilan prilaboradon kaj sekve estas pli malfacileprodukteblaj kaj ankaŭ ofte pli malfacile disvastigataj tuj inter la vastaj popolamasoj hodiaŭaj. La problemoj antaŭ la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj hodiaŭ estas: Ili estas en kruela kaj sanga batalo kontraŭ la malamiko, ili estas analfabetaj kaj senkulturaj rezulte de la longdaŭra regado de la feŭda kaj burĝa klasoj, kaj sekve ili urĝe bezonas vastan kampanjon por klereco; ili urĝe postulas klerecon kaj literaturajn kaj artajn verkojn tuj bezonatajn kaj facile akcepteblajn, por altigisian batalvolon kaj fidon al venko, plifortigisian unuiĝon kaj tiel ebligi al si batali unukore kaj unuanime kontraŭ la malamiko. Por ili

estas bezonata unuapaŝe ne “aldono de floro sur brokato” sed “alsendo de karbo dum neĝado”. Sub la nunaj kondiĉoj, popularigo estas do la pli urĝa tasko. La sinteno malgravigi kaj neglekti la laboron de popularigo estas erara.

Tamen popularigo kaj altigo estas ne tute apartigeblaj. Ne nur estas eble jam nun popularigi iujn el la eminentaj verkoj, sed ankaŭ la kultura nivelo de la vastaj popolamasoj estas daŭre altiĝanta. Se la laboro de popularigo ĉiam restas sur la sama nivelo liverante monaton post monato kaj jaron post jaro la saman provizaĵon, la saman “Paŝtisteto”,⁶ la saman legaĵon “homo, mano, buŝo, tranĉilo, bovo, ŝafo”,⁷ ĉu la instruanto kaj la instruato ne restos sur la sama nivelo? Kian signifon havas tia laboro populariga? La popolo postulas popularigon kaj, tuj sekve, ankaŭ altigon, altigon de jaro al jaro kaj de monato al monato. Tie ĉi la popularigo estas popularigo por la popolo kaj la altigo estas altigo por la popolo. Kaj tia altigo ne okazas en la aero aŭ post fermita pordo, sed surbaze de popularigo. Tia altigo estas kondiĉita de la popularigo kaj samtempe ĝi direktas la popularigon. En Ĉinio, la revolucio kaj la revolucia kulturo disvolviĝas ne ekvilibre kaj disvastiĝas nur iom post iom. Kiam en unu loko jam efektiviĝis popularigo kaj ankaŭ altigo sur la bazo de popularigo, en alia loko eble eĉ popularigo ankoraŭ ne komenciĝis. Tial la bona sperto akirita en popularigo kondukanta al altigo en unu loko povas esti aplikata kaj servi kiel gvidilo en alia loko por la laboroj de popularigo kaj altigo por eviti ripetadon de la samaj provoj kaj eraroj. Internacie, ankaŭ la utilaj spertoj alilandaj, precipe tiuj de Sovetunio, povas servi kiel nia gvidilo. Sekve nia altigo estas tiu sur bazo de popularigo kaj nia popularigo estas tiu sub la gvido de altigo. Kaj ĝuste pro tio, la popularigaj laboroj, pri kiuj ni parolas, ne nur ne malhelpas la altigon, sed kontraŭe donas bazon al la nunaj limigitaj laboroj de altigo, kaj samtempe pretigas necesajn kondiĉojn por la multe pli grandskala laboro de altigo en estonteco.

Krom la altigo rekte bezonata de la amaso, estas ankaŭ tiu de ĝi bezonata nerekte, t. e. la altigo bezonata de la kadroj. La kadroj,



Lasu la penson de Maŭ Zedong okupi ĉiujn poziciojn de literaturo kaj arto!

kiuj estas la antaŭirantoj inter la amaso, estas ĝenerale pli multe edukitaj, kaj literaturo kaj arto de pli alta nivelo estas tute necesaj por ili; estas erare tion ignori. Kio estas por la kadroj, estas ankaŭ tute por la amaso, ĉar la amaso povas esti edukata kaj gvidata nur pere de la kadroj. Se ni devias de tiu ĉi celo, se tio kion ni donas al la kadroj ne povas ilin helpi en edukado kaj gvidado al la amaso, do nia laboro de altigo estas pafo farita sen celo, estas deviinta de la fundamenta principo de servo al la popolamaso.

Resume, la krudaj literaturaj kaj artaj materialoj el la vivo de la popolo post la krea laboro de la revoluciaj verkistoj kaj artistoj turniĝas en ideologian formon de literaturo kaj arto por la popolamaso. Sin trovas en tio unuflanke la altgradaj literaturo kaj arto, kiuj estas disvolviĝintaj surbaze de la elementaj kaj bezonataj de la pli progresinta parto de la amaso aŭ unue bezonataj de la kadroj, kaj aliflanke la elementaj literaturo kaj arto kiuj estas produktitaj sub la gvido de la pli altaj kaj

ofte plej unue bezonataj de la plej vastaj amasoj hodiaŭaj. Ĉu altgradaj ĉu elementaj, niaj literaturo kaj arto estas por la popolamaso, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por ili kaj utiligataj de ili.

Se ni jam solvis la problemon de rilato inter popularigo kaj altigo, do kun tio povas esti solvita ankaŭ la problemo de rilato inter specialistoj kaj popularigantoj. Niaj specialistoj estas ne nur por la kadroj, sed ankaŭ — kaj ĉefe — por la amaso. Niaj literaturaj specialistoj devas atenti pri la murgazetoj de la amaso kaj pri la raportaj-verkoj en la armeo kaj la vilaĝoj. Niaj dramaj specialistoj devas atenti pri la malgrandaj teatraj trupoj en la armeo kaj la vilaĝoj. Niaj muzikaj specialistoj devas atenti pri la kantoj de la amaso. Niaj belartaj specialistoj devas atenti pri la belarto de la amaso. Ĉiuj ĉi tiuj kamaradoj devas intime rilati kun la kamaradoj kiuj laboras por popularigi literaturon kaj arton inter la amaso, unuflanke ilin helpi kaj gvidi, kaj aliflanke lerni de ili kaj pere de ili sorbi nutraĵon el la amaso

por sin pleniĝi kaj riĉiĝi, ke ilia specialeco ne fariĝu malplena kaj senviva kastelo aera senrilatigita de la amaso kaj realo. Ni devas respekti la specialistojn, ĉar ili estas tre valoraj por nia afero. Sed ni ankaŭ devas ilin atentigi, ke la laboro de ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj havas signifon nur se ili intime rilatiĝas kun la amaso, esprimas ĝin kaj agas kiel ĝia fidela proparolanto. Nur tiuj kiuj reprezentas la amason povas eduki la amason, kaj nur tiuj kiuj lernas de la amaso kiel lernantoj povas fariĝi instruantoj de la amaso. Se ili sin rigardas kiel mastron de la amaso, aŭ aristokraton sinjorantan super la "plebanoj", tiam kiel ajn granda estu ilia talento, la popolamaso ne bezonas ilin kaj ilia laboro ne havos estontecon.

Ĉu tiu ĉi sinteno nia estas utilisma? La materiistoj ne oponas al utilismo ĝenerale, sed oponas al la utilismo de la feŭda, burĝa kaj etburĝa klasoj kaj al la hipokrituloj kiuj oponas al utilismo per vortoj sed ĉirkaŭprenas la plej egoisman kaj plej miopan utilismon en agoj.

En la mondo ne ekzistas ajna superutilismo, kaj en klasa socio sin trovas nur utilismo aŭ de tiu aŭ de tiu ĉi klaso. Ni estas proletaj, revoluciaj utilistoj kaj ni prenas kiel ekirpunkton la unuiĝon de la nuntempaj kaj estontaj interesoj de la plej vasta amaso, kiu formas pli ol 90 procentojn de la tuta loĝantaro de la lando; tial ni estas revoluciaj utilistoj kun celo plej vasta kaj plej fora, kaj ne mallarĝaj utilistoj kiuj povas vidi nur la partan kaj la tujan. Ekzemple, se iu, por la utilo de si mem aŭ de sia malvasta kliko, obstine insistas enmerkatiĝi kaj propagandi inter la amaso verkon preferatan de nur malmultaj homoj sed nebezonatan de aŭ eĉ malutilan al la plejmulto de la popolo, kaj tamen riproĉas la amason pri ĝia utilismo, tiu ne nur insultas la amason, sed ankaŭ montras sin tro blinda por koni sin mem. Ĉio ajn estas bona nur se ĝi povas alporti veran bonon al la popolo. Eĉ se via verko estus *La Printempa Neĝo*,⁸ ĉar ĝi estas ĝuebla portempe nur de malmultaj homoj kaj tio kion la

Bildo pri la eldiraĵo de Prezidanto Maŭ: "Ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj, ĉiuj multpromesaj literaturistoj kaj artistoj en Ĉinio nepre devas iri en la mezon de la popolamaso, nepre devas iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn. . . ."



amaso kantas, estas ankoraŭ *La Kanto de la Kampuloj*,⁸ do se vi ne klopodas altigi la amason sed okupas vin nur pri riproĉado, viaj riproĉoj montriĝos tute vanaj. La problemoj nun estas unuigo de *La Printempa Neĝo* kun *La Kanto de la Kampuloj*, unuigo de altigo kun popularigo. Sen tiu unuigo, la plej alta artaĵo de iu ajn specialisto fariĝos neeviteble la plej mallarĝa utilismo; se iu volas nomi tion ĉi ankaŭ arto pura kaj nobla, tio estas nur memflato, sed la amaso tion ne sankcios.

Kiam solviĝis la problemoj pri la fundamenta principo servi kaj kiel servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, solviĝis ankaŭ aliaj problemoj kiel ekzemple tiu de priskribo de la luma aŭ malluma flanko de la vivo, tiu de unuigo k. a. Se ni ĉiuj konsentas pri tiu ĉi fundamenta principo, do niaj literaturaj kaj artaj laborantoj, niaj lernejoj de literaturo kaj arto, niaj literaturaj kaj artaj gazetoj kaj organizoj, kaj ĉiuj niaj literaturaj kaj artaj agadoj devas sekvi tiun ĉi principon. Devio de tiu ĉi principo estas erara, kaj kio ajn ne konforma al ĝi devas esti konvene ĝustigata.

III

Ĉar niaj literaturo kaj arto estas por la popolo-amaso, do ni povas antaŭeniri por diskuti pri la problemoj de enpartia rilato, la rilato inter la literatura kaj arta laboro de la Partio kaj la tuta laboro de la Partio, kaj pri la problemoj de la ekstera rilato de la Partio, la rilato inter la partia literatura kaj arta laboro kaj la ne-partia — la problemoj de la unueca fronto de literaturaj kaj artaj rondoj.

Ni komencu de la unua problemoj. En la hodiaŭa mondo, ĉiu kulturo, ĉiu literaturo aŭ arto apartenas al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion. Fakte ne ekzistas tiaj aferoj kiaj arto por arto, arto staranta super klasoj kaj arto paralela kun aŭ sendependa de politiko. La proletaj literaturo kaj arto estas parto de la tuta afero de la proleta revolucio, aŭ laŭ la vortoj de Lenin, “radeto kaj ŝraŭbeto”⁹ en la tuta revolucia maŝino. Do la loko de la literatura kaj arta laboro de la Partio en ĝia tuta revolucia laboro estas difinita kaj asignita; ĝi estas subordigita al la difinita revolucia tasko de la Partio en certa revolucia periodo. Ĉia

ajn opozicio al tiu ĉi asigno certe kondukos al dualismo aŭ pluralismo, kaj esence egalas al la formulo de Trockij: “politiko — marksisma; arto — burĝa”. Ni ne konsentas tro emfazi la gravecon de literaturo kaj arto ĝis grado de malĝusteco, nek subtaksi ilian gravecon. Literaturo kaj arto subordiĝas al politiko, sed returne ili ankaŭ donas grandan influon al politiko. Revoluciaj literaturo kaj arto estas parto de la tuta afero revolucia, ili estas radeto kaj ŝraŭbeto de la tuta maŝino. Kvankam ili estas malpli gravaj, malpli urĝe bezonataj kaj duagrada kompare kun aliaj pli gravaj partoj, tamen ili estas nemankigebla radeto kaj ŝraŭbeto por la tuta maŝino, nemankigebla parto de la tuta revolucia afero. Se ni ne havus literaturon kaj arton eĉ en la plej vasta kaj plej ĝenerala senco, tiam la revolucia movado ne povus antaŭeniri kaj ne povus venki. Estas erare ne koni tion. Krome, kiam ni diras, ke literaturo kaj arto subordiĝas al politiko, tio signifas klasan politikon kaj amasan politikon, ne la t. n. politikon de malmultaj politikistoj. Politiko, ĉu revolucia aŭ kontraŭrevolucia, estas la batalado de klaso kontraŭ klaso, ne la agado de malmultaj individuoj. Revoluciaj bataloj sur la ideologia kaj arta frontoj devas subordiĝi al la politika batalo, ĉar nur pere de politiko, la bezonoj de la klaso kaj la amaso povas esti esprimitaj en koncentrita formo. La revoluciaj politikistoj, la politikaj specialistoj kiuj konas la sciencojn kaj arton de revolucia politiko estas nur gvidantoj de la miloj kaj dek miloj da amasaj politikistoj, kaj ilia tasko estas kolekti la opiniojn de la lastaj kaj post prudenta kribrado kaj resumado ilin redoni al la amaso por ke ĝi ilin akceptu kaj praktiku; ili ne estas tiaj tiel nomataj “politikistoj” aristokrataj kiuj “faras ĉaron post fermita pordo”, konsiderante sin saĝa kaj unika en la mondo sen egalo. Tio ĉi estas la principa diferenco inter la politikistoj de la proletaro kaj tiuj de la putrinta burĝaro. Ĝuste pro tio niaj literaturo kaj arto povas atingi perfektan unuecon inter siaj politika karaktero kaj vereco. Estas erare ne koni tiun ĉi punkton kaj vulgariĝi la politikon kaj politikistojn de la proletaro.

Nun ni parolu pri la problemoj de la unueca fronto de literaturaj kaj artaj rondoj. Ĉar literaturo kaj arto subordiĝas al politiko, kaj hodiaŭ la unua fundamenta problemoj de

politiko en Ĉinio estas rezisti al Japanio, tial la literaturaj kaj artaj laborantoj de la Partio devas antaŭ ĉio unuiĝi sur la punkto de rezistado al Japanio kun ĉiuj eksterpartiaj literaturistoj kaj artistoj (de la simpatiantoj de la Partio kaj etburĝaj literaturistoj kaj artistoj ĝis burĝaj kaj bienulklasaj literaturistoj kaj artistoj kiuj estas por la rezistado al Japanio). Kaj due, ni devas unuiĝi sur la punkto de demokratio; sed ĉar iuj literaturistoj kaj artistoj kontraŭ-japanaj tion ĉi ne aprobas, do la amplekso de unuiĝo estos neeviteble iom malpli vasta. Kaj trie, ni devas unuiĝi je la problemo speciala por la literaturaj kaj artaj rondoj — sur la punkto de la metodo kaj stilo de arto; sed ĉar ni estas por socialisma realismo, kiun denove iuj ne aprobas, do la amplekso de unuiĝo estos ankoraŭ pli malvasta. Do unuiĝo povas esti atingita en unu demando, dum batalo kaj kritiko havas lokon en alia demando. Ĉiuj problemoj estas memstaraj kaj samtempe interrilataj, tial eĉ en la problemo formanta la bazon de unuiĝo, kia la problemo de rezistado kontraŭ Japanio, estas samtempe ankaŭ batalo kaj kritiko. En unueca fronto, sole unuiĝo sen batalo aŭ sole batalo sen unuiĝo, kiaj la dekstra kapitulacismo kaj vostismo aŭ “maldekstra” ekskluzivismo kaj sektismo praktikaj de iuj kamaradoj en la pasinteco, estas eraraj politikoj. Tiel same estas en arto kiel en politiko.

En Ĉinio la etburĝaj literaturistoj kaj artistoj estas grava forto en la unueca fronto de literaturo kaj arto. Multajn difektojn ili havas en siaj ideologio kaj verkoj, tamen ili kompare pli inklinas al la revolucio kaj pli intime rilatiĝas kun la laboranta popolo. Tial helpi ilin forigi la difektojn kaj gajni ilin al la fronto kiu servas al la laboranta popolo estas aparte grava tasko.

IV

Unu el la ĉefaj metodoj de batalo en la literatura kaj arta sferoj estas literatura kaj arta kritikado. La literatura kaj arta kritikado devas esti disvolvata kaj, kiel multaj kamaradoj prave montris, nia laboro en tiu ĉi flanko estis ege malsufiĉa. La literatura kaj arta kritikado estas problemo kompleksa kaj postulas multan

specialan pristudon. Ĉi tie mi parolos ĉefe pri la fundamenta problemo de kriterio en kritikado. Krome, mi iom parolos ankaŭ kion mi opinias pri kelkaj unuopaj problemoj kaj malĝustaj ideoj elmetitaj de iuj kamaradoj.

Estas du kriterioj en literatura kaj arta kritikado, unu politika kaj alia arta. Laŭ la politika kriterio, bonaj estas ĉiuj verkoj kiuj utilas al unuiĝo kaj rezistado kontraŭ Japanio, kiuj kuraĝigas la popolon agi unukore kaj unuanime kaj kiuj oponas malprogreson kaj akcelas progreson; kaj malbonaj estas ĉiuj verkoj kiuj malutilas al unuiĝo kaj rezistado kontraŭ Japanio, kiuj dissemas malkonkordon kaj malharmonion inter la amaso, kaj kiuj oponas al progreso kaj trenas homojn retroe. Laŭ kio ni distingu la bonan de la malbona, ĉu laŭ la motivo (subjektiva intenco) aŭ laŭ la efiko (socia praktiko)? Ideistoj emfazas motivon kaj ignoras efikon, dum mekanikaj materiistoj emfazas efikon kaj ignoras motivon; kontraŭe al ambaŭ, ni dialektikaj materiistoj insistas pri la unuigo de motivo kaj efiko. La motivo servi al la popolamaso estas neapartigebla de la efiko gajni ĝian aprobon, kaj ili devas esti unuigitaj. La motivo servi al individuo aŭ malgranda kliko estas ne bona, kaj ankaŭ estas ne bona nura motivo servi al la popolamaso sen efiko gajni ĝian aprobon kaj utili al ĝi. En ekzamenado pri la subjektiva intenco de verkisto, t. e., ĉu lia motivo estas ĝusta kaj bona, ni ne juĝas laŭ liaj deklaroj sed laŭ la efiko de lia agado (ĉefe liaj verkoj) al la socio kaj la popolamaso. Socia praktiko kaj ĝia efiko estas la kriterio por ekzameni la subjektivan intencon aŭ la motivon. Ni ne toleras sektismon en nia kritikado de literaturo kaj arto kaj, sub la ĝenerala principo de unuiĝo por rezisto al Japanio, ni devas permesi la ekziston de ĉiuj literaturaj kaj artaj verkoj kun ĉia ajn politika sinteno. Sed samtempe ni devas persisti ĉe nia principo kaj starpunkto en nia kritikado kaj devas severe kritiki kaj refuti ĉiujn literaturajn kaj artajn verkojn entenantajn kontraŭnaciajn, kontraŭsciencajn, kontraŭpopolamasajn kaj kontraŭkomunismajn vidpunktojn, ĉar tiaj verkoj, ĉu laŭ motivo ĉu laŭ efiko, estas subfosaj al la unuiĝo kaj rezistado kontraŭ Japanio. Laŭ la arta kriterio, bonaj aŭ kompare bonaj estas ĉiuj verkoj de pli alta artkvalito, kaj malbonaj aŭ kompare malbonaj estas ĉiuj de pli malalta

artkvalito. Kompreneble, ankaŭ tiu ĉi distingo dependas de socia efiko. Apenaŭ sin trovas artisto, kiu ne konsideras sian verkon bela, kaj nia kritiko devas permesi la liberan konkuron de diversaj artaj verkoj; tamen estas tute necese, ke la verkoj estu ĝuste taksataj laŭ arta kriterio por ke iom post iom arto de pli malalta nivelo leviĝu al pli alta nivelo, kaj arto, kiu ne respondas al la bezono de la batalo de la vastaj popolamasoj transformiĝu en arton kiu respondas al ilia bezono.

Estas kaj kriterio politika kaj kriterio arta, kiel do ili rilatiĝas? Politiko ne egalas al arto, nek ĝenerala mondkoncepto al la metodo de arta kreado kaj kritikado. Ni neas ne nur la ekziston de abstrakta kaj absolute neŝanĝebla kriterio politika sed ankaŭ la ekziston de abstrakta kaj absolute neŝanĝebla kriterio arta, ĉar ĉiu klaso en klasa socio havas siajn proprajn politikan kaj artan kriteriojn. Sed ĉiu ajn klaso en ĉiu ajn klasa socio ĉiam metas la politikan kriterion sur la unuan lokon kaj la artan sur la duan. La burĝaro ĉiam forpuŝas proletajn literaturajn kaj artajn verkojn, kiel ajn alta estu ilia arta atingo. Pri la literaturaj kaj artaj verkoj de la pasinteco la proletaro devas ankaŭ unue kontroli, kiel ili sintenis al la popolo kaj ĉu ili estis progresaj en la historio, kaj laŭ tio preni malsamajn sintenojn. Iuj verkoj, kiuj estas tute reakciaj politike, povas tamen havi ian artan kvaliton. Sed verkoj ju pli enhave reakciaj kaj kun ju pli da arta kvalito, estas des pli venenaj por la popolo kaj ankaŭ des pli forpuŝendaj. La kontraŭdiro inter la reakcia politika enhavo kaj la arta formo estas komuna karakterizaĵo de la literaturo kaj arto de ĉiuj ekspluatantaj klasoj dum la tempo de ilia kadukiĝo. Kaj nia postulo estas unuiĝo de politiko kaj arto, unuiĝo de enhavo kaj formo, unuiĝo de revolucia politika enhavo kaj laŭeble plej perfekta arta formo. Artaĵo sen arta kvalito estas senforta, kiel ajn progresema ĝi estas politike. Tial ni oponas kaj al artaj verkoj kun erara politika vidpunkto kaj al la tendenco de t. n. “afiŝa kaj slogana stilo” nur kun ĝusta politika vidpunkto sed sen arta forto. Ni devas konduki batalon sur du frontoj en la problemo de literaturo kaj arto.

Tiuj du tendencoj ekzistas en la penso de multaj el niaj kamaradoj. Multaj kamaradoj

tendencas neglekti artecon, tial ili devas atenti pri ĝia altigo. Tamen nun la pli urĝa problemo, laŭ mia opinio, estas tiu en la politika flanko. Al iuj kamaradoj mankas elementaj scioj politikaj, kaj sekve estiĝis ĉe ili diversaj konfuzaj ideoj. Mi donu kelkajn ekzemplojn trovitajn en Jan-an.

“La teorio de homeco”. Ĉu ekzistas tia afero kia homeco? Certe ĝi ekzistas. Sed ekzistas nur konkreta homeco kaj ne abstrakta homeco. En klasa socio, estas nur homeco karakterizata de klaseco, sed nenia homeco superklasa. Ni pledas por la homeco de la proletaro, de la popolamaso, dum la bienularo kaj burĝaro pledas por la homeco de la bienularo kaj burĝaro, kvankam ili tion ne konfesas, sed nomas ĝin la homeco ununura. Ankaŭ la homeco trumpetata de iuj etburĝaj intelektuloj estas disigita de aŭ oponenta kontraŭ la popolamaso; tio, kion ili nomas homeco, estas esence nenio alia ol burĝa individuismo, kaj pro tio en iliaj okuloj proleta homeco estas kontraŭa al homeco. Tia estas la “teorio de homeco”, por kiu pledas iuj en Jan-an kiel la t. n. fundamento de teorio de literaturo kaj arto. Tio estas tute erara.

“La fundamenta ekirpunkto de literaturo kaj arto estas amo, la amo de homaro.” Nu, amo povas esti ekirpunkto, sed sin trovas ankoraŭ fundamenta ekirpunkto. Amo estas koncepto, produktaĵo de objektiva praktikado. Fundamente, ni eliras ne el koncepto, sed el objektiva praktikado. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj devenintaj el la intelektularo, amas la proletaron, — tio estas sekvo de la fakto, ke la socio igis ilin eksenti ke ili havas komunan sorton kun la proletaro. Ni malamas la japanan imperiismon, — tio estas sekvo de la fakto, ke la japana imperiismo subpremas nin. En la mondo tute ne ekzistas senkaŭza amo nek senkaŭza malamo. Koncerne al la t. n. “amo de homaro”, neniam ekzistis tia unueca amo depost la dividiĝo de la homaro en klasojn. Ĉiuj regantaj klasoj en la pasinteco ŝatis pledi por tia amo, kaj ankaŭ multaj el la t. n. saĝuloj kaj virtuloj ŝatis pledi por ĝi, sed neniuj ĝin praktikis efektive, ĉar ĝi estas ne praktikebla en klasa socio. Vera homaramo certe estiĝos, tamen nur post la elimino de la klasoj tra la tuta mondo. Estas la klasoj, kiuj kaŭzis la

dividiĝon de la socio en multajn antagonismajn sektorojn, kaj amo de la tuta homaro povas estiĝi nur post la elimino de la klasoj, sed nun ankoraŭ ne. Ni ne povas ami niajn malamikojn, ni ne povas ami la sociajn malbonojn, kaj nia celo estas ilin elimini. Tio estas komuna scio, ĉu ĝin ne komprenas niaj literaturaj kaj artaj laborantoj?

“Literaturo kaj arto ĉiam priskribas egale la lumon kaj la mallumon, duono kontraŭ duono.” Tiu ĉi aserto entenas multajn konfuzajn ideojn. Literaturaj kaj artaj verkoj ja ne estas ĉiam tiaj. Multaj etburĝaj verkistoj neniam trovis la lumon kaj ili dediĉis siajn verkojn nur por malkaŝi la mallumon, kiuj estas nomataj la “literaturo de malkaŝado”; kelkaj eĉ sin dediĉis ekskluzive al predikado pri pesimismo kaj mizantropismo. Male, la sovetia literaturo dum la periodo de socialisma konstruado ĉefe priskribas la lumon. Oni priskribas ankaŭ difektojn en laboroj kaj malbonajn personojn, sed tio servas nur kiel kontrasto por reliefi la lumon de la tuto, kaj ne estas “duono kontraŭ duono”. Burĝaj literaturistoj kaj artistoj dum reakcia periodo priskribas la revoluciajn amasojn kiel banditojn kaj la burĝojn mem kiel sanktulojn kaj tiel inversigas la lumon kaj la mallumon. Nur vere revoluciaj literaturistoj kaj artistoj povas ĝuste solvi la problemon de prikantado kaj malkaŝado. Nepre malkaŝi ĉiujn mallumajn fortojn malutilajn al la popolamaso kaj nepre prikanti ĉiujn revoluciajn batalojn de la popolamaso — jen estas la fundamenta tasko de ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj.

“La tasko de literaturo kaj arto ĉiam estas malkaŝi.” Tiu ĉi aserto, same kiel la ĵus menciita, estiĝas pro manko de scio de la historia scienco. La literaturo kaj arto neniam sole malkaŝas, kion ni jam montris supre. Por la revoluciaj literaturistoj kaj artistoj, la objekto de malkaŝo povas esti nur la invadantoj, ekspluatantoj kaj subpremantoj kaj iliaj malbonaj influoj inter la popolamaso, sed ne povas esti la popolamaso. Ankaŭ la popolamaso havas siajn mankojn, sed ili devas esti forigataj per kritiko kaj memkritiko farataj interne de la popolo, kaj tio estas ankaŭ unu el la plej gravaj taskoj de literaturo kaj arto. Sed ĝi ne devas esti nomata “malkaŝado de la popolo”. Pri la popolo, la fundamenta problemo estas edukado

kaj altigo de ĝia nivelo. Nur kontraŭrevoluciaj literaturistoj kaj artistoj priskribas la popolon kiel “denaske stultan” kaj la revoluciajn amasojn kiel “tiranajn perfortulojn”.

“Nun estas ankoraŭ periodo de satiraj eseoj kaj la stilo de Lusin estas ankoraŭ bezonata.” Ĉar Lusin vivis sub malluma reakcia regado kaj ne havis liberon de parolo, tial li prenis kiel sian batalilon brulan satiron kaj frostan ironion en la formo de satiraj eseoj. Lusin estis tute prava. Ankaŭ ni devas akre moki faŝismon, la ĉinajn reakciulojn kaj ĉion malutilan al la popolo; sed en la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono kaj la kontraŭjapanaj baz-regionoj en la malamika postfronto, kie nur kontraŭrevoluciuloj estas senigitaj je libero kaj demokratiaj rajtoj, dum la revoluciaj literaturistoj kaj artistoj ilin plene ĝuas, la formo de satiraj eseoj do ne devas esti simple en imito al la stilo de Lusin. Ĉi tie ni povas laŭte krii per la plena voĉo, kaj estas nenecese uzi vualitajn kaj malrektajn esprimojn, kiuj malhelpas la popolamason ilin kompreni. Traktante la popolon mem kaj ne ĝian malamikon, Lusin eĉ en sia “periodo de satiraj eseoj” neniam ridindigis aŭ atakis la revoluciajn popolamasojn kaj la revoluciajn partiojn, kaj skribis en maniero tute malsama ol tiu kontraŭ la malamiko. Ni devas, kiel mi jam diris supre, kritiki la difektojn de la popolo, sed tion ni devas fari vere el la starpunkto de la popolo kaj el sincera varma deziro protekti kaj eduki ĝin. Se ni traktus niajn kamaradojn kiel malamikojn, tio do metus nin sur la starpunkton de la malamikoj. Ĉu ni do abolas satiron? Ne. Satiro estas ĉiam bezonata. Sed sin trovas diversspecaj satiroj, satiro pri niaj malamikoj, satiro pri niaj aliancanoj kaj satiro pri ni mem — ĉiu kun malsama sinteno. Ni ne oponas al satiro ĝenerale, sed ni nepre devas aboli la misuzon de satiro.

“Mi ne kutimas laŭdi kaj prikanti; verkoj prikantantaj la lumon ne estas nepre grandaj kaj tiuj priskribantaj la mallumon ne nepre senvaloraj.” Se vi estas burĝa literaturisto aŭ artisto, vi prikantas ne la proletaron sed la burĝaron; se vi estas proleta literaturisto aŭ artisto, vi prikantas ne la burĝaron sed la proletaron kaj la laborantan popolon: unu el la du kazoj devas esti. La verkoj prikantantaj la lumon de la burĝaro estas ne nepre grandaj,

dum la verkoj priskribantaj la mallumon de la burĝaro estas ne nepre senvaloraj, kaj la verkoj prikantaj la lumon de la proletaro estas ne nepre ne grandaj, dum la verkoj priskribantaj la t. n. "mallumon" de la proletaro estas nepre senvaloraj. Ĉu tio ĉi ne estas faktoj en la historio de literaturo kaj arto? Kial ni ne devas prikanti la popolon, la kreanton de la mondhistorio de la homaro? Kial ni ne devas prikanti la proletaron, la Komunistan Partion, la novan demokration kaj socialismon? Ja sin trovas ankaŭ tiaj homoj, kiuj havas neniom da entuziasmo por la afero de la popolo kaj apudstarante rigardas kun malvarma indiferecenteco al la batalado kaj venko de la proletaro kaj ĝia avangardo, kaj tio kio ilin interesas kaj pri kio ili senlace prikantas estas nur ili mem aŭ kun aldono de kelkaj personoj el ilia rondeto. Tiaj etburĝaj individuistoj kompreneble ne volas prikanti la heroaĵojn de la revolucia popolo aŭ altigi ĝian kuraĝon en batalo kaj ĝian fidon pri venko. Tiaj homoj estas nur konsumantaj vermoj en la revoluciaj vicoj; la revolucia popolo ja ne bezonas tiajn "kantistojn".

"Tio ne estas demando de starpunkto; la starpunkto estas ĝusta, la intenco bona, kaj la kompreno senerara, nur la prezentado estas ne bona kaj rezulte produktas malbonan efikon." Pri la dialektika materiisma vidpunkto de motivo kaj efiko mi jam parolis antaŭe. Nun mi volas demandi: Ĉu la demando de efiko ne estas tiu de starpunkto? Iu, kiu bazas sian agon nur sur sia motivo kaj ne zorgas pri la efiko, tre similas al kuracisto, kiu nur zorgas pri preskribado kaj ne zorgas kiom da pacientoj mortas de tio; aŭ al partio, kiu nur zorgas pri publikigo de deklarioj kaj ne zorgas pri ilia efektivigo. Ĉu ankaŭ tia starpunkto estas ĝusta? Ĉu ankaŭ tia intenco estas bona? Kompreneble, eraro povas okazi en antaŭtaksado pri la efiko de iu ago; sed ĉu ankaŭ tia intenco estas bona, se oni agas same kiel antaŭe eĉ kiam la malbona efiko jam estas pruvita per faktoj? En juĝado pri verkisto ni devas rigardi la praktikon kaj la efikon, same kiel en juĝado pri politika partio aŭ kuracisto. Ĉiu ajn havanta vere bonan intencon, devas konsideri la efikon, resumisajn spertojn kaj studi la metodojn, aŭ, kiel nomataj en arta kreado, la rimedojn de esprimado.

Ĉiu ajn havanta vere bonan intencon devas memkritiki kun plej granda sincereco pri la difektoj kaj eraroj en sia laboro kaj ilin korekti decideme. Ĝuste tiel la komunistoj adoptis la metodon de memkritiko. Nur tia starpunkto estas ĝusta. Nur tra procezo de tia serioza kaj devkonscia praktikado oni povas iom post iom kompreni kio estas la ĝusta starpunkto kaj iom post iom teni la ĝustan starpunkton. Se oni ne antaŭeniras laŭ tiu ĉi direkto en la praktikado sed nur flatas sin per mempravigo, asertante pri "kompreno senerara", oni fakte havas nenian komprenon pri la starpunkto.

"Pledi por lernado de marksismo estas ripeti la eraron de krea metodo de dialektika materiismo, kaj tio malutilos al nia krea humoro." Ni lernas marksismon por apliki la vidpunkton de dialektika materiismo kaj historia materiismo en nia observado pri la mondo, pri la socio kaj pri literaturo kaj arto, sed ne por skribi en niaj literaturaj kaj artaj verkoj filozofiajn lekciojn. Marksismo povas nur inkluzivi realismon en literatura kaj arta kreado, sed ne ĝin anstataŭi, same kiel ĝi povas nur inkluzivi la teoriojn pri atomo kaj elektrono en fiziko, sed ne ilin anstataŭi. Malplena, seka dogmiska formulo certe detruas nian kreaĵon humoron, sed ne nur tion, ĝi antaŭ ĉio detruas marksismon mem. Dogmiska "marksismo" ne estas marksismo sed kontraŭmarksismo. Ĉu do marksismo ne detruos la kreaĵon humoron? Ĝi detruos; ĝi certe detruos la kreaĵojn humorojn feŭdan, burĝan, etburĝan, liberalisman, individuisman, nihilisman, artopor-artan, aristokratan, dekadencan, pesimisman kaj ĉiajn aliajn nepopolarajn kaj neproletajn. Ĉu tiuj kreaĵoj humoroj ne estas detruendaj por proletaj literaturistoj kaj artistoj? Mi pensas, ke jes; ili devas esti tute detruitaj kaj samtempe kun la detruado io nova povas esti konstruata.

V

Kion montras tio, ke en niaj literaturistaj kaj artistaj rondoj en Jan-an ekzistas tiaj diversaj problemoj kiel supre menciitaj? Tio montras, ke en niaj literaturistaj kaj artistaj rondoj ekzistas en serioza grado malĝustaĵoj en laborstilo, ankoraŭ multe troviĝas inter niaj kamaradoj

ideismo, dogmismo, utopia penso, malplena babilo, malestimo al praktiko, sin-apartigo de la popolamaso k. a. difektoj, por kies forigo serioza kaj efika kampanjo por ĝustigo de laborstilo estas bezonata.

Multaj el niaj kamaradoj ankoraŭ ne povas klare vidi diferencon inter la proletaro kaj la etburĝaro. Multaj partianoj partianiĝis nur organize, sed ne tute, aŭ eĉ tute ne partianiĝis ideologie. Tiuj ĉi ideologie nepartianiĝintaj homoj ankoraŭ tenas en sia kapo multajn malpuraĵojn de la ekspluatantaj klasoj kaj tute ne scias, kio estas proleta ideologio, kio estas komunismo kaj kio estas la Partio. Ili pensas: “Proleta ideologio! Ĉu tio ne estas ankoraŭ la sama malnova ŝtofo?” Ili tute ne scias, ke ne facile estas akiri tiun ĉi malnovan ŝtonon; iuj eĉ dum sia tuta vivo neniam iel odoris komuniste, kaj povas nur forlasi la Partion finfine. Sekve, kvankam la plejparto de nia Partio kaj de niaj vicoj estas pura, ni tamen nepre devas fari seriozan reordigon en ideologio kaj organizo por gvidi la revolucion movadon pli bone disvolviĝi kaj pli rapide plenumiĝi. Sed por reordigo en organizo, necesas unue reordigo en ideologio kaj disvolvo de batalo de ideologio proleta kontraŭ neproleta. En literaturaj kaj artaj rondoj en Jan-an ideologia batalo jam estas komencita, kaj tio estas tre necesa. Per diversaj rimedoj, inkluzive tiujn de literaturo kaj arto, homoj de etburĝa deveno ĉiam obstine esprimas sin, propagandas siajn opiniojn kaj postulas, ke oni reformu la Partion kaj la mondon laŭ la trajtoj de la etburĝaj intelektuloj. En tiuj ĉi cirkonstancoj, nia tasko estas laŭte kribi al ili: “‘Kamaradoj!’ Via malnova ŝtofo ne taŭgas! La proletaro ne povas sin akomodi al vi; agi laŭ via volo signifas fakte agi laŭ la volo de la grandburĝaro kaj la grandbienularo kaj riski la pereon de nia Partio kaj nia lando.” Laŭ kies volo sole do ni devas agi? Ni devas reformi la Partion kaj la mondon nur laŭ la trajtoj de la avangardo de la proletaro. Ni esperas, ke la kamaradoj en literaturistaj kaj artistaj rondoj komprenos la seriozecon de tiu ĉi granda polemiko kaj aktive partoprenos tiun ĉi batalon, tiel ke ĉiu el ili fariĝu sana kaj nia tuta vicaro fariĝu vere unueca kaj firma ideologie kaj organize.

Pro ekzisto de multaj ideologiaj problemoj, multaj el niaj kamaradoj ne povas bone distingi inter niaj revoluciaj baz-regionoj kaj la regionoj regataj de Kuomintango kaj sekve faris multajn erarojn. Multaj el la kamaradoj venis de post-ĉambretoj de Ŝanhajo;¹⁰ venante de tiaj post-ĉambretoj al la revoluciaj baz-regionoj, ili transpasis ne nur de unu speco de regiono al alia speco de regiono, sed ankaŭ de unu historia epoko al alia historia epoko. Unu estas duonfeŭda, duonkolonia socio sub la regado de la grandbienularo kaj la grandburĝaro, dum la alia estas revolucia socio de nova demokratio sub la gvido de la proletaro. Alveno al la revoluciaj bazoj estas alveno al la epoko en kiu la regpotenco estas en la manoj de la popolamaso, kio estas senprecedenca en la miloj da jaroj de la ĉina historio. Tute aliaj estas la homoj ĉirkaŭ ni kaj la objekto de nia propagando. La pasinta epoko jam forpasis kaj neniam revenos. Do ni devas unuiĝi sen ia ajn hezito kun la novaj amasoj. Se vivante interne de la novaj amasoj, al vi kamaradoj ankoraŭ “mankas bona kono, kompreno, kaj kampo por apliki sian heroan kapablon”, kiel mi diris lastfoje, do vi renkontos malfacilaĵojn ne nur kiam vi iros al la vilaĝoj, sed eĉ se vi tion ne faros kaj restos en Jan-an. Iuj kamaradoj pensas: “Mi ankoraŭ verku do por la legantoj en la ‘granda postfronto’,”¹¹ ĉar tio estas bone konata por mi kaj havas ‘tutlandan signifon.’” Tute neĝusta estas tiu ĉi opinio. Ankaŭ la “granda postfronto” ŝanĝiĝas, kaj la tieaj legantoj esperas, ke la verkistoj en la revoluciaj baz-regionoj rakontos al ili pri novaj homoj kaj nova mondo, kaj ne bezonas aŭdi de ili la samajn malnovajn rakontojn jam de longe enuigajn. Sekve ju pli konscie dediĉita al la amasoj en la revoluciaj bazoj estas la verko, des pli da tutlanda signifo ĝi havas. *Detruigo*¹² de A. Fadejev rakontas nur la historion de malgranda partizana taĉmento kaj ne intencas plaĉi al la gusto de la legantoj de la malnova mondo; tamen ĝi produktis efekton tra la tuta mondo, almenaŭ, kiel ĉiuj vi ĉi tie bone scias, grandegan efekton en Ĉinio. Ĉinio estas iranta antaŭen, ne malantaŭen, kaj estas la revoluciaj baz-regionoj, ne iuj ajn postĝintaj retroirantaj regionoj, kiuj gvidas ĝin antaŭen. Tiun ĉi fundamentan fakton, vi, kamaradoj,

devas koni antaŭ ĉio en la kampanjo por ĝustigo de laborstilo.

Ĉar ni devas adaptiĝi al la nova epoko de la amaso, ni devas plene solvi la problemon de la interrilato inter la individuo kaj la amaso. Kiel nia maksimumo devas servi la versparo de Lusin: "Brovkuntire spitas mi mil ulojn fingre min celantajn, kapklininte servas mi infanon vole kiel bovo." ¹³ La "mil uloj" ĉi tie signifas la malamiĵojn, al kiuj ni neniam submetiĝos, kiel ajn furiozaj ili estu. La "infano" ĉi tie signifas la proletaron kaj la popolamason. Ĉiuj komunistoj, revoluciuloj, revoluciaj literaturistoj kaj artistoj devas lerni la ekzemplon de Lusin kaj fariĝi la "bovo" de la proletaro kaj la popolamaso por ilin plenforte servadi ĝis la lasta spiro. Por unuiĝi kun kaj servi al la amaso, la intelektuloj bezonas procezon de interkonatigo kun la popolamaso. Kvankam dum tiu ĉi procezo povas esti kaj certe estas multaj suferoj kaj konfliktoj, tamen, se nur oni estas decidemaj, tiuj postuloj estas ja plenumeblaj.

Tio, kion mi priparolis hodiaŭ tuŝas nur kelkajn problemojn de fundamenta orientado por nia literatura kaj arta movado; ankoraŭ multaj konkretaj problemoj atendas pluan studadon. Mi kredas, ke vi kamaradoj decide iros laŭ tiu ĉi direkto. Mi kredas, ke dum la procezo de la kampanjo por ĝustigo de laborstilo kaj dum la longdaŭra lernado kaj laborado, vi certe povos reformi vin mem kaj la fizionomion de viaj verkoj, krei multajn bonegajn verkojn kiuj estos varme bonvenigataj de la popolamaso, kaj antaŭenpuŝi la literaturan kaj artan movadon en niaj revoluciaj baz-regioj kaj en la tuta lando al brila nova etapo.

KLARIGOJ

1. En sia artikolo *La Partia Organizo kaj la Partia Literaturo*, montrante la karakterizaĵojn de proleta literaturo, Lenin skribis:

"Tio estos libera literaturo, ĉar nek avideco nek karierismo sed la ideo de socialismo kaj simpatio al la laborantaj popoloj varbos ĉiam novajn kaj novajn fortojn en ĝiajn vicojn. Tio estos libera literaturo, ĉar ĝi servos ne al la sategaj herinoj, ne al la 'kelkdek mil grandmonduloj' enuaj kaj suferantaj de trograseco, sed al la milionoj kaj dekoj da milionoj da laborantaj popoloj, kiuj konsistigas la floron de la lando, ĝian forton, ĝian estontecon. Tio estos libera literaturo, fekundiganta la lastan vorton de la revolucia penso de la homaro per la sperto kaj viveca laboro de la socialisma

proletaro, kreanta konstantan interrilaton inter la sperto de la pasinteco (scienca socialismo, kiu kompletigis la disvolvon de socialismo el ĝiaj primitivaj, utopiaj formoj) kaj la sperto de la estanteco (la hodiaŭa batalo de niaj kamaradoj laboristoj)." (*Kolektitaj Verkoj de Lenin*, rusa eldono, Moskvo, 1947, Vol. X, pp. 30-31)

2. Membro de la kontraŭrevolucia Nacia Socialista Partio. Li propagandadis la literaturan teorion de la usona reakcia burĝaro, obstine opoziciis la revolucion kaj blasfemis revolucionan literaturon.

3. Ambaŭ fariĝis naciperfiduloj siatempe kiam la japanaj invadantoj okupis Pekinon kaj Ŝanhajon en 1937.

4. Vidu "*Mia Opinio pri la Unio de Maldekstraj Verkistoj*", *Kompleta Verkaro de Lusin*, ĉina eldono, Vol. IV.

5. Vidu "*Morto*", *Kompleta Verkaro de Lusin*, ĉina eldono, Vol. VI.

6. Populara ĉina opereto kun nur du personoj, paŝtisteto kaj vilaĝa knabino. Ĝia enhavo prezentiĝas en formo de demandoj kaj respondoj. En la komenca periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, oni utiligis ĝian formon kaj ŝanĝis la vortojn de ĝiaj kantoj por propagandi rezistadon kontraŭ japana invado kaj ĝi estis sufiĉe populara siatempe.

7. En la ĉina lingvo, ili estas simplaj ideografiaĵoj el malmultaj strekoj, ordinare donitaj en la unuaj lecionoj de malnovaj elementaj lernolibroj.

8. Ambaŭ estas kantoj de la Regno de Ĉu en la tria jarcento a. K. La unua estas muzikaĵo de pli alta nivelo kaj la dua de malpli alta. Laŭdire, kiam iu kantis en la ĉefurbo de Ĉu la unuan, nur dekoj da homoj partoprenis la kunkanton, sed kiam li kantis la duan, kunkantis miloj.

9. En *La Partia Organizo kaj la Partia Literaturo* Lenin diris: "La literatura afero devas fariĝi parto de la tutproletara afero, fariĝi 'radeto kaj ŝraŭbeto' de unu unueca, granda soci-demokratia mekanismo irigata de la tuta konscia avangardo de la tuta laborista klaso." (*Kolektitaj Verkoj de Lenin*, rusa eldono, Moskvo, 1947, Vol. X, p 27.)

10. Malgrandaj kaj malhelaj ĉambretoj en la posta parto de ŝanhajaj pluretaĝaj domoj, sekve malpli kostaj por luado. La plejparto de la malriĉaj verkistoj, artistoj, intelektuloj kaj malgrandaj oficistoj luis tiutempe tiajn ĉambrojn por loĝado.

11. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, la batalfrontoj troviĝis en norda, orienta, centra kaj suda Ĉinio, kaj oni ordinare nomis la sudokcidentan kaj nordokcidentan partojn de Ĉinio, regatajn de Kuomintang kaj neokupitajn de la japana agresa armeo, "granda postfronto".

12. A. Fadejev (1901—1956) estis fama sovetia verkisto. Lia novelo *Detruigo* aperis en 1927, en kiu li priskribis la rakonton pri gerila taĉmento, kiu estis formita el siberiaj laboristoj, kamparanoj kaj revoluciaj intelektuloj kaj batalis kontraŭ la kontraŭrevoluciaj banditoj dum la periodo de enlanda milito de Sovetio. La novelo estis tradukita ĉinen de Lusin.

13. "*En Moko pri Mi Mem*", *Kompleta Verkaro de Lusin*, ĉina eldono, Vol. VII.

Letero Skribita al la Jan-ana Pekin-opera Teatro post Rigardo al “Premite al Liangŝan por Ribeli”

(La 9-a de januaro 1944)

MAŬ ZEDONG

Rigardinte vian prezentadon, mi trovis, ke vi faris tre bonan laboron, kaj esprimas mian dankon al vi kaj, pere de vi, ankaŭ al ĉiuj kamaradoj aktoroj! La historio estas kreita de la popolo, sed sur la scenejo de malnova opero (kaj en ĉiuj la popolon forlasintaj malnovaj literaturaĵoj kaj artaĵoj) la popolo ja fariĝis feĉo, kaj la scenejon regas sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoridoj kaj sinjoridinoj. Tian inversigon de historio vi nun reinversigis, redonante al la historio ties propran fizionomion, kaj de nun la malnova opero akiris novan aspekton; tio ĉi meritas gratulon. Via iniciato estas epokfara komenco de revolucio por la malnova opero, kaj pensante pri tio, mi tre ĝojas kaj esperas, ke vi daŭre verkos kaj ludos multe, por ke tio fariĝu populara kaj disvastiĝu tra la tuta lando!

Donu Seriozan Atenton al la Diskutado pri la Filmo “La Vivo de Vu Hjun”*

(La 20-a de majo 1951)

MAŬ ZEDONG

La demandoj levitaj de “La Vivo de Vu Hjun” estas fundamentecaj en sia naturo. Homoj, kia Vu Hjun, vivantaj en la lastaj jaroj de King-dinastio, en la epoko de la granda batalo de la ĉina popolo kontraŭ la eksterlandaj agresantoj kaj enlandaj reakciaj feŭdaj regantoj, tute ne tuŝis eĉ je hareto la feŭdan ekonomian bazon kaj ĝian superstrukturen, sed, kontraŭe, fanatike propagandis feŭdan kulturon kaj, plie, faris ĉion eblan por flataĉi sklavmaniere al la reakciaj feŭdaj regantoj, kun la celo atingi la bezonatan pozicion por propagandi la feŭdan kulturon. Ĉu tian abomenindan konduton ni devas prikanti? Ĉu ni povas toleri prikanton de tia abomeninda konduto al la popolamasoj, eĉ faritan sub la revolucia standardo de “servo al la popolo” kaj per uzo de la malsukceso de revolucia kamparana batalo kiel kontras-

to? Agnoski aŭ toleri tian prikanton signifas agnoski aŭ toleri la reakcian propagandon, kalumniantan la revolucionan batalon de la kamparanoj, la historion de Ĉinio kaj la ĉinan nacion, kiel propagandon pravan.

La apero de la filmo “La Vivo de Vu Hjun”, kaj precipe la fakto ke la laŭdoj pri Vu Hjun kaj la filmo “La Vivo de Vu Hjun” estas eĉ tiel multaj, montras, ĝis kia grado estas konfuzita la penso en la kulturaj rondoj de nia lando!

Laŭ la opinio de multaj aŭtoroj, la historio disvolviĝas ne per tio, ke novaj aferoj anstataŭas la malnovajn, sed per tio, ke malnovaj aferoj estas konservataj per ĉiaj klopodoj, por ke ili ne mortu; ne per tio renversi la renversendajn reakciajn feŭdajn regantojn per klasbatalo, sed per tio, kiel Vu Hjun faris, nei la klasbatalon de la subpremata popolo kaj kapitulaci al la reakciaj feŭdaj regantoj. Niaj aŭtoroj ne esploras, kiuj estis tiuj malamikoj kiuj subpremis la ĉinan popolon en la pasinteco, kaj ĉu estis io laŭdinda ĉe tiuj, kiuj kapitulacis al tiuj malamikoj kaj servis al ili. Niaj aŭtoroj ankaŭ ne esploras, kiaj novaj ekonomiaj formoj de la socio, novaj klasaj fortoj, novaj homoj kaj novaj ideoj aperis en Ĉinio, kiuj batalis kontraŭ la malnovaj ekonomiaj formoj de la socio kaj ilia superstrukturo (politiko, kulturo, ktp.) dum la pli ol cent jaroj de post la Opia Milito en 1840, por tiel decidi, kio devas esti laŭdata kaj prikantata, kio ne devas esti laŭdata kaj prikantata, kaj kio devas esti oponata.

Precipe atentindaj estas iuj komunistoj, kiuj laŭdire ellernis marksismon. Ili ellernis la historion de socia disvolviĝo — historian materiismon, sed kiam ili alfrontas konkretajn historiajn eventojn, konkretajn historiajn figurojn (kiel Vu Hjun) kaj konkretajn kontraŭhistoriajn ideojn (kiel la filmo “La Vivo de Vu Hjun” kaj aliaj verkoj pri Vu Hjun), ili tute perdis sian kapablon de kritiko, kaj iuj el ili eĉ kapitulacas al tiuj reakciaj ideoj. Ĉu tio ne estas fakto, ke reakciaj burĝaj ideoj invadis la batalantan Komunistan Partion? Kie do estas la marksismo, kiun ellerni iuj komunistoj pretendas?

Pro la supre menciitaj kaŭzoj, oni devas disvolvi diskutadon pri la filmo “La Vivo de Vu Hjun” kaj aliaj verkoj kaj artikoloj pri Vu Hjun por ĝisfunde klarigi la konfuzitan penson rilate al tiu ĉi demando.

* *Eltiraĵo el la ĉefartikolo de la Popola Ĵurnalo, skribita por ĝi de kamarado Maŭ Zedong.*

Letero pri la Problemo de Studo pri la Romano “Songô de Ruĝa Buduaro”*

(La 16-a de oktobro 1954)

MAŬ ZEDONG

Ĉikune mi sendas al vi du artikolojn, kiuj refutas Ju Pingbo. Bonvolu ilin legi. Tio ĉi estas la unua serioza ekpafo de la lastaj pli ol 30 jaroj kontraŭ la eraraj vidpunktoj de la tiel nomata aŭtoritata aŭtoro en la sfero de studo pri la “Songô de Ruĝa Buduaro”. La du verkintoj estas membroj de la Junulara Ligo. Unue ili skribis al “Wenji Bao” (Gazeto de Literaturo kaj Arto) por demandi, ĉu oni povas kritiki Ju Pingbo; sed la letero estis ignorita. Tiam restis al ili nenio alia ol skribi al instruisto en sia patrinlernejo, la Ŝandong-a Universitato, kaj tie ili akiris subtenon. En la periodaĵo de la universitato “Wen Shi Zhe” (Literaturo, Historio kaj Filozofio) aperis ilia artikolo refutanta la verkon “Mallonga Studo pri la Romano ‘Songô

de Ruĝa Buduaro' ". La problemo denove venis al Pekino. Iuj postulis, ke la artikolo estu represita en "Renmin Ribao" (Popola Ĵurnalo) por levi diskutadon kaj disvolvi kritikadon. Tio ree ne povis efektiviĝi, ĉar iuj oponis tion per diversaj kialoj (ĉefe per tio, ke ĝi estas "artikolo de malgrandaj personoj" kaj "la partia ĵurnalo ne estas forumo por libera debato"); kiel kompromiso, la artikolo estis permesita represiĝi en "Wenji Bao". Pli poste, en la rubriko "Literatura Heredaĵo" de "Guangming Ribao" (Lumo) oni plie aperigis artikolon de tiuj du junuloj refutantan la libron de Ju Pingbo "Studo pri la Romano 'Sonĝo de Ruĝa Buduaro' ". Versajnas, ke eble jam disvolviĝos la batalo kontraŭ la burĝa ideismo de la skolo de Hu Ŝi en la kampo de klasika literaturo, kiu venenadis junulojn dum pli ol 30 jaroj. La afero estis iniciatita de du "malgrandaj personoj", dum la "grandaj personoj" kutime ne donis al ĝi atenton kaj eĉ starigis obstaklojn; ili formis unuecan fronton pri ideismo kun burĝaj verkistoj kaj volonte fariĝis kaptitoj de la burĝaro. Tio preskaŭ per nenio diferencas de la atmosfero dum la tempoj de prezentado de la filmoj "Sekreta Historio de la King-kortego" kaj "La Vivo de Vu Hjun". Post la prezentado en la tuta lando, la filmo "Sekreta Historio de la King-kortego", kiu estas priskribita de iuj kiel filmo patriotisma, sed fakte estas naciperfidisma, ĝis nun ankoraŭ ne estas kritikita. "La Vivo de Vu Hjun" kvankam estis kritikita, tamen ĝis nun oni ankoraŭ ne tiris el ĝi lecionon, kaj plie okazis la strangaĵo de tolerado al la ideismo de Ju Pingbo kaj malhelpo al la tre viglaj kritikaj artikoloj de "malgrandaj personoj". Tio meritas nian atenton.

En rilato al burĝaj intelektuloj, kia Ju Pingbo, ni devas, kompreneble, alpreni la sintenon unuiĝi kun ili, tamen ni devas kritiki kaj refuti ilian eraran ideologion venenantan junulojn, sed ne kapitulaci al ili.

* Tiu ĉi letero estas skribita de kamarado Maŭ Zedong al kamaradoj de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj aliaj koncernaj kamaradoj.

Du Instrukciaj Notoj pri Literaturo kaj Arto

MAŬ ZEDONG

I. Instrukcia Noto de la 12-a de Decembro 1963

En diversaj artformoj — teatraĵo, ĉjuĵi-o, muziko, belarto, danco, filmo, poemo, literaturo, ktp., troviĝas nemalmulte da problemoj, je kiuj grandaj nombroj da personoj estas koncernataj, kaj ĝis nun la socialisma remuldo efikis tre malmulte en multaj fakoj. Tiuj fakoj eĉ nun estas ankoraŭ regataj de “mortintoj”. Oni ne devas subtaksi la atingojn en la sferoj de filmo, nova poemo, popolkanto, belarto kaj novelo, sed ankaŭ en ili estas multaj problemoj. Kaj en la fakoj de teatro k. a., la problemoj estas ankoraŭ pli grandaj. Jam ŝanĝiĝis la ekonomia bazo de la socio, sed en la arto, kiel unu el la superstrukturaĵoj servantaj al tiu bazo, restas ĝis nun ankoraŭ granda problemo. Tion oni bezonas serioze preni en sian zorgon, komencante per enketado kaj esplorado.

Multaj komunistoj fervore pledas por la arto de feŭdismo kaj kapitalismo, sed ne por tiu de socialismo. Ĉu tio ne estas afero strangea?

II. Instrukcia Noto de la 27-a de Junio 1964

De 15 jaroj, tiuj asocioj kaj la plejparto de la periodaĵoj, kiuj troviĝas en iliaj manoj (laŭdire kelkaj estas bonaj), ĜENERALE (ne ĉiuj personoj) ne praktikas la politikojn de la Partio, kondutas grandsinjore kaj mandarene, ne iras proksime al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj ne spegulas la socialismajn revolucion kaj konstruadon. **EN LA LASTAJ KELKAJ JAROJ** ili eĉ glitis ĝis la rando de reviziismo. Se ili ne serioze sin remuldos, ili certe transformiĝos iutage en la estonteco en tiajn grupojn, kia estis la klubo Petofi en Hungario.

Letero de Kamarado Lin Biaŭ al la Konstanta Komitato de la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

La 22-an de marto, 1966

Kamaradoj de la Konstanta Komitato:

Ĉikune mi sendas al vi la Resumon de la Kunsido pri la Literatura kaj Arta Laboro en la Armeo, kunvokita de kamaradino Giang King, por via legado. Ĉi tiu Resumo, kiu estas ripetade studita de la partoprenantoj de la kunsido kaj plie ekzamenita kaj reviziita trifoje de Prezidanto Maŭ persone, estas tre bona dokumento. Ĝi solvis per la penso de Maŭ Zedong multajn gravajn demandojn en la kultura revolucio de la socialisma periodo, kaj havas ne nur treege grandan aktualan signifon, sed ankaŭ profundan kaj longtempan historian signifon.

De 16 jaroj, ekzistas akra klasbatalo sur la literatura kaj arta fronto, kaj la problemoj, kiu venkos kiun, ankoraŭ ne estas solvita. Se la proletaro ne okupos la pozicion de literaturo kaj arto, la burĝaro certe ĝin okupos. La batalo estas neevitebla. Tio estas treege vasta kaj profunda socialisma revolucio en la ideologia kampo. Se ni ne bone traktos la aferon, aperos reviziismo. Ni nepre devas teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj senŝanceliĝe konduki tiun ĉi revolucion ĝis la fino.

La demandoj kaj opinioj elmetitaj en la Resumo estas tute konformaj al la efektiva stato de la literatura kaj arta laboro en la armeo, kaj ili nepre devas esti firme plenumitaj por ke la literatura kaj arta laboro en la armeo ludu gravan rolon en la elstarigo de politiko kaj akcelo de revoluciigo de homoj.

Bonvolu komuniki al mi viajn opiniojn pri la Resumo, por ke ĝi povu esti sendita al la Centra Komitato por ekzameno kaj sankcio.

Saluton!

Lin Biaŭ

Resumo de la Kunsido pri la Literatura kaj Arta Laboro en la Armeo, Kunvokita de Kamaradino Giang King laŭ la Komisio de Kamarado Lin Biaŭ

I

Laŭ la komisio de kamarado Lin Biaŭ, kamaradino Giang King invitis nombron da kamaradoj en la armeo al kunsido okazigita en Ŝanhajo de la 2-a ĝis la 20-a de februaro, 1966, por diskuti pri kelkaj problemoj en la literatura kaj arta laboro en la armeo.

Antaŭ la foriro al Ŝanhajo de la kamaradoj el la armeo, kiuj partoprenis la kunsidon, kamarado Lin Biaŭ donis al ili la jenan instrukcion: "Kamaradino Giang King interparolis kun mi hieraŭ. Ŝi estas tre eminenta politike en literatura kaj arta laboro kaj ankaŭ bone scias arton. Ŝi havas multe da valoraj opinioj. Vi devas bone atenti ilin kaj serioze certigi ilian efektivigon ideologie kaj organize. Ekde nun, dokumentoj koncernantaj literaturan kaj artan laboron en la armeo estu sendataj al ŝi por legi; kontaktu kun ŝi ĉiam, kiam vi havas ian informon, por ke ŝi konu la staton de la literatura kaj arta laboro en la armeo, petu ŝiajn opiniojn por ke la literatura kaj arta laboro en la armeo povu dank' al tio pliboniĝi. Ne kontentiĝu pri la nunaj ideologia kaj arta niveloj de la literatura kaj arta laboro en la armeo, sed ilin plialtigu." Ambaŭ Kamaradoj Hiaŭ Hua kaj Jang Ĉengvu esprimis varman aprobon kaj subtenon al tiu kunsido, kaj ins-

trukciis, ke ni nepre agu laŭ la opinio de kamaradino Giang King kaj ankaŭ esprimis dankon al kamaradino Giang King pro ŝia granda zorgo al la literatura kaj arta laboro en la armeo.

En la komenco de la kunsido kaj dum interparoloj, kamaradino Giang King plurfoje esprimis, ke ŝi ne sufiĉe lernis el la verkoj de Prezidanto Maŭ, ne havas profundan komprenon pri la penso de Prezidanto Maŭ, sed kiun ajn punkton ŝi ellernis, ŝi nepre agas laŭ ĝi firme. En la lastaj kvar jaroj, ŝi relative koncentre legis nombron da literaturaj verkoj, kaj formis certajn opiniojn, el kiuj ne ĉiuj estas nepre pravaj. Ni ĉiuj estas kompartianoj kaj, por la afero de la Partio, devas diskuti en egaleco. Tiu ĉi diskuto devus esti farita en la pasinta jaro, sed estis prokrastita pro tio ke ŝi malbone fartis. Ĉar lastatempe ŝia sano fariĝis iom pli bona, ŝi do invitis la kamaradojn por kune interkonsiliĝi laŭ la instrukcio de kamarado Lin Biaŭ.

Kamaradino Giang King proponis legi unue nombron da verkoj kaj poste koncernajn dokumentojn kaj materialon antaŭ ol veni al diskutado. Ŝi legis al ni koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj interparolis aparte kun kamaradoj-armeanoj 8-foje, ĉeestis 4 kolektivajn diskutojn, akompanis nin rigardi filmojn 13-foje kaj teatraĵojn 3-foje. Ankaŭ dum

spektado de la filmoj kaj teatraĵoj ŝi interŝanĝis opiniojn kun ni. Kaj krome ni rigardis 21 filmojn laŭ ŝia konsilo. Dum tiu periodo kamaradino Giang King ankaŭ rigardis la provaĵon de la filmo *La Granda Muro sur la Suda Maro*, akceptis ĝiajn reĝisorojn, fotistojn kaj parton de la aktoroj, kaj trifoje interparolis kun ili, kio donis grandan edukon kaj kuraĝigon al ili. En tiuj kontaktoj ni sentis, ke kamaradino Giang King sufiĉe profunde komprenas la penson de Prezidanto Maŭ, faris longtempan, sufiĉe kompletan enketon kaj esploron pri la problemoj ekzistantaj en la literatura kaj arta kampo, persone kulturis “eksperimentan kampon” kaj havas abundan praktikan sperton. Ĉifoje ŝi laboris spite al sia malsano, kaj modeste, fervore kaj sincere interparolis kaj rigardis filmojn kaj teatraĵojn kune kun ni. Ĉio ĉi tio multe nin inspiris kaj helpis.

II

En la daŭro de ĉirkaŭ 20 tagoj, ni legis du verkojn de Prezidanto Maŭ kaj alian koncernan materialon, aŭskultis multajn ekstreme gravajn opiniojn de kamaradino Giang King, rigardis pli ol 30 filmojn, inkluzive bonajn, malbonajn kaj tiujn kun mankoj aŭ eraroj en malsama grado, kaj plie rigardis la du relative sukcesajn pekinajn operojn kun revoluciaj nuntempaj temoj *Surprizatako kontraŭ la Blank-tigra Regimento* kaj *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*. Ĉio ĉi pliprofundigis nian komprenon pri la literatura kaj arta penso de Prezidanto Maŭ kaj altigis nian konon pri la socialisma kultura revolucio. Sube estas kelkaj opinioj pridiskutitaj kaj interkonsentitaj de ĉiuj ĉeestantoj en la kunsido:

(1) De 16 jaroj, ekzistas akra klasbatalo sur la kultura fronto.

Fakte, en ambaŭ etapoj de la revolucio de nia lando, la novdemokratia etapo kaj la socialisma etapo, ekzistas batalo inter la du klasoj kaj inter la du linioj sur la kultura fronto, nome la batalo inter la proletaro kaj la burĝaro por gvidanteco sur tiu ĉi fronto. En la historio de nia partio, la bataloj kontraŭ la “maldekstra” kaj dekstra oportunismo ĉiam inkluzivis ankaŭ la batalon inter la du linioj sur la kultura fronto. La linio de Vang Ming reprezentis burĝan ideologion, kiu iam inundis nian partion. En

la stilĝustiga movado, komencita en la jaro 1942, Prezidanto Maŭ ĝisfunde kritikis en teorio unue la politikan, militan kaj organizan liniojn de Vang Ming kaj tuj sekve, la kulturen linion reprezentatan de Vang Ming. *Pri Nova Demokratio, Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an kaj Letero Skribita al la Jan-ana Pekin-opera Teatro post Rigardo al “Premite al Liangŝan por Ribeli”* de Prezidanto Maŭ estas la plej kompleta, plej plenampleksa kaj plej sistema historia resumo pri la batalo inter la du linioj sur la kultura fronto. Ili estas heredo kaj disvolvo de la marksism-leninismaj mondkoncepto kaj teorio pri literaturo kaj arto. Post kiam la revolucio de nia lando eniris en la socialisman etapon, Prezidanto Maŭ publikigis la du verkojn *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj *Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro*. Ili estas la plej nova resumo de la historia sperto de la revolucia ideologia movado kaj la literatura kaj arta movado en nia lando kaj en la aliaj landoj. Ili prezentas novan disvolviĝon de la marksism-leninismaj mondkoncepto kaj teorio pri literaturo kaj arto. Tiuj kvin verkoj de Prezidanto Maŭ sufiĉas por uzado de ni proletaro dum longa periodo.

Ĝis nun jam forpasis pli ol dudek jaroj post la publikigo de la unuaj tri verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj ankaŭ la lastaj du estas publikigitaj preskaŭ de dek jaroj. Sed, depost la fondiĝo de nia respubliko, la opinioj en tiuj verkoj de Prezidanto Maŭ fundamente ne estas plenumitaj de la literatura kaj arta rondoj. Anstataŭe diktature tiranis nin nigra linio kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma, rekte kontraŭa al la penso de Prezidanto Maŭ. Tiu ĉi nigra linio estas nenio alia ol kombiniĝo de literaturaj kaj artaj pensoj de la burĝaro kaj moderna reviziismo kun la tiel nomata literaturo kaj arto de la tridekaj jaroj. La tipaj esprimoj de tiu ĉi linio estas la teorioj de “priskribo de la vero”, “larĝa vojo de realismo”, “profundiĝo de realismo”, kontraŭstaro al “subjekto kiel decida faktoro”, “mezaj personoj”, kontraŭstaro al “pulvodoro”, “kuniĝo de diversaj tendencoj kiel la spirito de la epoko” ktp. Kaj plejparto de tiuj tezoj jam antaŭlonge estis kritikitaj de Prezidanto Maŭ en la verko *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta*

Kunsido en Jan-an. En la rondo de filmlaborantoj iuj eĉ elmetis la tiel nomatan teorion de “forlaso de la klasikaĵo kaj ribelo kontraŭ la ortodoksaĵo”, t. e., forlasi la klasikaĵon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kaj ribeli kontraŭ la ortodoksaĵo de la popola revolucia milito. Sub la influo aŭ regado de ĉi tiu burĝa kaj modernreviziisma kontraŭflujo en literaturo kaj arto, aperis nur malmulte da bonaj aŭ fundamente bonaj verkoj en la lastaj dekelkaj jaroj (kvankam troviĝis tiaj) kiuj vere prikantas heroojn el la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj servas al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj; aperis nemalmulte da verkoj de meza kvalito, kaj ankaŭ nombro da kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj venenaj herbaĉoj. Ni nepre devas firme konduki grandan socialisman revolucion sur la kultura fronto, laŭ la instrukcioj de la Centra Komitato de la Partio, kaj komplete elimini ĉi tiun nigran linion. Sed post la forigo de tiu nigra linio, naskiĝos ankoraŭ aliaj nigraj linioj, kaj oni devos ree batali. Tial, tio estas peniga, komplika, longdaŭra batalo, kiu bezonas klopodadon dum dekoj aŭ eĉ centoj da jaroj. Tio estas granda afero koncernanta la estontecon de la revolucio de nia lando kaj ankaŭ la estontecon de la monda revolucio.

La instrua leciono el la pasintaj dekelkaj jaroj estas ke ni ekprenis la laboron en la manon iom malfrue. Ni priraktis nur kelkajn unuopajn demandojn, sed ne plene kaj sisteme priraktis la tutan problemon. Kaj se ni ne priatentas, multajn poziciojn ni povas nur lasi okupitaj de la nigra linio; tio ĉi estas serioza leciono. Post kiam la Dekaj Plena Sesio de la Centra Komitato de la Partio en 1962 decidis disvolvi klasbatalon tra la tuta lando, la batalo por starigo de la proleta ideologio kaj elimino de la burĝa ideologio en la kultura kampo paŝo post paŝo disvolviĝis.

(2) En la lastaj tri jaroj, aperis nova situacio en la granda socialisma kultura revolucio, kaj la leviĝo de pekinaj operoj kun revoluciaj nuntempaj temoj estas la plej elstara ekzemplo. Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ ĉe la kapo, kun marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kiel armilo, la literaturaj kaj artaj laborantoj, sin okupantaj pri la revoluciigo de la pekina

opero, lanĉis bravan kaj malcedeman ofensivon kontraŭ la literaturo kaj arto de la feŭda klaso, la burĝaro kaj la modernaj reviziistoj. Tiu nerezistebla ofensivo radikale revoluciigis ideologie kaj forme la plej obstinan fortikaĵon, la pekinan operon, tiel ke sub ĝia puŝado estas komencita revolucia ŝanĝiĝado en la literatura kaj arta rondo. La pekinaj operoj kun revoluciaj nuntempaj temoj *La Ruĝa Signal-lanterno*, *Ŝagiabang*, *Sagacia Kapto de la Tigra Monto*, *Surprizatako kontraŭ la Blanktigra Regimento*, la baledo *Ruĝa Virina Taĉmento*, la simfonio *Ŝagiabang* kaj la argila skulptaĵo *Farmpaga Kolektejo* jam estas aprobitaj de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ankaŭ ricevas varmajn aklamojn inter la rigardantoj en- kaj ekster-landaj. Tio ĉi estas iniciato kiu havos profundan kaj longdaŭran influon sur la socialisman kulturen revolucion. Tio ĉi elokvente pravas, ke eĉ la pekina opero, tiu plej obstina fortikaĵo, povas esti konkerita kaj revoluciigita, kaj ke ankaŭ fremd-devenaj klasikaj artaj formoj kiaj baledo kaj simfonio povas esti reformitaj por servi al ni, do ni devas havi pli grandan memfidon por revoluciigi aliajn branĉojn de arto. Iuj diras, ke la pekinaj operoj kun revoluciaj nuntempaj temoj forlasis la tradicion kaj la bazan prezentan arton de la pekina opero. Sed la fakto montras ĝuste la malon. La pekinaj operoj kun nuntempaj revoluciaj temoj ja heredis kritike la tradicion de la pekina opero, kaj vere forigis la oldajn por elŝovi la novajn. La baza prezenta arto de la pekina opero ne estas forlasita, sed pruvigas jam nesufiĉa; kaj parto de ĝi, kiu ne povas speguli la novan vivon, devas esti kaj ankaŭ nepre esti forlasita. Kaj ĝuste por speguli la novan vivon, ni bezonas urĝe ekstrakti, krei kaj iom post iom disvolvi kaj riĉigi la bazan prezentan arton de la pekina opero el nia vivsperto. Samtempe, tiuj faktoj donis fortan rebaton al diversspecaj konservativuloj kaj la teorioj kiaj tiuj de t. n. “biletgiceta valoro”, “fremdvaluta valoro” kaj “neeksportebleco de revoluciaj verkoj”.

Alia elstara trajto de la socialisma kultura revolucio en la lastaj tri jaroj estas la vasta amasa aktivado de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur la ideologia kaj literatura-arta fronto. El la plumoj de laboristoj, kamparanoj

kaj soldatoj senĉese aperadas multaj bonegaj filozofiaj artikoloj kiuj bone esprimas la penson de Maŭ Zedong deire de ilia praktikado; samtempe, senĉese aperadas ankaŭ multaj bonegaj verkoj literaturaj kaj artaj, prikantantaj la grandajn venkojn en la socialisma revolucio de nia lando, la antaŭensaltegon sur diversaj frontoj de nia socialisma konstruado, niajn novajn heroojn, la brilan gvidadon de nia granda partio kaj nia granda gvidanto; precipe la multnombraj poemoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, aperintaj en murgazetoj kaj nigratabulaj gazetoj, markas tute novan epokon tiel en enhavo kiel en formo.

Kompreneble, tiuj estas nur la unua frukto en la socialisma kultura revolucio kaj la unua paŝo en longa marŝo de dek mil lioj. Por defendi kaj disvolvi la frukton, kaj konduki la socialisman kulturen revolucion ĝis la fino, ni devas fari ankoraŭ longtempan kaj malfacilan klopodadon.

(3) La batalo inter la du vojoj sur la literatura kaj arta fronto nepre speguliĝas en la interno de la armeo, ĉar nia armeo ne vivas en vakuo kaj absolute ne povas esti escepto. La Ĉina Popola Liberiga Armeo estas la ĉefa instrumento de la diktaturo de la ĉina proletaro kaj la apogo kaj espero de la ĉina popolo kaj de la tutmondaj revoluciaj popoloj. Sen popola armeo, ne estus la venko de la revolucio, nek la diktaturo de la proletaro, nek socialismo, kaj ankaŭ la popolo havus nenion. Tial, la malamikoj nepre klopodas detrui ĝin de ĉiuj flankoj kaj ankaŭ ĝin korupti ideologie, uzante literaturon kaj arton kiel armilojn. Sed, post kiam Prezidanto Maŭ montris, ke de 15 jaroj la literatura kaj arta rondoj fundamente ne agas laŭ la principoj de la Partio, iuj personoj ankoraŭ asertas, ke la problemo pri la direkto de la literaturo kaj arto de la armitaj fortoj estas jam solvita, kaj ke la restanta ĉefa problemo estas tiu de altigo de la arta nivelo. Tiu ĉi vidpunkto estas erara kaj ne estas bazita sur konkreta analizo. Fakte, el literaturaj kaj artaj verkoj de la armeo, iuj havas ĝustan direkton kaj atingis relative altan nivelon ankaŭ en arto; iuj havas ĝustan direkton, sed malaltan artan nivelon; aliaj havas seriozajn mankojn aŭ erarojn en politika direkto kaj arta formo; kaj ankoraŭ aliaj eĉ estas kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj venenaj herbaĉoj. La Film-

farejo "1-a Aŭgusto" ja produktis tian malbonan filmon kia *Perforta Rekrutigo*. Tio montras, ke ankaŭ la literatura kaj arta laboro de la armeo estas pli aŭ malpli influita de la nigra linio. Krome, da kreivaj laborantoj vere kompetentaj ni elkulturis ankoraŭ kompare malmulte. La problemoj en krea ideo restas ankoraŭ multaj, kaj la vicoj estas ankoraŭ ne tre puraj. Ni devas nepre analizi kaj solvi tiujn problemojn konvene.

(4) La Liberiga Armeo devas ludi gravan rolon en la socialisma kultura revolucio. Depost kiam kamarado Lin Biao komencis estri la laboron de la Komisiono pri Militaj Aferoj, li dediĉis grandan atenton al la literatura kaj arta laboro kaj donis multajn tre korektajn instrukciojn. La Rezolucio pri Plifortigo de Politika kaj Ideologia Laboro en la Armeo akceptita de la Plivastigita Sesio de la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPC klare difinis la taskon de la literatura kaj arta laboro en la armeo jene: "Necesas servi al la starigo de la proleta ideologio kaj elimino de la burĝa ideologio kaj al la plifirmigo kaj altigo de batalforto en strikta ligo kun la taskoj kaj la ideologia stato de la armeo." En la armeo jam estas kerno de literaturaj kaj artaj laborantoj, kulturitaj de ni mem kaj harditaj en revoluciaj militoj. Ankaŭ nombro da bonaj verkoj estas produktitaj en la armeo. Tial, en la socialisma kultura revolucio, la Liberiga Armeo devas nepre ludi sian rolon ludendan kaj batali brave kaj senŝanceliĝe por komplete efektivi la politikon — literaturo kaj arto en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj en servo al socialismo.

(5) En la kultura revolucio devas esti kaj detrui kaj starigo, kaj gvidantoj devas persone preni la aferon en la mano kaj starigi bonajn modelojn. La burĝaro havas sian reakcian "Monologo pri Kreado de Novo", ankaŭ ni devas starigi novon kaj krei originalaĵon, nome, la novon de socialismo kaj la originalaĵon de la proletaro. Ni klopodu krei heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj tio estas la baza tasko de socialismaj literaturo kaj arto. Nur kiam ni havas tiajn modelojn kaj sukcesan sperton en tio, ni povos konvinki aliajn kaj firme okupi la poziciojn kaj forbati la bastonon el la manoj de la reakciuloj.

Pri tiu ĉi problemo, ni devas senti fieron sed ne malsuperecon.

Disrompu la blindan kredon al la tiel nomataj literaturo kaj arto de la tridekaj jaroj. Tiam la literatura kaj arta movado de la maldekstra alo sekvis politike la “maldekstran” oportunisman linion de Vang Ming kaj organize por-
dofermismon kaj sektismon, kaj ĝiaj ideoj pri literaturo kaj arto fakte estis tiuj de rusaj burĝaj literaturaj kaj artaj kritikistoj, nome, Belinskij, Ĉerniŝevskij kaj Dobroljubov, kaj de Stanislavskij en la teatra kampo. Ili ĉiuj estis burĝaj demokratoj de la carisma Rusio, kaj iliaj ideoj ne estis marksismaj, sed burĝaj. La burĝa demokratia revolucio estas revolucio, en kiu unu ekspluatanta klaso estas anstataŭata de alia, kaj nur la proleta socialisma revolucio estas revolucio, kiu eliminas fine ĉiujn ekspluatantajn klasojn. Tial, ni absolute ne povas preni la ideojn de iu ajn burĝa revolucio kiel la gvidajn principojn por nia proleta movado en ideologio aŭ en literaturo kaj arto. Estis bonaĵo ankaŭ en la tridekaj jaroj, nome la batalanta literatura kaj arta movado de la maldekstra alo estrata de Lusin. Ĉirkaŭ la mezo de la tridekaj jaroj, sub la influo de la dekstra kapitulacisma linio de Vang Ming, iuj gvidantoj de la maldekstra alo deviiis de la marksism-leninisma klasa vidpunkto kaj elmetis la devizon “nacidefenda literaturo”. Tiu ĉi devizo estis burĝa, kaj la proleta devizo “amasa literaturo de la nacia revolucia milito” ja estis elmetita de Lusin. Iuj literaturaj kaj artaj laborantoj de la maldekstra alo, precipe Lusin, ankaŭ elmetis la devizojn ke literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj kaj kamparanoj, kaj ke la laboristoj kaj kamparanoj mem kreu siajn literaturon kaj arton, sed ili ne solvis sisteme la fundamentan problemon de la ligo de literaturo kaj arto kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La plejparto de ili estis burĝaj naciistoj-demokratoj. Iuj el ili ne povis trapasi eĉ la provon de la demokratia revolucio, kaj aliaj ne bone sukcesis en la provo de socialismo.

Estas necese likvidi la blindan kredon al la klasika literaturo en- kaj ekster-landa. Stalin estas granda marksist-leninisto, lia kritiko kontraŭ la literaturo kaj arto de burĝaj modernistoj estis tre akra, sed li senkritike heredis la t. n. klasikajn verkojn de Rusio kaj Eŭropo, kaj tio

alportis malbonan rezulton. La klasikaj literaturo kaj arto de Ĉinio kaj Eŭropo (inkluzive Rusion), kaj eĉ usonaj filmoj havas ja ne malgrandan influon al la literatura kaj arta rondoj de nia lando, kaj iuj rigardis ilin simple kiel biblion kaj akceptis ilin en ilia tuto. Ni devas preni lecionon el la sperto de Stalin. Ankaŭ verkojn de antikvuloj kaj fremduloj ni devas studi, kaj rifuzi ilin studi estas eraro, tamen ni devas kritike studi ilin por servi la antikvajn al la nuntempo kaj la fremdlandajn al Ĉinio.

Koncerne al la kompare bonaj revoluciaj literaturaj kaj artaj verkoj de Sovetunio, aperintaj post la Oktobra Revolucio, ankaŭ ilin ni devas analizi kaj ne blinde adori, des pli ne blinde imiti. Blinda imito ne povas taŭgi kiel arto. Literaturo kaj arto devenas nur de la vivo de la popolo, kaj nur la vivo de la popolo estas la unika fonto de literaturo kaj arto. Tion pruvas la historia procedo de literaturo kaj arto antikvaj kaj nuntempaj, en- kaj eksterlandaj.

La novaj fortoj en la mondo de ĉiam venkas la putrintajn. Ankaŭ nia Popola Liberiga Armeo estis malforta kaj malgranda je la komenco, sed fine ĝi fariĝis forta kaj venkis la reakciulojn usonajn kaj Ĉiang-Kajŝek-ajn. Fronte al la tre favora revolucia situacio en- kaj ekster-landa kaj la gloraj taskoj, ni devas fieri pro tio, ke ni estas cent-pocentaj revoluciuloj. Ni devas esti memfidaj kaj kuraĝaj fari kion neniam faris la antaŭuloj, ĉar nia revolucio estas tiu por fine elimini la ekspluatantajn klasojn kaj la ekspluatajn reĝimojn kaj radikale forigi ĉiajn ideologiojn de la ekspluatantaj klasoj, kiuj toksas la popolamasojn. Sub la gvidado de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj direktado de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, ni devas krei novajn socialismajn revoluciajn literaturon kaj arton indajn al niaj granda lando, granda partio, granda popolo kaj granda armeo. Tio estos la plej brilaj novaj literaturo kaj arto, malfermantaj novan eraon en la homa historio.

Tamen, estas ne facile krei bonajn modelojn. Strategie ni nepre devas malestimi la malfacilojn en kreado, sed taktike ni devas ilin trakti serioze. Kreo de bona verko estas penplena procezo, kaj la gvidantaj kamaradoj, kiuj zorgas pri krea laboro, ne devas preni burokratan aŭ malzorgeman sintenon, sed devas dividi

ĝojon kaj malfacilon kun la verkistoj kaj labori vere peneme. Oni devas posedi plejeble unuamanan materialon, kaj se neeble, do posedi almenaŭ la duamanan. Ne timu malsukcesojn aŭ erarojn. Oni devas permesi malsukcesojn kaj erarojn kaj ankaŭ korektadon de eraroj. Oni devas apogi sin sur la amasoj, sekvas la linion “veni de la amasoj kaj iri al la amasoj” kaj klopodi por atingi la unuecon de revolucia politika enhavo kun kiel eble plej perfekta arta formo per longtempa, ripetada praktikado kaj penado en strebo al plej alta nivelo. Estas neceso ĝustatempe resumi sperton en la praktikado kaj iom post iom koni la leĝojn de diversaj artoj. Alie oni ne povos starigi bonajn modelojn.

Ni devas plene atenti temojn pri la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj neglekti tion estas tute erare.

Urgaj kaj energiaj klopodoj devas esti farataj por krei literaturajn kaj artajn verkojn pri la tri grandaj kampanjoj en la regionoj de Liaŭhi-Senjang, Huajhaj kaj Bejping-Tiagin kaj aliaj gravaj kampanjoj, dum la kamaradoj kiuj gvidis kaj direktis tiujn kampanjojn ankoraŭ vivas sane. Estas multaj gravaj revoluciaj temoj, historiaj kaj aktualaj, kiuj urĝe bezonas, ke ni organizu verkadon laŭplane kaj sisteme. Nepre faru bone la filmon *La Granda Muro sur la Suda Maro*, kaj nepre sukcesigu la reviziadon de la filmo *Trans Miloj kaj Miloj da Montoj kaj Riveroj*. Kaj pere de tiuj laboroj, kernaj vicoj da vere proletaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas esti eltrejnitaj kaj elharditaj.

(6) En la literatura kaj arta laboro, ĉiuj, ĉu gvidantoj ĉu verkantoj, devas praktiki la demokratian centralizismon de la Partio, pledi por “decido laŭ la voĉoj de multaj” kaj oponi kontraŭ “decido laŭ la voĉo de unu sola persono”. Ni devas sekvi la amasan linion. Antaŭe, produktinte iun verkon, iuj tuj trudpetis la gvidantojn aplaŭdi kaj jesi. Tio estas tre malbona agmaniero. Por la kadroj kiuj okupiĝas pri la gvidado de la kreado de literaturo kaj arto, du punktoj devas esti ĉiam memorataj en ilia laboro: unue, estu bonaj aŭskultantoj de la opinioj de la vastaj amasoj; due, estu bonaj analizantoj de tiuj opinioj, akceptu la pravajn kaj rifuzu la malpravajn. Ne ekzistas verko tute sendifekta. Se nur la fundamento de iu verko estas bona, oni devas montri ĝiajn man-

kojn kaj erarojn por ĝin bonigi. Ne kaŝu malbonajn verkojn, sed ilin prezentu al la amasoj por ke la amasoj kritiku ilin. Ni ne devas timi la amasojn, sed firme fidi ilin, ĉar ili povas doni al ni multajn valorajn konsilojn. Krome, tio ankaŭ povas altigi ilian kapablon de distingado. Oni devas elspezi centmilojn aŭ eĉ pli ol milionon da juanoj por produkti unu filmon. Kaŝado de malbona filmo signifas vanan malŝparon. Kial ne prezentu ĝin por eduki la verkintojn kaj popolamasojn kaj kovri la financajn perdojn de la ŝtato, tiel ke estu atingita bona rikolto en ideologio kaj ekonomio? La filmo *Sieĝita Urbo* estis prezentata dum longe, sed neniuj ĝin kritikis. Ĉu la ĵurnalo *Jiefangjun Bao* (Liberiga Armeo) ne povus aperigi artikolon por ĝin kritiki?

(7) Ni devas kuraĝigi revolucion kaj batalan literaturan kaj artan kritikon de la amasoj, por disrompi la monopolon en kritiko de literaturo kaj arto de malmultaj tiel nomataj “kritikistoj” (t. e. la kritikistoj, kiuj estas eraraj en direkto kaj senfortaj en kritiko). Ni devas meti la armilon de kritiko de literaturo kaj arto en la manojn de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj kombini profesiajn kritikistojn kun kritikistoj el la amasoj. Ni devas plifortigi la batalecon en la kritikado de literaturo kaj arto, kaj oponi senprincipan trivialan flatadon. Ni devas reformi la stilon de verkado, kuraĝigi skribadon de mallongaj popularaj artikoloj, fari la kritikon de literaturo kaj arto ponardoj kaj mangrenadoj kaj lertiĝi por uzi ilin en proksima batalo. Kompreneble, ni devas ankaŭ skribi sisteme pli longajn artikolojn kun teoria profundeco. Ni oponas kontraŭ imponado per uzo de fakaj terminoj. Nur tiamaniere ni povos malarmi la tiel nomatajn “kritikistojn de literaturo kaj arto”. *Jiefangjun Bao* kaj *Jiefangjun Wenyi* (Literaturo kaj Arto de la Liberiga Armeo) devas malfermi specialan rubrikon periodan aŭ neregulan, destinitan por literatura kaj arta recenzado. Ni devas varme subteni bonajn aŭ fundamente bonajn verkojn kaj bonintence montri iliajn mankojn, dum al la malbonaj ni devas fari principan kritikon. En la teoria kampo, ni devas laŭplane fari ĝisfundan kritikon kontraŭ la tipaj eraraj tezoj pri literaturo kaj arto kaj kontraŭ la agoj de tiuj, kiuj provante glorigi sin, falsis la his-

torion en verkoj kiaj *Historio pri la Disvolviĝo de la Ĉina Filmo*, *Kolekto de Materialoj pri la Ĉina Drammovado en la Lastaj 50 jaroj* kaj *Unua Esploro pri la Repertuaro de la Pekina Opero*, kaj kontraŭ la eraraj tezoj, kiujn ili disvastigas en tiuj verkoj. Ni ne timu, ke iuj riproĉos nin kiel “bastonon”. Kiam iuj riproĉas nin pri trosimpligo kaj krudeco, ni devas fari analizon. Iuj el niaj kritikoj estas fundamente korektaj, sed ne sufiĉe konvinkaj, ĉar la analizoj kaj argumentoj estas nesufiĉaj, do devas esti plibonigitaj. Ĉe iuj riproĉantoj la problemoj estas tiu de kompreno: komence ili riproĉas nin pri trosimpligo kaj krudeco, sed poste ili ne plu faras tion. Sed kiam malamikoj riproĉas niajn korektajn kritikojn kiel trosimplajn kaj krudajn ni nepre devas firme refuti ilin. Literatura kaj arta kritiko devas fariĝi konstanta laboro kaj grava metodo por disvolvi batalon en la kampo de literaturo kaj arto, kaj ĝi estas ankaŭ grava metodo por la Partio en la gvidado de la literatura kaj arta laboro. Sen korekta literatura kaj arta kritiko estas neeble prosperigi la verkadon.

(8) En la batalo kontraŭ fremdlanda reviziismo en la literatura kaj arta kampo, ni devas kapti ne nur malgrandajn personojn kia Ĉuĥraj. Ni devas kapti la grandajn, kia Ŝoloĥov, kaj havi kuraĝon karamboli kun li. Li estas la fondinto de la reviziismaj literaturo kaj arto. Liaj *Kvieta Don*, *Plugita Virga Tero* kaj *La Sorto de Unu Homo* havas grandan influon al nombro da verkistoj kaj legantoj en Ĉinio. Ĉu la armeo ne povus organizi homojn por ilin studi kaj skribi kritikajn artikolojn, sufiĉe konvinkajn kaj kun bone argumentita analizo? Tio havos profundan influon kaj al Ĉinio kaj al la ceteraj partoj de la mondo. Ni devas same tiel fari pri la similaj verkoj enlandaj.

(9) Koncerne al la metodo de verkado, ni devas apliki tiun de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantiko, kaj ne devas apliki burĝan kritikan realismon kaj burĝan romantikon.

La bonaj kvalitoj de la herooj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj amase aperas sub la gvido de la korekta linio de la Partio, estas koncentra manifestiĝo de la klasa karaktero de la proletaro. Ni devas plenenergie kaj ĉiurimede krei heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ni devas krei

tipajn karakterojn. Prezidanto Maŭ diris: **“La vivo spegulita en literaturaj kaj artaj verkoj, kompare kun la ordinara reala vivo, povas kaj devas esti pli alta, pli intensa, pli koncentrita, pli tipa, pli ideala kaj sekve kun pli da universal-eco.”** Ni ne devas limigi nin en realaj personoj kaj realaj eventoj. Ni ne devas priskribi heroon laŭvice nur post lia morto; fakte, vivantaj herooj estas pli multaj ol la mortintaj. Tio signifas, ke niaj verkistoj devas koncentri kaj resumi sperton el la reala vivo longtempe akumulitan por krei diversajn tipajn karakterojn.

En priskribado de revoluciaj militoj, ni devas unue havi klaran ideon pri ilia naturo: ni estas justaj kaj la malamikoj estas maljustaj. Niaj verkoj nepre devas speguli niajn penplenajn bataladon kaj heroajn sinoferojn, sed ankaŭ la revolucion heroismon kaj revolucion optimismon. En priskribado de la krueleco de milito, ni ne devas tro kolorigi aŭ prikanti ĝian terurecon; en priskribado de la malfacileco de la revolucia batalo, ni ne devas tro kolorigi aŭ prikanti la koncernajn suferojn. La krueleco de revolucia milito kaj revolucia heroismo, la malfacileco de revolucia batalo kaj revolucia optimismo estas ambaŭ unuigo de kontraŭaĵoj, sed ni nepre devas klare scii, kiu estas la ĉefa flanko de la kontraŭdiro; alie, se ni faros eraron en tio, aperos la tendenco de burĝa pacifismo. Krom tio, en priskribado de popola revolucia milito, ĉu en la periodo kiam gerila milito okupis la ĉefan lokon kaj movada milito la helpan, ĉu en la periodo kiam movada milito okupis la ĉefan lokon, oni devas korekte speguli la rilaton inter la regula armeo, la gerilaj trupoj kaj la milico kaj la rilaton inter la armitaj amasoj kaj la nearmitaj amasoj sub la gvido de la Partio.

Rilate al elektado de subjektomaterialo, oni povas fari la elekton konvene kaj ĝuste nur se oni profundigas en la vivon kaj bone faras enketojn kaj esploradon. Scenaristoj devas longtempe, senrezerve profundigi en la bolantan batalan vivon. Ankaŭ reĝisoroj, aktoroj, film-fotistoj, belartistoj kaj komponistoj devas profundigi en la vivon kaj bone fari enketojn kaj esploradon. En la pasinteco, iuj verkoj distordis la historiajn faktojn, spegulis ne la korektan linion, sed nur malkorektajn liniojn; iuj verkoj priskribis heroajn personojn, kiuj tamen estis senescepte malobservantoj

de disciplino, aŭ kreis heroajn figurojn, sed lasis ilin morti, intence fabrikante tragedian finon; iuj verkoj priskribis ne heroajn personojn, sed nur mezajn personojn, kiuj fakte estis positiĝintoj, kripligante figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj; en priskribado de malamikoj ili ne malkaŝis ilian klasan naturon de ekspluatado kaj subpremado al la popolo, sed eĉ beligis ilin; ankoraŭ aliaj verkoj okupiĝis nur pri amo kaj aliaj filistraj interesoj, asertante ke “amo” kaj “morto” estas eternaj temoj. Ĉiujn ĉi tiujn burĝajn kaj reviziismajn aferojn ni devas firme oponi.

(10) Reeduko de la kadroj sinokupantaj pri literaturo kaj arto kaj reorganizo de la vicaro de literaturaj kaj artaj laborantoj. Pro historiaj kaŭzoj, antaŭ la liberiĝo de la tuta lando, estis iom malfacile por ni proletaro kulturi niajn proprajn laborantojn de literaturo kaj arto sub la regado de la malamikoj. Nia kultura nivelo estis kompare malalta kaj nia sperto estis kompare ne sufiĉe riĉa. Multaj el niaj laborantoj de literaturo kaj arto ricevis burĝan edukon. En sia revolucia literatura kaj arta aktivado, iuj perfidis nian aferon, ne povante elteni la persekutadon de la malamiko, aŭ putriĝis, ne povante rezisti la korodon de burĝa ideo. En la bazlokoj ni kulturis konsiderindan nombron da revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj, precipe post la publikigo de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, ili ekhavis ĝustan direkton, suriris la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ludis pozitivan rolon en la revolucio. La manko estis tio, ke post la Liberiĝo de la tuta lando, enirinte en grandajn urbojn, multaj kamaradoj ne sukcesis rezisti la korodon de la burĝa ideo al nia vicaro de literaturaj kaj artaj laborantoj kaj postlasiĝis dum la antaŭenmarŝo. Niaj literaturo kaj arto estas tiuj de la proletaro, de la Partio. La principo de proleta partia spirito estas la plej okulfrapa trajto, per kiu ni distingiĝas de aliaj klasoj. Oni sciu, ke ankaŭ reprezentantoj de aliaj klasoj havas sian principon de partia spirito

kaj ĝi estas eĉ tre obstina. Ni ĉiam devas persisti ĉe la principo de proleta partia spirito kaj rezisti la korodon de burĝa ideo, ĉu en kreada penso, en organiza linio aŭ en labora stilo. Ni nepre devas streki klaran limlinion disde la burĝa ideologio kaj absolute ne povas pace kunekzisti kun ĝi. Por la plejparto, la diversaj problemoj ekzistantaj en la literatura kaj arta rondoj estas tiuj de ideologia kompreno kaj de altigo de tiu kompreno per edukado. Ni devas serioze studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, studi kaj apliki ilin kreive, studi ilin en ligo kun niaj propraj penso kaj praktiko, kaj kun solvendaj demandoj en la kapo. Nur tiamaniere ni povos vere kompreni, plene posedi kaj mastri la penson de Prezidanto Maŭ. Ni devas longtempe profundigi en la vivon, kombiniĝi kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, altigi nian klasan konscion, remuldi nian ideologion, tutanime kaj tutkore servi al la popolo sen ajna konsidero pri persona famiĝo aŭ profito. Instruu al niaj kamaradoj, ke dum la tuta vivo ili studu marksism-leninismen kaj la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj daŭre restu revoluciuloj. Oni devas doni apartan atenton al la konservo de integreco de proleta virto en sia lasta vivparto, kio tute ne estas facila afero.

III

Dank' al la kunsido, ni akiris kompare pli klaran kaj pli precizan ideon pri la supre ditaj problemoj, kaj niaj opinioj pri tiuj problemoj ĉiuj konformas al la realo de la literatura kaj arta laboro en la armeo. Sekve nia politika konscio estas plialtigita, kaj niaj decidemo kaj sento de respondeco por konduki la socialisman kulturen revolucion estas plifortigitaj. Ni certe bone studos plu la verkojn de Prezidanto Maŭ, serioze enketos kaj esploros, bone kulturos eksperimentajn kampojn, bone starigos modelojn kaj donos bonan ekzemplon por stimuli la aliajn en la batalo de kultura revolucio por starigo de proleta ideologio kaj forigo de burĝa ideologio.

Pri la Revolucio de la Pekina Opero

— Parolado en la Kunsido de Partoprenantoj en la Interlerna
Prezentado de Modernaj Pekinaj Operejoj en Julio 1964

GIANG KING

Mi esprimas gratulon al tiu ĉi prezentado. Vi faris multege da laboroj. Tio ĉi estas la unua kampanjo en la revolucio de la pekina opero, ĝi jam akiris ĝojindan rikolton, kaj ankaŭ ĝia influo estos konsiderinde profunda.

Prezentado de revoluciaj modernaj pekinaj operejoj jam komenciĝis. Sed, ĉu ĉiuj jam nun havas saman ideon pri tio? Mi opinias, ke oni ankoraŭ ne povas tiel diri.

Oni devas havi firman memfidon pri la enkonduko de nuntempaj revoluciaj temoj

en la pekinan operon. Neimagebla estas tio, ke kiuj okupas ĉefajn poziciojn sur la scenejo de nia socialisma patrio sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ne estas laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj — veraj kreantoj de la historio kaj veraj mastroj de la lando. Ni devas krei literaturon kaj arton, kiuj protektas nian socialisman ekonomian bazon. Kiam la direkto ne estas klara, ni devas bone orienti nin. Por via referenco, ĉi tie mi citu al vi du ciferojn, kiuj estas animskvaj por mi.

*Jang Zifong vizitas mizerulojn en profunda montaro — sceno el la
revolucia moderna pekina opero Sagaca Kapto de la Tigra Monto.*





La persekuta taĉmento venke marŝas antaŭen sub la komando de Ŝaŭ Gianbo, la stabestro de iu regimento de PLA — sceno el la revolucia moderna pekina opero Sagaca Kapto de la Tigra Monto.

La unua: en la tuta lando, laŭ nepreciza statistiko, estas 3,000 teatraj trupoj (ekskluzive de la amatoraj, por ne paroli pri la nigraj), el kiuj ĉirkaŭ 90 estas profesiaj trupoj de dialogaj dramoj, pli ol 80 estas ensembloj por diversaj artaj prezentoj kaj la ceteraj pli ol 2,800 estas tradiciaj operaj trupoj de diversaj specoj. Sur la scenejo de tradiciaj operoj, la herooj estas senescepte imperiestroj, princoj, generaloj aŭ ministroj, inteligentaj sinjoridoj aŭ belaj sinjoridinoj, kaj krome, estas ankaŭ diversaj demonoj kaj diabloj. El tiuj pli ol 90 teatraj trupoj de dialogaj dramoj ne ĉiuj surscenigas laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, sed dramojn “unue grandtipajn, due eksterlandajn kaj trie antikvajn”, kaj sekve oni povas diri, ke ankaŭ la scenejo de dialoga dramo estas okupita de ĉinaj kaj eksterlandaj antikvuloj. La teatro devas esti loko por eduki la popolon, sed nun sur la scenejo prezentiĝas sole imperiestroj, princoj, generaloj kaj ministroj, inteligentaj sinjoridoj kaj belaj sinjoridinoj kaj aferoj de feŭdismo kaj aferoj

de la burĝaro. En tia stato, nia ekonomia bazo ne povas esti protektata, sed detruata.

La dua: en nia lando estas sescent kaj kelkdek milionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj krome estas plenmano da bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj, destrukuloj kaj burĝaj elementoj. Ĉu oni servu al tiu plenmano, aŭ al la sescent kaj kelkdek milionoj? Pri tiu ĉi demando devas pensi ne nur la komunistoj sed ankaŭ ĉiuj literaturaj kaj artaj laborantoj kun patriotisma ideo. La artistoj manĝas grenojn produktitajn de la kamparanoj, sinvestas per vestoj faritaj kaj loĝas en domoj konstruitaj de la laboristoj, kaj vivas sub la protekto de la Popola Liberiga Armeo, kiu gardas la naci-defendajn frontojn, sed la artistoj ne prezentas ilin sur la scenejo. Respondu, sur la starpunkto de kiu klaso vi artistoj staras, kaj kie estas via artista “konscienco”, kiun vi ofte priparolas!

Retroiroj povos okazi en la afero de enkondukado de nuntempaj revoluciaj temoj



La portistoj sentime amas Prezidanton Maŭ —sceno el la revolucia moderna pekina opero La Haveno.

en la pekinan operon. Sed, se ni bone pri- pensos tiujn du ciferojn supremenciitajn, re- troiroj eble ne okazos, aŭ okazos nur mal- multe. Tamen ne gravas, eĉ se okazos re- troiro, ĉar la historio ĉiam progresas laŭ zigzaga vojo, sed la rado de historio estas absolute nereturnebla. Ni disvastigas tea- traĵojn kun nuntempaj revoluciaj temoj por speguli la realan vivon de la pasintaj 15 jaroj depost la fondiĝo de nia respubliko kaj krei sur nia scenejo de tradiciaj operoj figurojn de nuntempaj revoluciaj herooj. Tio estas la primare grava tasko. Tio tamen ne signifas, ke ni ne volas operojn kun historiaj temoj. En tiu ĉi interlerna prezentado la revoluciaj teatraĵoj kun historiaj temoj ja okupas ne malgrandan procenton. Ankoraŭ dezirataj es- tas tiaj historiaj teatraĵoj, kiuj priskribas la vivon kaj batalon de la popolo antaŭ la fondiĝo de nia partio, kaj tiurilate ni devas ankaŭ starigi modelojn kaj verki historiajn teatraĵojn, kiuj estas skribitaj el la vidpunkto de vera historia materiismo, kaj en kiuj la antikva estas utiligata por la interesoj nuntempaj.

Kompreneble ni devas produkti historiajn teatraĵojn sub la premiso, ke tio ne malhelpos la ĉefan taskon, prezentadon de la nuntempa vivo kaj kreadon de figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ankaŭ ne ĉiuj tra- diciaj teatraĵoj estas nedezirataj. Bonajn tra- diciajn teatraĵojn oni povas laŭeble prezenti, escepte de tiuj kiuj temas pri fantomoj aŭ prikantas kapitulacon aŭ perfidon. Sed tiuj tradiciaj teatraĵoj ne povos altiri al si rigardan- tojn, se ili ne estos serioze reordigitaj kaj prilaboritaj. Dum pli ol du jaroj mi sisteme okupiĝis pri teatroj kaj observis la ludantojn kaj rigardantojn, kaj povas veni al tiu kon- kludo, ke la tradiciaj operoj ne havigos al si rigardantojn, se ili ne estos serioze pri- laboritaj. En la venonta tempo, la reordigo kaj prilaboro de tradiciaj teatraĵoj estos an- koraŭ necesaj, sed tio ne devas anstataŭi la unuan taskon.

Due, mi volas paroli pri la demando, de kie ni komencu la laboron.

Mi opinias, ke la ŝlosilo kuŝas en la dramoj. Sen dramoj, la reĝisoroj kaj ludantoj povas fari nenion. Oni diras: "La dramo estas la bazo de dramludo". Tio estas vera, kaj tial oni nepre devas bone zorgi la dramverkadon.

Dum la lastaj jaroj, la verkado de dramoj restas fore malantaŭ la aktualajoj, por ne paroli pri tiu de la pekina opero. Malmultaj estas la verkistoj de dramoj kaj krome mankas al ili vivspertoj. Rezulte de tio kompreneble ne povas produktiĝi bonaj teatraj verkoj. La ŝlosilo por la prosperigo de dramverkado estas la kombino de la trio — gvidantoj, profesiuloj kaj amaso. Antaŭ nelonge mi studis la sperton en la verkado de *La Granda Muro de la Suda Maro*. Oni laboris en la jena maniero: Unue la gvidantoj difinis la temon, kaj poste la verkantoj trifoje iris sperti la vivon kaj persone partoprenis unu militan agadon por ekstermi spionojn de la malamiko. Kiam la teatra verko estis finita, multaj respondeculoj de la garnizono en Kantono persone partoprenis diskutadon pri ĝi. Post kiam la teatraĵo estis provludita, oni faris vastan enketon pri la opinioj de la rigardintoj kaj ĝin reviziis denove. Tiamaniere, oni senĉese enketis pri opinioj, senĉese reviziis la verkon, kaj sukcesis produkti, en relative mallonga tempo, bonan teatraĵon, kiu ĝusttempe spegulis la aktualan batalon.

En la Urba Partia Komitato de Ŝanhajo, k-do Ke Kingŝi persone zorgis la laboron pri verkado. La organizoj de diversaj lokoj devas asigni al kapablaj funkciuloj la taskon de zorgo pri tiu laboro.

Estas tre malfacile rekte krei dramojn por la pekina opero en la proksima tempo. Sed oni devas jam nun elekti personojn por unue ricevi specialan trejnadon kaj poste iri malsupren por sperti vivon. Oni povas unue verki malgrandajn teatrajn verkojn kaj poste, paŝo post paŝo, grandajn. Estas tre bone ankaŭ, se oni sukcesos krei bonajn, malgrandajn teatraĵojn.

En la kampo de verkado, novaj fortoj devas esti kulturataj; kaj se oni sendos ilin malsupren por sperti vivon, ili fruktodonos post 3-5 jaroj.

La alia vojo estas transplantado. Ankaŭ tio estas bona.

Oni devas tre singarde fari elekton en transplantado de teatra verko. Unue, oni konsideru, ĉu ĝi havas bonan politikan tendencon kaj due, ĉu ĝi konformas al la kondiĉoj de la propra trupo. Dum transplantado oni devas zorgeme analizi la originalon, konfirmi ĝiajn bonajn flankojn kaj ne ŝanĝi ilin; kaj ĝiajn malfortaĵojn oni devas ripari. Pri dramo adaptita al pekina opero, oni devas atenti la jenajn du flankojn: unuflanke, la verko fariĝu konforma al la karakterizaĵoj de la pekina opero kaj enhavu kantadon kaj akrobataĵojn figurantan lukton, la tekstoj de la kantoj estu konformaj al la reguloj de la kantado de la pekina opero kaj en la lingvaĵo de la pekina opero, alie la aktoroj ne povos ilin kanti. Aliflanke, oni ne devas tro multe cedi al la personaj konsideroj de la aktoroj, kaj la teatra verko devas havi siajn klaran temon, kompaktan strukturon kaj reliefigitajn figurojn, por ke la tuta teatraĵo ne estu malkompaktigita per tia aranĝo ke ĉiu el la ĉefaj aktoroj havas sian parton en la prezentado.

La arto de la pekina opero uzas la rimedon de troigo, kaj krome kutime prezentas figurojn el malnovaj tempoj, tial estas pli facile por ĝi prezenti negativajn figurojn, kaj troviĝas personoj, kiuj aprezas tion. Estas tre malfacile starigi pozitivajn figurojn, sed ni nepre devas starigi figurojn de antaŭirantaj, revoluciaj herooj. En *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, pekina opero kreita de Ŝanhajo, la negativaj figuroj estis origine prezentitaj tre arogantaj, dum la pozitivaj figuroj montriĝis sensukaj. Dank' al la persona prizorgo de gvidantoj el la supera instanco, tiu opero estis nedisputeble plibonigita. Nun unu sceno pri la spiono sin kaŝanta en iu templo estas forigita el la teatraĵo, kaj la parto, kiu prezentas la Montan Aglon, restas fundamente neŝanĝita (la aktoro, kiu ludas la rolon de Monta Aglo, estas tre lerta en prezentado); sed rezulte de la elstarigo de la pozitivaj figuroj de Jang Zijong kaj Ŝaŭ Gianbo, la negativaj figuroj jam fariĝis relative neokulfrapaj. Mi aŭdis, ke troviĝas malsamaj opinioj pri tiu opero. Oni povas fari diskuton pri tio. Estas necese pripensi, sur kiu flanko oni devas stari. Ĉu

sur la flanko de la pozitivaj figuroj, aŭ sur la flanko de la negativaj figuroj? Mi aŭdis, ke estas ankaŭ homoj, kiuj oponas la prikskribon de pozitivaj figuroj. Tio estas malprava. La bonaj homoj ĉiam konsistigas la plejparton de la loĝantaro. Tio estas vera ne nur en nia socialisma lando, sed eĉ en la imperiismaj landoj la plejparto estas laboranta popolo. Kaj ankaŭ en la reviziismaj landoj, la reviziistoj konsistigas nur malgrandan parton. Ni devas ĉefe krei artajn figurojn de antaŭirantaj revoluciuloj por eduki kaj kuraĝigi la aliajn kaj instigi ilin ĉiujn marŝi antaŭen. Ni produktas operojn kun modernaj revoluciaj temoj ĉefe por prikanti la pozitivajn figurojn. *Heroaj Fratinetoj de la Stepo*, prezentita de la Pekinopera Trupo de la Arta Teatro de Interna Mongolio, estas tre bona. La modela agado de la du junaj heroinoj ekscitis la revoluciajn sentojn de la verkisto, kaj li verkis tiun dramon, kies meza parto estas tre emocia. Sed pro tio, ke mankis al la verkisto koncerna vivsperto, kaj ke li hastis en sia laboro, kaj ne havas tempon por polurado, la komenco kaj la fino ne estas tre bone ellaboritaj, tiel ke nun ĝi aspektas kvazaŭ

bona pentraĵo enmetita en krudan, malnovan kadron. Tiu opero estas krome atentinda en tio, ke la verkisto produktis pekinan operon por niaj geknaboj. Ĝeneraldire, tiu opero havas certagrade bazon kaj estas bona. Mi esperas, ke la verkisto denove profundigu en la vivon por solide ĝin plibonigi. Mi pensas, ke ni devas estimi nian faritan laboron kaj ne facilanime forlasi kion ni jam produktis. Por iuj kamaradoj kiuj ne volas rebonigi siajn produktaĵojn, estas tre malfacile akiri relative grandan atingon. Ĉirilate, ŝanhajaj kamaradoj donis bonan ekzemplon. Ili volonte faris plibonigojn foje post foje, sekve ili sukcesis fari la operon *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* kia ĝi hodiaŭ estas. Reveninte hejmen oni devas plue prilabori la operojn, kiuj estis luditaj en tiu ĉi interlerna prezentado. Ne faligu facilanime tiujn, kiuj jam estas starigitaj.

Fine, mi esperas, ke vi ĉiuj dediĉu iom da energio por lerni la ludaĵojn unu de alia, por ke la rikoltoj de tiu ĉi kunveno prezentiĝu sur la scenejoj tra la tuta lando al la vastaj spektantaroj en diversaj lokoj.

Dank' al la ŝirmo de kamaradoj, Li Tiemej (meze) sukcese sendis la ĉifron al la gerila taĉmento sur la Norda Monto — sceno el La Ruĝa Signal-lanterno.





La plotonestro Jang Vejcaj (la tria de dekstre en la fronto) recitas eldiraĵon de Prezidanto Maŭ kune kun la batalantoj de la bajoneta subploto de Ĉinaj Popolaj Volontuloj antaŭ ilia ekiro — sceno el la revolucia moderna pekina opero Surprizatako kontraŭ la Blank-tigra Regimento.

Bofratino Aking (maldekstre) luktas saĝe kontraŭ Diaŭ Deji (meze), la stabestro de la malamika trupo — sceno el la revolucia moderna pekina opero Ŝagiabang.





Jang Vejcaj heroe batalas kontraŭ la malamikoj — sceno el la revolucia moderna pekina opero Surprizatako kontraŭ la Blank-tigra Regimento.

Guo Gianguang, politika direktanto de la Nova Kvara Armeo, kuraĝigas la vunditajn kaj malsanajn soldatojn al persista batalado — sceno el la revolucia moderna pekina opero Ŝagiabang.



*Malfermiĝis en Pekino la
Foto-ekspozicio “Prezidanto Maŭ
Estas la Ruĝa
Suno en Nia Koro”*



Kun senlima respekto al Prezidanto Maŭ, la heroaj popoloj de suda Vjetnamio rigardas la Foto-ekspozicion.



Japanaj geamikoj varme amas Prezidanton Maŭ. Ili diras: "Prezidanto Maŭ estas kvazaŭ suno. Kie ĝi radias, tie lumo regas. Kiam ni havas la ruĝan sunon en nia koro, ekklaras al ni la direkto de batalo kaj kreskas al ni forto por revolucio."



Maŭ Zedong, vi estas granda direktilisto kiu kondukas nin ĉiam antaŭen. Vi instruas al ni: "El la pafilo venas ŝtatpotenco." Ni ekprenos pafilon kaj faros ribelon kontraŭ imperiismo kaj koloniismo kaj plene frakasos la malnovan mondon.

POR celebri la 25-an datrevenon de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, solene inaŭguriĝis en majo ĉi-jare en la Ĉina Belarta Domo, Pekino, la fotoekspozicio "Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro", kiu konsistas el grandformataj fotoj pri Prezidanto Maŭ.

En la antaŭparolo de tiu ekspozicio estas citita la

trafa diro de Vicprezidanto Lin Biao: "Kamarado Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko. Kamarado Maŭ Zedong genie, kreive kaj plenamekse heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismmon, kaj levis ĝin al tute nova stadio."

En tiu ekspozicio, kiu havas sian lokon en la centra halo de la Domo, estas montrataj ankaŭ afiŝoj kun vortoj de Prezidanto Maŭ kaj faksimilaĵoj de la manu-

skriptoj de poemoj de Prezidanto Maŭ. Estas krome okulfrapa granda slogano esprimanta la komunan kordeziron de la revolucia popolo nombranta centmilionojn: "Vivu granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!" Sesdek fotoj pri Prezidanto Maŭ, kvazaŭ disradianta ruĝa suno, per eksterordinara brilo heligas la halon. Tiuj fotoj plene manifestas la grandan praktikadon de Prezidanto Maŭ, kiu bruligis per sia propra mano la flamantan fajregon de la granda proleta kultura revolucio, okfoje akceptis kaj revuis la armeegon de kultura revolucio el pli ol 11 milionoj da personoj, spiras la saman spiron kaj dividas la saman sorton kun la amaso,

kaj subtenas la revolucion movadon de la amaso.

Ankaŭ specialistoj el diversaj landoj kaj aliaj fremdlandaj amikoj troviĝantaj en Pekino vizitis tiun ekspozicion kaj rigardis refoje la brilan figuron de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kun senlime profunda amsono. Nenia vorto povas esprimi la emocion de la diverslandaj amikoj kaj ilian varman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kiam ili forlasis la halon, ili ankoraŭ foje-refoje returnis sian kapon por rigardi la imponan figuron de Prezidanto Maŭ kaj flustre diris: "Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Ni deziras al vi ĉiaman sanon, ĉiaman sanon!"



Kun senlima respekto kaj amo al Prezidanto Maŭ, niaj ĝeamikoj surpaperigas sian profundan senton al Prezidanto Maŭ. Ili laŭte krias: "Vivu Maŭ Zedong!"



Kamarado Lin Biaŭ kaj gekamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Li Fuĉun, Ĝiang King k. a. ĉeestas la kunvenon.

Aklamo pro la Eniro de la Tuta Mondo en la Novan Grandan Epokon de la Penso de Maŭ Zedong

— Pri kunveno en Pekino kun pli ol dek mil
ĉeestantoj por celebri la 25-an datrevenon de
la publikigo de “Paroladoj ĉe la Literatura
kaj Arta Kunsido en Jan-an”

EN la bonega situacio, kiam la granda proletara kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam akiris grandan venkon, kaj kiam la tuta mondo eniras tute novan historian epokon kun la penso de Maŭ Zedong kiel granda standardo, pli ol 16,000 literaturaj kaj artaj laborantoj, reprezentantoj de laboristoj, kam-

paranoj kaj soldatoj, de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj, kaj de revoluciaj kadroj de la ĉefurbo okazigis grandiozan kunvenon en la impona kaj majesta Popola Halo je la 23-a de majo, por solene celebri la 25-an datrevenon de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*.



La ejo de la memoriga kunveno okaze de la 25-a datreveno de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an en Pekino

La kunvenon ĉeestis la intima batalamiko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kamarado Lin Biaŭ kaj aliaj respondecaj kamaradoj de la Centra Komitato de la Partio Ĝou Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Li Fuĉun, Giang King k. c., kaj membroj de la Grupo de Kultura Revolucio de la Centra Komitato de la Partio.

En sia salutletero al Prezidanto Maŭ la kunvenantoj varme esprimis: "Plej, plej estimata kaj amata Prezidanto Maŭ! Ni faras garantion al vi, ke ni nepre serioze studos kaj aplikos la *Paroladojn* kaj ĉiujn viajn instrukciojn, ĝisfunde kritikos kaj kondamnos la plenanon da plej grandaj potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, la plenanon

da kontraŭrevoluciaj reviziistoj en la literatura kaj arta rondo, burĝajn reakciajn 'aŭtoritatojn', kaj ĝisfunde likvidos ĉiun venenan influon de la burĝa reakcia linio; dum la grandaj kritikado kaj kondamnado ni pluapase bone plenumos la taskon de batalo, kritiko kaj reformo en niaj propraj unuoj, unuiĝos kun la plejparto de la kadroj kaj amasoj, kaj firmdecide kondukos la grandan proletan kulturen revolucion ĝis la fino!"

La kunveno, kunvokita post la publikigo de la Cirkulero de 16-5-1966 de la Centra Komitato de la Partio, estas alia grava evento en la politika vivo de Ĉinio. Tiu ĉi kunveno estas grandioza revuo de la brila venko de la proleta revolucia literatura kaj arta linio de

Kamarado Lin Biaŭ kaj gekamaradoj Ĝou Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Giang King k. a. respondecaj kamaradoj de CK de KPC salutas al la proletaj revoluciuloj, revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj kaj revolucia amaso, kiuj partoprenas la kunvenon.





K-dino Giang King paroladas en la kunveno.

Prezidanto Maŭ, kaj majesta ĵuro por batalakiri pli grandan venkon de la granda proleta kultura revolucio! Tiu kunveno kun profunda politika signifo kaj granda aktuala signifo nepre donos grandan inspiron kaj senliman forton al la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj kaj centoj da milionoj da revoluciaj popoloj de nia lando.

La Popola Halo estis saturita per sincera revolucia emocio de senlimaj amo, respekto, fideleco kaj adoro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj plena de forta batala atmosfero de ĝisfundaj kritiko kaj kondamno kontraŭ plenmano da plej grandaj potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Sur la fona mezo de la prezidantara podio alte pendis granda kolora portreto de Prezidanto Maŭ — la plej plej ruĝa suno en la koro de la revoluciaj popoloj de Ĉinio kaj la tuta mondo — ĉe kies ambaŭ flankoj staris dek ruĝaj flagoj. Ĉe la kontraŭa flanko de la podio transverse pendis trans la halo du ruĝaj sloganrubandoj kun la jenaj grandaj vortoj: “La revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas longdaŭre, senkon-

diĉe, tutkore kaj tutanime iri en amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj en ardan batalon, por lerni de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj kuniĝi kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj!”, “Alte tenu la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, firmdecide efektivigu la revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, kaj ĝisfunde frakasu la kontraŭrevolucion reviziisman literaturan kaj artan nigran linion!” La ĉeestantaj literaturaj kaj artaj batalantoj, reprezentantoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj, de la revoluciaj kadroj de la ĉefurbo, kaj la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj de Ŝanhajo kaj Ŝandong, kiuj alvenis Pekinon por prezenti la modelajn revoluciajn teatraĵojn, tute dronis en senlima ĝojo por festi la 25-an datrevenon de la publikigo de la granda epokfara dokumento *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*.

La kunvenon prezidis Giang King, la unua vicestro de la Grupo de Kultura Revolucio de la Centra Komitato de la Partio.

En varma kaj tondra aplaŭdado faris gravan paroladon kamarado Ĉen Boda, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la CK de KPCĈ kaj estro de la Grupo de Kultura Revolucio de CK. Faris paroladojn ankaŭ kamarado Ki Benju, membro de la GKR

de CK, kaj kelkaj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj.

La kunveno triumfe fermiĝis en krio de la slogano "Vivu Prezidanto Maŭ! vivu, vivu longe!" kaj en kantado de *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto*.

"La Ruĝa Signal-lanterno"

La revolucia pekina opero kun moderna temo *La Ruĝa Signal-lanterno* estas kreita sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, sub la persona direktado de k-dino Giang King, tra intensa klasbatalo kaj dank' al la penado de revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj. Ĝi estas unu el la eminentaj modelaj teatraĵoj servantaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la proleta diktaturo.

La sukceso de *La Ruĝa Signal-lanterno* estas granda venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ!

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito Li Juhe, ĉina fervojisto kaj membro de la Komunista Partio de Ĉinio, akiris kontakton kun la kuriero alsendita de la Partio per ruĝa lanterno kiel komunika signalo, kiun postlasis la revoluciaj antaŭuloj. Li transprenis de la kuriero libreton de ĉifro, kiu devas esti transsendita al la gerila taĉmento sur la Norda Monto. Sed kaŭze de denunco fare de perfidulo Li Juhe estis arestita de la malamiko, kiam li ankoraŭ ne sukcesis transsendi ĝin. Post kiam Li Juhe estis arestita, avino Li rakontis la amaran familian historion de la tri generacioj al sia nepino Li Tiemej. La afero okazis tia, ke la tri generacioj ne estas samfamilianoj sed kun komuna familia nomo. Li Juhe estis metilernanto de la edzo de avino Li, kaj ankaŭ la patro de Tiemej estis fervojisto. Dum la granda striko de "la Sepa de Februaro", 1923, la edzo de avino Li kaj la propraj gepatroj de Tiemej heroe oferis sian vivon en la batalo. Li Juhe transprenis de sia majstro la ruĝan signal-lanternon, kaj brakportante la orfinon postlasitan desiaj batalkamaradoj alvenis al la hejmo de avino Li,


kaj tiel formiĝis la revolucia familio. La avino instruis al Tiemej, ke ŝi heredu la batalvolon de la martiroj kaj venĝu al la malamiko la sangon ŝuldon.

En la malliberejo Li Juhe sin montris nefleksebla, ke de li nenion akiris Hatojama, la estro de japanaj ĝendarmoj. Poste la malamiko alkondukis al Li Juhe la arestitajn javinon kaj Tiemej intencante moligi lin. En la malliberejo avino Li kuraĝigis la filon persisti ĉe batalado, kaj fine la damnda malamiko mortigis ŝin kaj Li Juhe. La malamiko hipokrite liberigis Li Tiemej kun vana intenco informiĝi de ŝi, kie kuŝas la libreto de ĉifro. Sed la hontinda intrigo de la malamiko neniam sukcesis. Alte tenante la ruĝan signal-lanternon postlasitan de la patro, Tiemej trarompis unu blokadon post alia kaj fine portis la libreton de ĉifro al la gerila taĉmento sur la Norda Monto dank' al la helpo de la amasoj.

La Ruĝa Signal-lanterno sukcese modlas la brilajn figurojn de la proletaj revoluciaj geherooj de la tri generacioj de la familio de Li Juhe, vivece prezentas la revolucion heroismon kaj revolucion optimismon de la ĉinaj komunistoj, kiuj, rigardante al la morto en la vizaĝon, daŭre antaŭenmarŝas sekvante la paŝojn de la antaŭirantoj, kaj kun plena pasio prikantas la grandan venkon de la ĉina popolo en sia nacia batalo kontraŭ japanaj agresantoj.

Per sia profunda revolucia enhavo kaj potenca arta forto ĝi altiris al si vastajn laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, revolucion amason kaj fremdlandajn amikojn kaj ricevis de ili varman bonvenigon kaj altan laŭdon.

Li Juhe, fervojisto kaj subtera
membro de la Komunista Partio
de Ĉinio.



“La Ruĝa Signal-lanterno”



Geherooj de tri generacioj: Li Juhe (*maldekstre*), Avino Li (*dekstre*) kaj Li Tiemej.


Riskanto
kaj petas
Norda

La nefleksebla Li Juhe saĝe lukta kontraŭ Hatojama.






e sian vivon, la kuriero alportis la libreton de ĉifro de la Partio
s, ke Li Juhe klopodu ĝin transsendi al la gerila taĉmento sur la
Monto.



Aŭdinte la rakonton de la avino pri la familia historio,
Tiemej ĵuras sin dediĉi al la afero de la proleta revolucio,
alte tenante la ruĝan signal-lanternon.

Finfine Li Tiemej sukcesis transporti la ĉifron al la gerila taĉmento sur la Norda Monto.





Li Tiemej tenas alte la ruĝan signal-lanternon kaj restos por ĉiam revolucia daŭriganto.

Celebre al la 25-a Datreveno de la Publikigo de "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an" de Prezidanto Maŭ

ĈEN BODA

Kamaradoj:

La mondo nun eniras en tute novan historian epokon. Tiu estas nova epoko kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiel la mastroj kaj kun la penso de Maŭ Zedong kiel la granda standardo.

Antaŭ dudek kvin jaroj, nia granda instruanto kamarado Maŭ Zedong jam antaŭe aludis en sia verko *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, ke baldaŭ venos al la tuta Ĉinio kaj, same, tra malsamaj procezoj, al ĉiuj landoj de la mondo nova epoko, en kiu la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estos mastroj.

Tiu ĉi granda verko de kamarado Maŭ Zedong, kiu temas pri la problemoj de literaturo kaj arto antaŭ dudek kvin jaroj, estas esence resumo de granda debato pri politikaj problemoj kaj resumo de granda debato ĉirkaŭ la fundamenta problemo de la nuntempa politiko, ĉu oni jesigu aŭ neigu la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn.

Tiu ĉi granda verko estas epokfara politika manifesto de nia Partio, koncerne al la reformado de la Partio kaj la mondo laŭ la fizionomio de la avangardo de la proletaro; ĝi solvis la problemon de mondkoncepto por tiuj, kiuj

volas fariĝi proletaj revoluciuloj, kaj la problemon ĉu aliĝi aŭ ne al la Partio en ideologio por multaj kompartianoj, kiuj organize jam fariĝis membroj; ĝi montras la brilan vojon de kombiniĝo de ĉiuj kompartianoj kaj revoluciuloj kun la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Tio, kion tiu ĉi granda verko pritraktas, ne estas limigita nur en problemoj pri literaturo kaj arto, tamen ĝi estas samtempe resumo de la batalspertoj en la kampo de literaturo kaj arto, farita laŭ la mondkoncepto de la proletaro; ĝi estas enciklopedio, aperinta unufoje en la historio, por solvi la problemojn de literaturo kaj arto; ĝi estas granda, plenumpleksa revolucio marksism-leninisma en literaturo kaj arto, kaj ĝi fariĝis orientilo kaj programo por la nuna, granda proleta kultura revolucio en nia lando.

Cetere, tiu ĉi granda verko esence ankaŭ fariĝis ideologia batalilo por la subpremataj klasoj kaj popoloj de la mondo en ilia granda politika luktado kontraŭ imperiismo, la moderna reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj, kaj fariĝis ideologie kaj politike por revoluciuloj de diversaj landoj klarigo de ofensivo kontraŭ la imperiistoj, modernaj reviziistoj kaj reakciuloj.



Kamarado Ĉen Boda, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo kaj estro de la Grupo de Kultura Revolucio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, parolas en la memoriga kunveno.

En sia letero pri la revolucio de la Pekina Opero, kamarado Maŭ Zedong skribis: “La historio estas kreita de la popolo, sed sur la scenejo de malnova opero (kaj en ĉiuj la popolon forlasintaj malnovaj literaturaĵoj kaj artaĵoj) la popolo ja fariĝis feĉo, kaj la scenejon regas sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoridoj kaj sinjoridinoj.” Kamarado Maŭ Zedong opiniis ke tia inversigo de historio devas esti nun denove inversigita.

La historion kreanta, laboranta popolo — la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj lastaj estas armitaj laboristoj kaj kamparanoj, devas okupi la scenejojn de politiko kaj ekonomia vivo kaj ankaŭ la scenejojn de literaturo kaj arto. Tio estas la konkludo de kamarado Maŭ Zedong.

En la klasa socio, la bataloj sur la fronto de kulturo kaj ideologio, inkluzive tiujn sur la fronto de literaturo kaj arto, ĉiuj senescepte estas klasbataloj kaj estas formo de klasbatalo.

Guste kiel Marks kaj Engels diris en la *Komunista Manifesto*, ĉiuj klasbataloj estas politikaj bataloj.

Kamarado Maŭ Zedong ĵetis al rubejo sen ia rezervo la putran sensencaĵon de tiel nomataj superklaso kaj superpolitiko de la burĝaro. Li ĝisfunde kritikis la reakcian vidpunkton de dualismo aŭ pluralismo de Trocki en lia diraĵo “politiko — marksisma; arto — burĝa”. Kamarado Maŭ Zedong opinias ke ne ekzistas politiko superklasa, nek literaturo aŭ arto sendependa ekster klasa politiko. En ĉiuj problemoj, same en tiuj de literaturo kaj arto, kamarado Maŭ Zedong ĉiam eksplikis la monisman mondkoncepton de la proletaro. Tute korekte li diris: “Ĉiu kulturo, ĉiu literaturo aŭ arto apartenas al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion. Fakte ne ekzistas tiaj aferoj kiaj arto por arto, arto staranta super klasoj kaj arto paralela kun aŭ sendependa de politiko.”

Kamarado Maŭ Zedong disvolvis la tezon de Lenin pri la literaturo de la Partio. Li montris ke ĉiuj revoluciaj literaturistoj, se ili volas vere servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la revolucia popolo, devas plenumi la ĝustan proletan politikan linion de nia partio kaj stari sur la starpunkto de la proletaro.

Estas tute klare ke ĉiuj revoluciaj literaturistoj ne iros proksime al la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ne partoprenos iliajn efektivajn revoluciajn batalojn, se ili ne plenumas la ĝustan proletan politikan linion de la Partio kaj ne penas stari sur la starpunkto de la proleta mondkoncepto. Kiel rezulto de tio, ili ne povos ĝuste figuri la laboriston, kamparanon kaj soldaton, nek ĝuste eduki, en returno, la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sed, male, iros en la kontraŭa direkto de ilia afero.

Kamarado Maŭ Zedong diris al ni: “La proletaj literaturo kaj arto estas parto de la tuta afero de la proleta revolucio.” “Literaturo kaj arto subordiĝas al politiko, sed returne ili ankaŭ donas grandan influon al politiko.” Tiu efiko, kiun la proleta politiko havas super literaturo kaj arto, kaj la reefiko kiun la proletaj literaturo kaj arto havas super la proleta politiko, neeviteble daŭros dum longa tempo, daŭros tra la longtempa batalado de la proletaro ĝis la venko de la revolucio kaj tra la longtempa diktaturo de la proletaro.

Ne estas hazardo la apero de la granda proleta kultura revolucio en nia lando. Eĉ kiam venkis la revolucio de la proletaro kaj realiĝis ĝia diktaturo, ni ankoraŭ ne devas subtaksi la influojn de la bienularo kaj burĝaro. Ĝuste kiel kamarado Maŭ Zedong ripetade montris ke en la socialisma socio ankoraŭ ekzistas klasoj kaj klasbataloj, ekzistas bataloj inter la du klasoj — la burĝa kaj la proleta, kaj ekzistas bataloj inter la du vojoj — la socialisma kaj la kapitalisma. Seriozega estas la batalo por defendi la fruktojn de la proleta revolucio kaj oponi kontraŭ la restarigo de kapitalismo. La bienula kaj burĝa klasoj perdis sian regpotencon kaj la posedajn sistemojn de feŭdismo kaj kapitalismo. Sed, ili ankoraŭ estas fortaj en la batalpozicioj de kulturo, ideologio, literaturo kaj arto, iliaj literaturo kaj arto, kiuj havas longan historion kaj forte esprimas ilin kiel ekspluatajn klasojn, havas ankoraŭ merkaton ĉe la amasoj. Post kiam la laborantaj amasoj faligis, sub la gvidado de la proletaro, la regadon de la bienula kaj burĝa

klasoj kaj la fortoj de la internacia kapitalo, ne estas eble por la amasoj tuj forskui de si iliajn influojn kulturajn, ideologiajn, literaturajn kaj artajn formiĝintajn dum longa tempo. Kompakte ligiĝintaj kun la fortoj de la internacia kapitalo, la bienula kaj burĝa klasoj klopodas per ĉiuj rimedoj konservi, firmigi kaj kapti tiujn poziciojn, por korupti niajn amasojn kaj revoluciajn funkciulojn. Ili volas, ke tiuj internaciaj imperiismaj fortoj, kiuj sklavigis nian popolon, revenu pere de paca evoluo, por ke nia proleta regpotenco kiu faras ekspropriigojn kontraŭ la ekspluatantoj, refariĝu ekspluatista regpotenco de la bienula kaj burĝa klasoj, ke nia socialisma ŝtata havaĵo kaj socialisma kolektiva havaĵo refariĝu ilia vampira havaĵo, kaj ke ili denove subpremu kaj ekspluatu la popolon kaj remetnu la popolon en inferajn suferojn.

En la tempo, kiam la bienularo, burĝaro kaj la fortoj de la internacia kapitalo ankoraŭ sonĝas ĉiutage pri revenigo de sia paradizo, el la etburĝaro ankaŭ seninterrompe elkreskas novaj burĝoj. Tre serioza estas la ŝanceliĝemo de la etburĝoj. La bienuloj kaj burĝoj ĉiam klopodas uzurpi niajn kulturajn, ideologiajn, literaturajn kaj artajn poziciojn pere de la ŝanceliĝemo de la etburĝoj kaj same, ankaŭ pere de tiu de la burĝaj intelektuloj kaj de multaj kulturaj, ideologiaj, literaturaj kaj artaj laborantoj, por faciligi sian kontraŭrevolucionan restarigon. Estas vere, ke inter la pozicioj de ideologio, literaturo kaj arto iuj restas senŝanĝaj post la venko de la revolucio kaj aliaj estas jam uzurpitaj.

Kamaradino Giang King konstante persistas ĉe la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj ĝin defendas. Ŝi batalas ĉe la plejfronto. Dum la lastaj jaroj, per plej energia klopodo, ŝi elfaris en la kampoj de teatro, muziko kaj danco serion da revoluciaj modeloj, forpelis de sur la scenejo de literaturo kaj arto demonojn kaj diablojn kaj starigis heroajn figurojn de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj. Sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong, multaj literaturaj kaj artaj laborantoj fariĝis kune kun kamaradino Giang King pioniroj, kiuj elhakis vojon tra dornaro por la revolucio en literaturo kaj arto. Cetere, la klopodo de

multaj revoluciaj kulturaj kaj ideologiaj laborantoj por oponi kontraŭ la kapitalisma restariĝo sur tiuj kampoj havas tre gravan signifon. Ankaŭ tio estas tute klara.

Kiam la proletaro ankoraŭ ne akiris la regpotencon, la revoluciaj kulturaj, ideologiaj, literaturaj kaj artaj laborantoj celis en sia servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, batalante vivriske, ja nenion alian ol akiri la venkon kaj starigi la regpotencon de la proletaro tra malsamaj stadioj de la revolucio (de la stadio de demokratia revolucio al tiu de la socialisma). Post kiam la proletaro jam akiris la regpotencon, sub la diktaturo de la proletaro, la revoluciaj literaturaj, artaj, kulturaj kaj ideologiaj laborantoj celas en sia servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj firmigi la proletan diktaturon kaj realigi la socialisman antaŭensalton dum la daŭra progresado de la revolucio.

Estas tute reala radika problemo antaŭ ni, ĉu la proletaro post la akiro de la regpotenco povas konservi, firmigi kaj plifortigi ĝin.

En la jaro 1949, antaŭvespere de la liberiĝo de la tuta lando, kamarado Maŭ Zedong jam avertis nian tutan partion, ke ni **devas antaŭgardi nin kontraŭ la atako de la malamikoj per sukertegitaj obusoj.**

La antaŭvido de kamarado Maŭ Zedong estis vere scienca kaj tre klarjuĝa.

La sukertegitaj obusoj de la malamikoj estas diversspecaj. Ili bone scias utiligi sukertegitajn obusojn kiaj tiuj de “literaturo kaj arto”. La burĝaro ĝuste volas utiligi la malnovajn ideologion, kulturon, morojn kaj kutimojn de la ekspluatataj klasoj por “konkeri la homajn korojn” por malfortigi la diktaturon de la proletaro kaj purigi la vojon por kontraŭrevolucia restariĝo.

En la Dekaj Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, 1962, kamarado Maŭ Zedong speciale kaj emfaze elmetis, cele al la tiama realaĵo, ke la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon senbride blovis la venton de individua mas-trumado, la teorian problemon pri la **ankaŭa ekzisto de klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasaj bataloj en la socialisma socio, kaj samtempe montris, ke por renversi regpotencon**

estas ĉiam necese, unue, krei publikan opinion, fari laboron en la ideologia sfero. Tiel agas la revolucia klaso kiel ankaŭ la kontraŭrevolucia klaso.

Oni povas tiel diri, ke revolucia aŭ kontraŭrevolucia klaso ĉiam prenas la kreadon de publika opinio kiel preparan paŝon por kapti regpotencon. Tio estas tre grava leĝo de historio eksplikita de kamarado Maŭ Zedong. Tia estas la historio de ĉiuj klasbataloj senescepte en la antikveco kaj nuntempo, en Ĉinio kaj eksterlando.

Tia “preparo de publika opinio” inkluzivas literaturon kaj arton.

Post la liberiĝo de la tuta lando, kamarado Maŭ Zedong zorgas ĉiam pri la problemoj de kultura revolucio de la proletaro. Li ĉiam kunligas la batalojn de la proletaro sur ĉiuj frontoj de politiko, ekonomio, kulturo kaj ideologio. De deksep jaroj, ĉiuj gravaj problemoj sur la fronto de kulturo kaj ideologio, kun la kritikado kontraŭ la naciperfidisma *Sekreta Historio de la King-kortego*, la sklavisma *La Vivo de Vu Hjun* kaj la ideisma *Studo pri la Romano “Sonĝo de Ruĝa Buduaro”* kiel la komenco, estis elmetitaj de kamarado Maŭ Zedong. Estas treege necese ke ni nun ree studu la *Paroladojn ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj serion da liaj aliaj militantaj dokumentoj pri ideologiaj, literaturaj kaj artaj problemoj. La serio da dokumentoj, kiujn kamarado Maŭ Zedong verkis post la liberiĝo de la tuta lando, atentigas ĉiujn pri elimino de la fortoj de kutimoj kaj influoj de la burĝa kaj aliaj ekspluatataj klasoj; en analizo ĝis la fino, tio celas antaŭgardon kontraŭ la restarigo de kapitalismo kaj firmigon de la proleta diktaturo.

Se ĉiuj sinceraj komunistoj traktos malatente ideologiajn, literaturajn kaj artajn problemojn aŭ iom neglektos la instruojn de kamarado Maŭ Zedong pri tiuj problemoj, ili en politiko faros gravajn erarojn, eble glitos en burĝan marĉon kaj evoluos nerimarkite kaj senbrue en kontraŭrevoluciajn reviziistojn, kiaj tiuj de Ĥruŝĉov-kliko en Sovetunio, kaj kunfluiĝos kun tiuj reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, por fari kontraŭrevolucian restarigon de kapitalismo per diversaj intrigoj kaj konspiroj.

Ĉu ĉiuj faktoj senescepte malkaŝas kaj provas tion senkompatate? Jes, precize tiel.

Kamarado Maŭ Zedong senĉese sonigis la sonorilon de alarmo.

En decembro 1963, kamarado Maŭ Zedong severe kritikis la mankojn en la artaj laboroj de nia lando kaj rimarkigis la strangan aferon ke plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon “fervore pledas por la arto de feŭdismo kaj kapitalismo, sed ne por tiu de socialismo”. Li diris:

“En diversaj artformoj — teatraĵo, ĉjuĵi-o, muziko, belarto, danco, filmo, poemo, literaturo, ktp., troviĝas nemal multe da problemoj, je kiuj grandaj nombroj da personoj estas koncernataj, kaj ĝis nun la socialisma remuldo efikis tre malmulte en multaj fakoj. Tiuj fakoj eĉ nun estas ankoraŭ regataj de ‘mortintoj’. Oni ne devas subtaksi la atingojn en la sferoj de filmo, nova poemo, popolkanto, belarto kaj novelo, sed ankaŭ en ili estas multaj problemoj. Kaj en la fakoj de teatro k. a., la problemoj estas ankoraŭ pli grandaj. Jam ŝanĝiĝis la ekonomia bazo de la socio, sed en la arto, kiel unu el la superstrukturaj servantoj al tiu bazo, restas ĝis nun ankoraŭ granda problemo. Tion oni bezonas serioze preni en sian zorgon, komencante per enketado kaj esplorado.”

“Multaj komunistoj fervore pledas por la arto de feŭdismo kaj kapitalismo, sed ne por tiu de socialismo. Ĉu tio ne estas afero strangege?”

En junio de 1964, kamarado Maŭ Zedong elmetis cetere la sekvan averton al la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj diversaj “Asocioj”, kiuj fondiĝis post la Liberiĝo:

“De 15 jaroj, tiuj asocioj kaj la plejparto de la periodaĵoj, kiuj troviĝas en iliaj manoj (laŭdire kelkaj estas bonaj), ĜENERALE (ne ĉiuj personoj) ne praktikas la politikojn de la Partio, kondutas grandsinjore kaj mandarene, ne iras proksime al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj ne spegulas la socialismajn revoluciojn kaj konstruadon. EN LA LASTAJ KELKAJ JAROJ ili eĉ glitis

ĝis la rando de reviziismo. Se ili ne serioze sin remuldos, ili certe transformiĝos iutage en la estonteco en tiajn grupojn, kia estis la klubo Petofi en Hungario.”

Sed, tiu areto da personoj, kiuj agas grandsinjore kaj mandarene, jam estas sorĉita de la ideologio de la burĝaro kaj moderna reviziismo. “Tiuj potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon, kiuj subtenas la burĝajn akademian tiranojn”, “tiuj burĝaj reprezentantaj personoj, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj protektas la burĝajn akademian tiranojn”, tiuj “kolosaj partiaj tiranoj uzurpintaj la nomon de la Partio, kiuj ne legas librojn, nek ĵurnalojn, ne havas kontakton kun la amasoj, scias nenion sciencan kaj nur ‘agas arbitre kaj subigas aliajn per potenco’”, krome iuj tiel nomataj “kulturuloj”, kiuj estas delonge saturitaj de burĝa animo, restis tute surdaj al la averto de kamarado Maŭ Zedong. Ili ankoraŭ baraktis viv-morte laŭ siaj reloĵoj de la burĝaro kaj moderna reviziismo. Post paso de unu jaro kaj duono, en februaro de 1966, Peng Ĝen eĉ elmetis la reviziisman kaj fifaman “Skizon de Februaro”. Tiu ĉi estas “Skizo”, kiu koncentre esprimas la reakcian ideologion de plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

Per sia sekciilo de ĉiamvenka materiisma dialektiko, kamarado Maŭ Zedong, nia genia proleta pensulo, malkovris komplete la aĉan fizionomion de la “Skizo de Februaro” de Peng Ĝen kaj alvokis la tutan Partion alte levi la grandan standardon de proleta kultura revolucio. Tio estas la “Cirkulero” kiun dissendis la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en la 16-a de majo, 1966.

En ĉi tiu granda historia dokumento, kamarado Maŭ Zedong montris:

“Troviĝas po nombro da tiaj burĝaj reprezentantaj personoj en la Centra Komitato, en la diversaj institucioj de CK kaj la Centra Popola Registaro, kaj ĉe la provinca, urba kaj aŭtonomregiona nivelo.”

La tuta partio nepre devas “alte teni la grandan standardon de la proleta kultura revolucio, ĝisfunde malkaŝi la burĝan reakcian starpunkton de tiu aro da tiel nomataj ‘akademiaj aŭtoritatuloj’ kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, ĝisfunde kri-

tiki la burĝajn reakciajn ideojn en diversaj rondoĵoj de akademia laboro, eduko, ĵurnalismo, literaturo kaj arto kaj eldono, kaj depreni la gvidantecon en tiuj kulturaj sferoj. Por tion atingi, estas nepre necese samtempe kritiki tiujn reprezentantajn personojn de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj ĉiujn rondoĵojn de la kultura kampo, kaj forigi ilin, kaj iuj el ili devas esti transoficigitaj.”

“Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondoĵojn, estas aro da kontraŭrevoluciaj reviziistoj; tuj kiam la kondiĉoj estos maturaj, ili kaptos la regpotencon kaj turnos la diktaturon de la proletaro en la diktaturon de la burĝaro. El tiuj ĉi homoj iuj jam estas malkaŝitaj de ni, iuj ankoraŭ ne, kaj iuj estas fidataj kaj kulturataj de ni kiel niaj daŭrigantoj, ekzemple, tiaj homoj, kia Ĥruŝĉov, estas nun kuŝantaj apud ni; la partiaj komitatoj de diversaj niveloj nepre devas doni plenan atenton al tiu punkto.”

La batalo estas provokita de plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Sed, la leĝo de historio ne turniĝas laŭ ilia volo. Ili levis ŝtonon kaj ĝin faligis sur siajn proprajn piedojn.

Sub la standardo de la granda penso de Maŭ Zedong, la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio leviĝis kvazaŭ la mate-na suno super la kontinento de Ĉinio kaj skuas la teron.

Ekstreme potenca politika forto de la proletaro elŝovis ekstreme potencan movadon de proleta kultura revolucio. Kaj sen ia dubo, ĉi tiu potenca proleta kultura revolucio plirapidigos la procezon de nia historio kaj malfermos novan eraon por la revolucia batalo de la internacia proletaro.

La nun disvolviĝanta granda proleta kultura revolucio estas la daŭrigo kaj disvolviĝo de la granda debato pri la literaturaj kaj artaj problemoj, kiu okazis dum la kvardekaj jaroj en la revoluciaj bazlokoj; ĝi estas la daŭrigo kaj disvolviĝo de la tiamaj grandaj debatoj pri ideologio kaj politiko en la nova historia etapo; ĝi estas la daŭrigo kaj disvolviĝo de tiuj debatoj sub la kondiĉoj de proleta diktaturo.

Dediĉinte sufiĉan atenton al la tuta sperto de la historio de Sovetunio, kamarado Maŭ Zedong ĝuste solvis tiun serion da problemoj en vicoj da grandaj verkoj kaj direktivoj kaj en la granda praktiko de la granda proleta kultura revolucio, kiun li persone iniciatis kaj gvidas. Tio ĉi estas la plej grava signo, kiu indikas la disvolviĝon de marksismo al tute nova etapo. En la komenco de la dudeka jarcento, marksismo disvolviĝis en la etapon de leninismo. Kaj nuntempe ĝi disvolviĝis en la etapon de la penso de Maŭ Zedong.

Marks kaj Engels fondis la teorion de scienca socialismo; Lenin kaj Stalin disvolvis marksismon kaj solvis serion da problemoj pri la proleta revolucio en la tempo de imperismo kaj la teoriajn kaj praktikajn problemojn de la realigo de proleta diktaturo en unuopala lando; kamarado Maŭ Zedong disvolvis marksism-leninisman kaj solvis serion da problemoj pri la proleta revolucio en la nuna tempo kaj la teoriajn kaj praktikajn problemojn por fari revolucion kaj preventi restarigon de kapitalismo sub la kondiĉoj de proleta diktaturo. Tio estas tri grandaj mejloŝtonoj en la historio de disvolviĝo de marksismo.

En la granda proleta kultura revolucio, ni devas kreive studi kaj kreive apliki la *Paroladojn ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ kaj serion da dokumentoj kaj direktivoj, kiujn li faris pri la granda proleta kultura revolucio, lige kun la praktika sperto de la proleta kultura revolucio akirita dum la pasinta unu jaro, por plialtigi la nivelon de nia batalo, koncentrigi niajn fortojn al la kritikado kontraŭ la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino.

Vivu la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ!

Vivu la granda proleta kultura revolucio sub la standardo de la penso de Maŭ Zedong!

Vivu la diktaturo de la proletaro!

Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la senlime brila penso de Maŭ Zedong!

Vivu! vivu! longe vivu nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an” de Prezidanto Maŭ Estas Programo por la Konstruo de Potenca Proleta Kultura Armeo

KI BENJU

Kamaradoj, amikoj, proletaj revoluciaj batalamikoj, karaj junaj batalantoj de la ruĝa gvardio!

Unue ni kune deziru al nia plej plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ longan vivon! longan longan vivon! Kaj bonan sanon, ĉiaman sanon al kamarado Lin Biaŭ, intima batalamiko de Prezidanto Maŭ!

I

Hodiaŭ estas la 25-a datreveno de la publikigo de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, verkita de nia plej plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĉi tiuj 25 jaroj estis periodo de impeta disvolviĝo senprecedenca en la historio de miloj da jaroj de nia patrolando. En tiuj 25 jaroj, nia granda patrolando trapasis mondrenversan ŝanĝon: la ĉina popolo ne nur venkis la brutajn faŝistajn agresantojn de Japanio, frakasis la reakciularon de Kuomintango, forpelis la usonan kaj britan imperiismojn, forigis la tri montegojn pezantajn sur la ĉina popolo kaj gajnis la liberigon de la tuta lando, sed ankaŭ gajnis brilajn venkojn en la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado post la Liberigo. Kiu gvidis nin en ŝanĝado de la subpremata, ekspluatata, malluma, mizera, duonfeŭda kaj duonkolonia malnova Ĉinio en la sendependan, unuiĝintan, luman kaj potencon socialisman novan Ĉinion? Nia plej plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ! La plej plej ruĝa suno brilanta en nia koro!

Prezidanto Maŭ estas ne nur la granda gvidanto de la ĉina popolo, sed ankaŭ la granda gvidanto de la revolucia popolo de la mondo. Kiel multaj proletaj revoluciaj kamaradoj prave diras hodiaŭ, Prezidanto Maŭ estas la Lenin de la nuna epoko.

Prezidanto Maŭ genie, kreive kaj plene heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismen. La

penso de Maŭ Zedong estas la plej altnivela marksism-leninismo en la nuna epoko.

Depost sia naskiĝo, marksismo trapasis tri grandajn stadiojn de disvolviĝo. La unua stadio estis tiu de Marks kaj Engels, kiuj fondis marksismen kaj ellaboris la teorion de scienca socialismo. La dua stadio estis tiu de leninismo. Kiam kapitalismo eniris la epokon de imperiismo, Lenin kaj Stalin disvolvis marksismen, solvis serion da problemoj pri la proleta revolucio, precipe tiujn de la teorio kaj praktiko pri realigo de proleta diktaturo en unu sola lando. La tria stadio estas tiu de la penso de Maŭ Zedong. La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo pluapase disvolvida en la epoko, en kiu imperiismo iras al komplete disfalo, dum socialismo marŝas al tutmonda triumfo. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ genie kaj kreive solvis serion da gravaj problemoj de la proleta revolucio en la nuna epoko, precipe tiujn de la teorio kaj praktiko pri kondukado de revolucio kaj preventado kontraŭ restarigo de kapitalismo sub la historia kondiĉo de la proleta diktaturo kaj tiamaniere levis marksism-leninismen ĝis la tute nova stadio.

Antaŭvespere de la Oktobra Revolucio, Lenin montris emfaze: “Kiu agnoskas nur klasan batalon, tiu ankoraŭ ne estas marksisto, tiu povas esti ankoraŭ ne elirinta el la limoj de la burĝa ideologio kaj burĝa politiko.” “Marksisto estas nur tiu, kiu agnoskas ne nur klasan batalon sed ankaŭ la proletan diktaturon.” Kaj hodiaŭ, kiu ajn nur buŝe agnoskas la proletan diktaturon, sed ne agnoskas, ke sub la historia kondiĉo de la proleta diktaturo ankoraŭ estas batalo inter restarigo kaj kontraŭrestarigo, batalo inter la klopodoj de la proletaro por defendi sian diktaturon kaj tiuj de la burĝaro por renversi tiun diktaturon, tiu ne estas vera marksisto. El la leciono, ke en Sovetunio aperis la moderna

reviziismo kaj la restarigo de kapitalismo, el la historia sperto de la internacia proleta diktaturo, kaj laŭ la aktivadoj de kapitalisma restarigo faritaj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en Ĉinio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ disvolvis la marksism-leninisman teorion pri la proleta diktaturo, ellaboris la plej kompletan revolucion teorion por oponi kontraŭrevolucion reviziismon kaj defendi la proletan diktaturon kaj persone iniciatis kaj gvidas centojn da milionoj da popoloj konduki tiun ĉi senprecedencan grandan proletan kulturen revolucion, kaj per tio faris grandan kontribuon en teorio kaj praktiko al la internacia proleta revolucia movado.

Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an estas granda marksism-leninisma verko, kiu brilas per oraj radioj, en la brileganta trezorejo de la penso de Maŭ Zedong. Ĝi estas la plej kompleta, plej sistema kaj plej korekta programo por la granda proleta kultura revolucio, unufoje aperinta en la historio de la proleta revolucio. Ĝi estas universala vero ĉie aplikebla, brila kaj epokfara dokumento en la historio de homa kulturo.

Kiam tiu ĉi brila verko publikiĝis en 1942, la kontraŭfaŝisma milito en la mondo kaj la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio estis en la plej malfacila kaj suferplena stadio. Ĝuste en tiu tempo, plenmano da kontraŭpartiaj elementoj, trokiistoj kaj renegatoj, kiaj Ĝoŭ Jang, Vang Ŝivej kaj Ding Ling produktis multajn venenajn herbaĉojn kaj faris furiozajn atakojn kontraŭ la Partio. Ili malice atakis la gvidon de la Partio, energie pledis por "libero en verkado", oponis la marksisman vidpunkton de klasa batalo kaj distrumpetis la burĝajn "teorion pri homa naturo" kaj "amon de la homaro". Ili oponis prikantadon pri la lumo de la proletaro. Intencante inciti aliajn eliri por ataki la Partion kaj la popolon, ili babilaĉis, ke "eĉ en la suno troviĝas makuloj" kaj "la tasko de literaturo kaj arto estas ja malkaŝado". Ĝoŭ Jang, Vang Ŝivej, Ding Ling kaj aliaj levis tiun kontraŭpartian kontraŭfluron en la literatura kaj arta rondoj en Jan-an ĝuste en kunago sur la kultura fronto kun la frenezaj atakoj de la Ĉiang Kajŝek-a reaktularo kontraŭ la liberigitaj regionoj. Ilia celo estis disfali la revolucionajn vicajn, subfosi la popolan regpotencon en la bazlokoj kaj detrui la Kontraŭjapanan Rezistmiliton.

Tiutempe, la jan-an-a stilgustiga kampanjo, fame konata en la historio de nia partio, estis grand-skale disvolviĝanta, kaj la batalo inter la du linioj sur la politika-ideologia kaj kultura frontoj estis tre akra. La literatura kaj arta kunsido en Jan-an

estis grava konsistiga parto de la granda stilgustiga kampanjo. La *Paroladoj* faritaj de Prezidanto Maŭ ĉe tiu kunsido, kiuj havas ekstreme gravan historian signifon, servis kiel orientilo por la granda stilgustiga kampanjo de Jan-an, kiel gvidilo por konstruo de politika partio de marksism-leninismo, la penso de Maŭ Zedong. La *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ faris plej profundan kritikon al la kontraŭpartia kontraŭfluo kaj diversaj burĝaj reakciaj pensfluo, kiuj ambaŭ tiam aperis sur la kultura fronto. Prezidanto Maŭ montris: **La proletaj literaturo kaj arto estas parto de la tuta afero de la proleta revolucio. La revolucionaj literaturaj kaj artaj vicaj estas armeo servanta la politikan batalon kaj la proletan diktaturon.** Prezidanto Maŭ diris: En nia batalo por la liberigo de la ĉina popolo sin trovas diversaj frontoj, inter kiuj oni povas diri, estas du frontoj de la plumo kaj de la pafilo, t.e. la kultura fronto kaj la milita fronto. Por venki la malamikon ni devas nin apogi, antaŭ ĉio, sur la armeo kun pafiloj en la manoj. Sed nur tia armeo ne sufiĉas; ni devas havi ankaŭ kulturen armeon, kiu estas ne mankigebla por unuigi nin mem kaj venki la malamikon. Li ankaŭ montris, ke proletaj literaturo kaj arto servas "kiel potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpas la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuanime", kaj ke ili estas instrumento por batalakiri liberigon kaj depreni regpotencon. La ideo de Prezidanto Maŭ konsideri literaturajn kaj artajn laborantojn kiel armeon servantan la batalon de la ĉina popolo por liberigo jam fundamente solvis la problemon de la rilato inter literaturo kaj arto en unu flanko kaj politiko en la alia. En la *Paroladoj*, Prezidanto Maŭ ankaŭ solvis la problemon de la ĝenerala batala direkto por la potenca proleta kultura armeo. Li montris, ke la fundamenta direkto por la proletaj literaturo kaj arto estas servi la laboristojn, kampanojn kaj soldatojn.

Tiu ĉi proleta revolucia linio de literaturo kaj arto elmetita de Prezidanto Maŭ klare montris al revolucionaj literaturaj kaj artaj laborantoj la celon de ilia batalo kaj la direkton de ilia batalo, trafis la esencan punkton de malamiko kaj repuŝis la frenezajn atakojn de plenmano da kontraŭpartiaj elementoj, trokiistoj kaj renegatoj kiaj Ĝoŭ Jang, Vang Ŝivej kaj Ding Ling. Post la paroladoj de Prezidanto Maŭ, responde al lia alvoko, kun la volo batali por la liberiga afero de la ĉina popolo, eminentaj literaturaj kaj artaj laborantoj en la Liberigitaj Regionoj iris inter la laboristojn, kampanojn kaj soldatojn por lerni de ili kaj prezenti ilin; ili uzis literaturon kaj arton kiel armilon por kuraĝigi la amasojn, bati kaj ekstermi la mal-

amikon, kaj tiamaniere faris meritoplenan servon en la granda afero de la liberigo de la nacio kaj la popolo kaj en la batalo por starigi kaj firmigi la popolan regpotencon.

II

Hodiaŭ ni solene celebras la 25-an datrevenon de la granda, epokfara verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* en la tempo, kiam leviĝas alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio kaj la proletaj revoluciuloj de ĉiuj lokoj en la tuta lando unuiĝas kaj lanĉas ĝeneralan ofensivon kontraŭ la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Tio ĉi havas tre gravan aktualan signifon.

La venko de la socialisma revolucio, de la batalo de la proletaro por depreno de regpotenco, ja ne signifas, ke klasa batalo jam finiĝis. Antaŭvespere de la liberigo de la lando, Prezidanto Maŭ diris: **“Post kiam la malamikoj kun armiloj estos ekstermitaj, restos ankoraŭ malamikoj sen armiloj; ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni, ni devas nepre ne subtaksi tiujn ĉi malamikojn.”** Post kiam la proletaro jam deprenis regpotencon, la faligitaj klasmalamikoj ĉiam provados fari kontraŭrevolucion restarigon de si mem kaj la demando “kiu venkos kiun” ankoraŭ ne estas solvita. Por rekapti sian perditan regpotencon, la ekspluatanta klaso antaŭ ĉio nepre kreos publikan opinion kaj faros ideologian preparon por sia aktivado de kontraŭrevolucia restarigo. Literatura kaj arto estas unu el iliaj antaŭaj pozicioj por krei publikan opinion por ilia kontraŭrevolucia restarigo kaj por efektiviĝi sian intrigon uzurpi la gvidantecon de la Partio, la armeo kaj la registaro. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj Peng Ĝen, Lu Dingji, Ĝou Jang, Lin Mohan, Ki Janming, Hia Jan, Tian Han kaj Deng Tuo, kiuj uzurpis la gvidantecon en kulturaj rondoj, superregis la malnovan Propagandan Departementon de la CK de la Partio, la malnovan Ministerion de Kulturo, la malnovan Partian Komitaton de Pekino kaj ĉiujn asociojn sub la Tutĉinia Federacio de Literatura kaj Arta Rondoj. Ili tenis en siaj manoj la gvidantecon de multaj (ne ĉiuj) kulturaj kaj eldonaj institucioj kaj ili ŝanĝis ĉi tiujn instituciojn kaj organizojn en reviziismajn klubojn, en instrumentojn de la burĝaro por oponi la Partion kaj socialismon.

Nia granda saĝa gvidanto antaŭlonge jam travidis la konspirajn aktivadojn de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj de tiu ĉi plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj, kiuj uzurpis la gvidantecon en la kul-

turaj rondoj. Inter 1963 kaj 1964, Prezidanto Maŭ montris plurfoje, ke depost la Liberigo, diversaj fakoj de kulturo kaj arto, inkluzive de literaturo, dramo, kino, ĉjuĵi-o, muziko, belarto kaj danco, kaj artaj akademioj kaj lernejoj, **“GENERALE (ne ĉiuj personoj) ne praktikas la politikojn de la Partio, kondutas grandsinjore kaj mandarene, ne iras proksime al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj ne spegulas la socialismajn revolucion kaj konstruadon”**. Multaj departementoj estas **“regataj de ‘mortintoj’”**. Nia scenejo ne estis regata de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la veraj kreantoj de la historio. Anstataŭe, ĝi estis regata de imperiestroj, reĝoj, generaloj kaj ministroj, dandoj kaj belulinoj, bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj kaj aĉuloj, diabloj kaj demonoj. Feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo tie metis nin sub sian diktaturon. Precipe dum la periodo de 1959 ĝis 1962, kiam nia lando havis ekonomiajn malfacilojn, la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj, subtenate de la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaptis la ŝancon por elmeti grandan nombron da venenaj herbaĉoj kiaj *Deoficigo de Haj Ŝuj, Hie Jaŭhuan, Li Hujniang*, en kiuj ili alude atakis kaj insultis nian grandan Partion provante renversi la verdiktojn pri la dekstraj oportunistoj Peng Dehuaj kaj aliaj deoficigitaj en la Luŝan-a Kunveno kaj inciti aliajn entrepreni kune kun ili aktivadojn de kontraŭrevolucia restarigo. Samtempe kun tio, amase aperis teatraĵoj kaj operoj prikantantaj renegatojn, propagandantaj kapitulacismon kaj distrumpetantaj la filozofion de postviviĝo, kiaj *Vizito al la Patrino. Persikflora Ventumilo, Li Hianggjun, Li Hiuĉeng kaj Sub Tegmentrando en Ŝanhajo*. La situacio en la kino estis eĉ pli okulfropa. Kiom da veneno disvastigis filmoj, de tiuj de la frua postliberiga periodo, kiaj *Sekreta Historio de la King-kortego kaj La Vivo de Vu Hjun*, ĝis la poste faritaj *La Sennokta Urbo, La Butiko de Lin-familio, Du Familioj, Mil Liojn kontraŭ la Vento, Sieĝita Urbo kaj Frua Printempo!* Por distrumpeti la kapitalisman vojon kaj efektiviĝi sian intrigon de kontraŭrevolucia restarigo, ili plenenergie malbeligis la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj beligis kapitalismon, feŭdismon kaj reviziismon kaj faris ĉiajn imageblajn malbonojn. Kaj krome, konforme al la volo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, ili distordis la historion de la Partio, starigis la Ĥruŝĉov-on de Ĉinio kiel heroon sur la ekrano kaj huraadis por dekstra oportunismo.

Prezidanto Maŭ montris: **“Uzi novelojn por fari kontraŭpartiajn aktivadojn estas granda invento.”** La plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj

Ĝoŭ Jang kaj aliaj agis ĝuste tiamaniere. Sub ilia direktado, aperis kontraŭpartia novelo, kiu celis pravigi la fifaman kontraŭpartian elementon Gaŭ Gang. Tiu novelo eĉ malkaŝe distordis la historion kaj direktis sian atakan lancpinton al la Centra Komitato de la Partio kun nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĉe la kapo.

Tamen la konspiraj aktivadoj de ĉi tiuj kontraŭ-revoluciaj reviziistoj por restarigo de kapitalismo ne povis eskapi la malkaŝon de la disradianta, monstromalkovra spegulo de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ. Antaŭ la monstromalkovra spegulo de la penso de Maŭ Zedong, ili neniel povas sin kaŝi kaj tute malkaŝiĝis ilia vera vizaĝo kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma. Tial, tiu ĉi grego de demonoj kaj diabloj ekstreme timas kaj ekstreme malamas la *Paroladojn*. Per ĉiaj frimедoj ili disvastigis tiajn absurdajn teoriojn kiaj “skribado pri vero”, “la larĝa vojo de realismo”, “profundiĝo de realismo”, kontraŭstaro al “subjekto kiel decida faktoro”, “skribado pri mezaj personoj”, opono al “laodoro de pulvo” kaj “la miksiĝo de diversaj fluoj kiel la spirito de la epoko” por ataki tiun ĉi brilan verkon de Prezidanto Maŭ. Kaj krome, flirtigante ruĝan flagon ili oponis la ruĝan flagon kaj distordis kaj kastris la esencan spiriton de la *Paroladoj*, pretekstante propagandon pri la *Paroladoj*.

“Tro alte taksante siajn fortojn, efemeroj klopodas skui arbegojn.” Ĉiuj iliaj atakoj kontraŭ la brila verko de Prezidanto Maŭ kaj ĉiuj iliaj absurdaj teorioj antaŭ longe jam estis komplete frakasitaj per la kritikoj entenataj de la *Paroladoj* mem de Prezidanto Maŭ. Sub la gvidado de Prezidanto Maŭ mem, la vastaj revoluciaj amasoj, kiuj jam mastras la potencon armilon de la *Paroladoj*, jam lanĉis ripetfoje pinto-kontraŭ-pintajn batalojn kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la reakciajn akademiajn “aŭtoritatulojn”.

Tiel frue kiel en la jaro 1951, Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidis la kritikadon kontraŭ la reakcia filmo *La Vivo de Vu Hjun*. En 1954, li denove persone iniciatis kaj gvidis la kritikadon kontraŭ la *Studo pri la Romano “Songŝo de Ruĝa Buduaro”* kaj la reakciaj pensoj de Hu Ŝi.

De 1954 ĝis 1955 prenis lokon la batalo kontraŭ la kontraŭrevolucia kliko de Hu Feng, kaj ekde 1957 kondukigis la batalo kontraŭ la dekstruloj, la batalo kontraŭ la dekstra oportunismo kaj la kritikado kontraŭ la teorio de Jang Hianĝen pri “kombino de du en unu” kaj la teorio de Ĝoŭ Guĉeng pri “la miksiĝo de diversaj fluoj kiel la spirito de la epoko”.

Ĉe la Dekla Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, okazigita en 1962, Prezidanto Maŭ aparte faris la grandan batalan alvokon al la tuta Partio kaj la tuta popolo “**neniam forgesu klasan batalon**”, kaj elmetis la problemon firme teni la klasan batalon en la kampo ideologia.

Dufoje en 1963 kaj 1964, Prezidanto Maŭ donis ekstreme gravajn instrukciojn pri literatura kaj arta laboro, tio peze frapegis la kontraŭrevolucion reviziisman nigran linion de literaturo kaj arto, reprezentatan de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Post tio, kamaradino Giang King, plej kuraĝa batalanto sur la kultura fronto, entuziasme respondis al la alvoko de Prezidanto Maŭ kaj gvidis avangardajn batalantojn en la kultura revolucio por lanĉi ofensivon kontraŭ la scenejo de arto okupita de la sinjoraj moŝtoj de la ekspluatantaj klasoj. Ili trarompis la ringon post ringo de subpremo kaj baroj kreitaj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj unuafoje sukcesis plene brili la heroajn figurojn de la veraj kreantoj de la historio — la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj — sur la scenejo de la pekina opero, balado kaj simfonio. La sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoridoj kaj sinjoridinoj, kiuj longe regadis la scenejojn de arto, komencis esti forpelataj. La inversigita historio estas denove inversigita. Tio ĉi estas brila mejloŝtono en la historio de la proleta kultura revolucio. Ĉiuj ĉi tiuj venkoj en la bataloj estas venkoj de la proleta revolucia linio de literaturo kaj arto reprezentata de Prezidanto Maŭ, venkoj de tiu ĉi granda verko de Prezidanto Maŭ.

Alvenas la momento por la proletaro lanĉi ĝeneralan kontraŭofensivon kontraŭ la burĝaro.

En novembro de 1965, la proletaj revoluciuloj de Ŝanhajo, decideme efektivigante la instrukcion de Prezidanto Maŭ donitan ĉe la Dekla Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio kaj gvidate de kamaradino Giang King, lanĉis la kritikon kontraŭ *Deoficigo de Haj Ŝuj*, tiel ĵetis la unuan lancon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de Peng Ĝen kaj klarionis ekmarŝon por la granda proleta kultura revolucio.

En februaro de 1966, kamaradino Giang King estis komisiita de kamarado Lin Biao kunvoki la kunsidon pri literaturo kaj arto en la armitaj fortoj. Tiu kunsido estis ege grava en la historio de la kultura batalo en Ĉinio. Ĝuste kiel kamaradino Giang King montris, la kunsido alvenigis la “dion” defendantan la proletan diktaturon la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj lanĉis furiozan atakon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la reakciaj burĝaj “aŭ-

toritatuloj", kiuj monopoligis la gvidantecon en kulturaj rondoj dum longa tempo.

La kunsido, prezidate de kamaradino Giang King, ellaboris la "Resumon de la Kunsido pri la Literatura kaj Arta Laboro en la Armeo". Tiu ĉi "Resumo", trifoje reviziita de Prezidanto Maŭ mem, donas ekstreme profundan kaj korektan analizon pri multaj fundamentaj problemoj koncernantaj la batalon depost la Liberiĝo inter la du linioj sur la literatura kaj arta fronto. La "Resumo" forpelis la herezan venton kaj densan nebulon disvastigitajn de la burĝaro dum multaj jaroj en la kulturaj rondoj, debatis ilian arogantecon, senarmigis ilin kaj tiel gajnis la venkon en la unua batalo de la granda proleta kultura revolucio. Kamarado Lin Biaŭ montris, ke la "Resumo" "estas tre bona dokumento, kiu per la penso de Maŭ Zedong respondas multajn gravajn demandojn pri la kultura revolucio dum la socialisma periodo. Ĝi havas ne nur grandegan aktualan signifon sed ankaŭ for-atingan kaj profundan historian signifon."

Tuj poste, la granda historia dokumento — la Ĉirkulero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio je la 16-a de majo, 1966 — estis ellaborita sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ. Sisteme ĝi elmetis la teorion, linion, principojn kaj politikojn de la granda proleta kultura revolucio, frakasis la "Februaran Skizon", reakcian programon por restarigo de kapitalismo elkovitan de la kontraŭrevolucia reviziisma kliko reprezentata de Peng Ĝen. Ĝi repuŝis ilian kontraŭatakon kaj jetis ilin en konfuzon, kaj levis la grandan proletan kulturen revolucion kiu bolante disvolviĝis tra la tuta lando.

Kiel nerezistebla torento, la revoluciaj amasoj kaj revoluciaj junaj batalantoj de la ruĝa gvardio, kiuj estas armitaj per la penso de Maŭ Zedong, sturmis en la "palacon de infer-reĝo" regatan de diabloj kaj demonoj.

La malnova Propaganda Departemento de la Centra Komitato de la Partio falis!

La malnova Ministerio de Kulturo falis!

La malnova Partia Komitato de Pekino falis!

La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj kutime estis tiom arogantaj kaj rigardantaj sin "grandaj personoj", ŝajne estas gigantoj, sed fakte nur paperaj tigroj, kiuj ne povas elteni solan baton!

III

Kamaradoj!

la akra batalo sur la kultura fronto depost la Liberiĝo de la tuta lando klare montras, ke la batalo de la proleta revolucia linio de Prezidanto

Maŭ en literaturo kaj arto kontraŭ la kontraŭ-revolucia reviziisma nigra linio en literaturo kaj arto estas, analizite ĝis la fino, batalo inter la burĝaro, kiu deziras restarigi kapitalismon, kaj la proletaro, kiu batalas kontraŭ ĝi.

Sub la historia kondiĉo de la proleta diktaturo, la potenca revolucia kultura armeo estas grava forto en oponado kontraŭ kapitalisma restarigo kaj prevento kontraŭ inundo de reviziismo, en la klasa batalo kun la luktado inter restarigo de kapitalismo kaj oponado kontraŭ ĝi kiel la ĉefa enhavo. La defendo de la proleta diktaturo ĉefe dependas de la popola armeo kun pafiloj en la manoj, sed ankaŭ la kultura armeo estas nemalhavebla por tio. Kiel la Ĉina Popola Liberiga Armeo, tiel same la kultura armeo portas sur siaj ŝultroj la gravan taskon defendi la grandan proletan diktaturon kaj la grandan socialisman aferon.

Tiu ĉi mondsdua granda proleta kultura revolucio pruvis, ke la potenca revolucia kultura armeo estas forta sturma taĉmento en atako kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziismo.

Hodiaŭ, celebrante la 25-an datrevenon de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ, ni devas plene koni la gravan rolon ludatan de la potenca revolucia kultura armeo en la batalo por firmigi la proletan diktaturon kaj preventi la restarigon de kapitalismo. La *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ estas programo por la konstruo de potenca proleta kultura armeo. Por ke tiu ĉi armeo ludu ankoraŭ pli potencon rolon, ni nepre devas ĝustigi nian direkton, konstrui niajn vicojn kaj armi niajn batalantojn per la *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ, la granda arme-konstrua programo.

Dum la potenca proleta kultura armeo antaŭenmarŝas tra la ventegoj kaj ondegoj de la granda proleta kultura revolucio, ĉiu el niaj batalantoj alfrontas diversajn specojn de demandoj: Kien devas iri la literatura kaj arta rondoj? Kio estas la batala tasko de ili en la nuna tempo? Kio estas la principoj kaj politikoj por literatura kaj arta laboro? La respondoj al ĉiuj ĉi tiuj demandoj povas esti trovitaj en la *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ.

Unue, persistu ĉe la direkto de Prezidanto Maŭ, ke literaturo kaj arto devas servi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, aktive partoprenu en la revolucia amasa kampanjo de kritikado kaj batalu por defendi la proletan diktaturon.

En sia *Paroladoj* Prezidanto Maŭ montris: "La problemo por kiuj estas literaturo kaj arto estas problemo fundamenta, problemo de principo." Tio ĉi estas problemo de direkto por literatura kaj arta la-

boro. Ĉu literaturo kaj arto servu al la milionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj aŭ al plenmano da ekspluatantoj? Ĉu ili servu al la defendo de la proleta diktaturo aŭ al la plenmano da kontraŭ-revoluciaj reviziistoj en iliaj aktivadoj por restarigo de kapitalismo? Tio ĉi estas la fokuso de la batalo inter la proleta revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj la kontraŭ-revolucia reviziisma nigra linio de literaturo kaj arto. La batalo inter la du linioj en literatura kaj arta rondoj tra la pasintaj 17 jaroj jam montras al ni en praktiko, ke la problemoj de direkto restas la plej fundamenta problemoj solvota por la kulturaj rondoj, kiuj estis sub la regado kaj la influo de la kontraŭ-revolucia reviziisma nigra linio dum longa periodo. Se nur tiu ĉi fundamenta problemoj de direkto solviĝos, tiam facile solviĝos ĉiuj aliaj demandoj en disputo. Se tiu ĉi problemoj ne solviĝos, do ankaŭ la ceteraj problemoj ne povos esti solvitaj. Nur kiam ni jam solvis la problemon de la ĝenerala direkto por literatura kaj arta laboro ne nur en teorio sed ankaŭ en praktiko, ni povas teni firman proletan revolucionan pozicion kaj batali por defendi la proletan diktaturon, por defendi socialismon kontraŭ restarigo de kapitalismo!

La amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas la veraj kreantoj de la historio, la mastroj de socialisma socio. Por servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la literaturaj kaj artaj laborantoj nepre devas iri en la amasojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, en la fajron de batalo, kaj **“transigi sian starpunkton al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la flanko de la proletaro”**, tiel ke iliaj pensoj, sentoj kaj mondkoncepto plene remuldiĝu tra la tri grandaj revoluciaj movadoj de la klasa batalo, la batalo por produkto kaj la scienca eksperimentado. Ili devas kombini kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, bone koni la vivon kaj pensojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, lerni la lingvon de la amasoj, krei heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, priskribi la grandiozajn socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon — unuvorte krei novajn literaturon kaj arton de la proletaro. Nur tiamaniere ili povas vere fari literaturon kaj arton potenca armilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon.

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj la plenmano da kontraŭ-revoluciaj reviziistoj uzis duvizaĝan taktikon por furioze oponi la direkton montritan de Prezidanto Maŭ, ke literaturo kaj arto servu al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Por kontraŭstari la revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto

Maŭ, ili elmetis la sloganon “literaturo kaj arto de la tuta popolo”.

En 1962, okaze de la 20-a datreveno de la publikigo de la *Paroladoj*, Ĝoŭ Jang, Lin Mohan kaj aliaj aranĝis falsan celebran kunvenon kaj produktis grandan venenan herbaĉon — la artikolon “Servu al la Plej Vastaj Popolamasoj”, en kiu ili pledis, ke literaturo kaj arto devas servi al la “tuta popolo” inkluzive de burĝaj elementoj kaj hisis per tio la reakcian nigran flagon de “literaturo kaj arto de la tuta popolo”. Ili eĉ publike deklaris, ke “socialisma kulturo estas kulturo de la tuta popolo”.

Ĉu proletaj literaturo kaj arto povas servi al la burĝaro? Ĉu la socialisma kulturo povas esti kulturo de la tuta popolo?

Absolute ne. Prezidanto Maŭ antaŭ longe jam kondamnis tiajn absurdajn opiniojn en sia *Paroladoj*.

“Literaturo kaj arto de la tuta popolo” estas nenio nova; ĝi estas nur duplikato de la “ŝtato de la tuta popolo” kaj “partio de la tuta popolo” de Ĥruŝĉov en la kampo de literaturo kaj arto. En nia mondo, absolute ne povas esti tiaj literaturo kaj arto de la “tuta popolo”. Literaturo kaj arto nepre estas io, kiu servas aŭ al la proletaro aŭ al la burĝaro. La teorio de Ĝoŭ Jang kaj Lin Mohan pri “literaturo kaj arto de la tuta popolo” ja celas oponi servadon de literaturo kaj arto al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj al proleta politiko kaj ŝanĝi literaturon kaj arton en kontraŭ-revolucion instrumenton por restarigo de kapitalismo, kun elpendigita ŝildo de superklaseco.

La plej grava tasko de la granda proleta kultura revolucio en la kulturaj rondoj ja estas solvi tiun ĉi problemon de direkto.

Sen detruo ne povas esti konstruo. En la amasa kampanjo por kritikadi la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, ni devas komplete frakasi ilian direkton de literaturo kaj arto en servo al kontraŭ-revolucia reviziismo, kaj firme starigi nian direkton de literaturo kaj arto en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ni devas preni la *Paroladojn* de Prezidanto Maŭ kiel nian batalilon kaj aktive partopreni la amasan kritikan movadon por defendi la proletan diktaturon kaj la socialisman ŝtaton.

Nun en la kulturaj rondoj iras la t. n. “disputo pri la 17 jaroj kaj la 50 tagoj”, kaj la fokuso de la disputo estas, ĉu la kulturaj rondoj devas kritiki la nigran literaturan kaj artan linion de kontraŭ-revolucia reviziismo regantan dum la 17 jaroj aŭ la burĝan reakcian linion de pli ol 50 tagoj en junio kaj julio de la pasinta jaro. Tiu ĉi disputo vaste interesis kamaradojn en la kulturaj rondoj. Sed

en efektiveco, la du linioj ne estas apartaj. Kaj la burĝa reakcia linio absolute ne estas afero de nur 50 tagoj. La kritikado kontraŭ la kontraŭ-revolucia reviziisma nigra linio de la 17 jaroj en literaturo kaj arto ja devas kaj tute povas esti kunligebla kun tiu kontraŭ la burĝa reakcia linio en la granda proleta kultura revolucio. Ĝuste por protekti la kontraŭ-revolucian reviziisman linion, kaj kompreneble ankaŭ por protekti la kontraŭ-revolucian reviziisman nigran linion de la 17 jaroj en literaturo kaj arto, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon elmetis la burĝan reakcian linion en la granda proleta kultura revolucio. Ni devas kritiki la kontraŭ-revolucian reviziisman nigran linion de la 17 jaroj en literaturo kaj arto kiel la burĝan reakcian linion ĝin protektantan. Tiel la ĉefa reprezentanto de la kontraŭ-revolucia reviziisma nigra linio de literaturo kaj arto kiel la elmetinto de la burĝa reakcia linio estas unu sama persono, nome la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. La plej grava tasko de la nuna amasa movado de kritikado estas ĝuste kritiki profunde kaj ĝisfunde la ĉefan reprezentanton de la kontraŭ-revolucia reviziisma nigra linio de literaturo kaj arto kaj la elmetinton de la burĝa reakcia linio, t. e. la plej grandan enpartian potenctenanton, kiu iras la kapitalisman vojon. Nur tiamaniere la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ povas esti vere starigita.

Kamaradoj proletaj revoluciuloj! Prenu viajn plumojn kiel armilojn, brave vin ĵetu en la amasan kritikan movadon kaj solide batu la malamikon je tiu ĉi momento de ĝenerala ofensivo lanĉita de la proletaro kontraŭ la burĝaro!

Due, organizu la maldekstrajn vicojn por bone konduki BKR-on* en ĉiu entrepreno kaj institucio.

La burĝa regado super niaj kulturaj rondoj nepre ne devas esti daŭrigita plue. Proletaj revoluciuloj nepre devas depreni la regpotencon en la gvidaj organoj, kulturaj organizoj, artaj akademioj kaj lernejoj kiujn la plenmano da kontraŭ-revoluciaj reviziistoj okupis kaj superregis dum la pasintaj 17 jaroj.

Potenca armeo de la proleta kultura revolucio devas esti organizita, kaj en ĉiu entrepreno kaj institucio formiĝu iom post iom vicoj de fortaj maldekstruloj en la batalado. Proletaj revoluciuloj devas efektivigi grandan revolucian unuiĝon en la revolucia amasa movado de kritikado, nome konduki BKR-on en sia entrepreno aŭ institucio en unuanima kunagado, kaj direkti la lancpinton kontraŭ la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, malkaŝi iliajn krimojn, elimini ilian venenan influon kaj ilin komplete refuti, renversi kaj senprestigiĝi!

Reakciaj burĝaj akademiaj tiranoj kaj reakciaj "aŭtoritatuloj" devas esti plene kritikitaj.

Nova kaj vere revolucia kerno gvidanta la kulturajn vicojn devas esti fondita en ĉiuj lokoj kie la regpotenco devas esti deprenita.

Laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ en la *Paroladoj*, ĉiuj fortoj unuiĝeblaj devas esti unuiĝitaj, la rilatoj inter la malamikoj, amikoj kaj ni mem devas esti klare distingitaj, kaj limlinio devas esti strekita inter la du malsamaj spacoj de kontraŭdiroj. Sin trovas homoj, kiuj subtenas la Partion, socialismon kaj Prezidanton Maŭ sed diris aŭ faris ion eraran, skribis iujn malbonajn artikolojn aŭ prezentis iujn malbonajn teatraĵojn. Oni ne devas ilin faligi, sed pacience helpi kaj eduki, kaj ne devas ilin malestim. Se ili nur kuraĝas mem ekzameni siajn erarojn kaj klare koni ilin, ni proletaj revoluciuloj devas ilin bonvenigi, unuiĝi kun ili kaj konduki kune kun ili BKR-on.

Trie, donu bonan prizorgon pri verkado, starigu bonajn modelojn kaj faru grandajn klopodojn por krei novajn proletajn verkojn.

Doni bonan atenton pri kreado estas unu el la ŝlosilaj problemoj por renversi burĝajn literaturon kaj arton kaj starigi proletajn revoluciajn literaturon kaj arton. Nur el la novo de la kreado povas estiĝi la novoj de literaturo, kino, teatro, muziko, danco kaj belarto. Laŭ la nova situacio de la kuranta granda proleta kultura revolucio, ĝenerale parolante, ĉiuj kulturaj fondaĵoj devas unuflanke konduki sian propran BKR-on, kaj aliflanke krei kaj surscenigi modernajn, revoluciajn literaturajn kaj artajn verkojn, kiuj servas al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Kreado de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj devas esti serioze priatentata kaj helpata por disvolviĝo. La eminentaj literaturaj kaj artaj verkoj aperintaj el la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas spoguĝiĝo pri la novaj trajtoj de la epoko de la proleta kultura revolucio de nia lando. Ĉiuj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas lerni modeste de ili.

En prizorgo pri la kreado de verkoj, la plej esenca afero estas starigi bonegajn modelojn. La forto de modelo estas grandega. Nur dank'

*BKR—mallongigo de la vortoj "batalo, kritiko, reformado" prezentantaj la taskojn elmetitajn en la fama 16-punkta decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, nome batali kaj renversi la enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon, kritiki la reakciajn burĝajn akademiajn "aŭtoritatulojn" kaj la ideologion de la burĝaro kaj ĉiuj ekspluatantaj klasoj kaj reformi edukadon, literaturon kaj arton kaj ĉiujn partojn de la superstrukturo nekonformajn al la socialisma ekonomia bazo por faciligi la firmigon kaj disvolvon de la socialisma sistemo.

al la ekzisto de modelo oni povas konvinki aliajn, ĝisfunde detruai la malnovaĵojn kaj trahaki la vojon por la antaŭenmarŝo de la nova afero. La pekinaj operoj kun modernaj temoj kiaj *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *La Haveno*, *La Ruĝa Signal-lanterno*, *Ŝagiabang* kaj *Surprizatako al la Blanktigra Regimento*, la revoluciaj baletoj *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj *Blankhara Knabino* kaj la simfonio *Ŝagiabang* formis serion da tiaj eminentaj modeloj. Ili estas novaj modeloj de arto brilantaj per la penso de Maŭ Zedong. En ili bone unuiĝis la revoluciaj politikaj enhavoj kaj perfektaj formoj de arto. La apero de ĉi tiuj bonegaj artaj modeloj estas venko de la proleta revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

La proletaro bezonas eminentajn artajn verkojn, en kiuj realaj revoluciaj bataloj estas kombinitaj kun noblaj revoluciaj idealoj. Tiaj eminentaj verkoj povas esti sukcese produktitaj nur per la metodo elmetita de Prezidanto Maŭ, nome kombini revolucionan realismon kun revolucia romantiko.

La blinda adorado al tio kio estas antikva, fremdlanda kaj reviziisma, kaj la kutimo de sklavaj adorantoj kia Gia Guj, kiuj ne povas ion diri sen “citi antikvajn grekojn”, devas esti faligitaj. Ni adoras ne la ĉielon, nek la teron, kaj absolute ne tion kio estas fremdlanda, fama kaj antikva; ni kredas nur la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, la proletaron kaj marksism-leninism, la penson de Maŭ Zedong. Ni nepre ne blinde adoru la antikvan pekinan operon, la filmojn de la tridekaj jaroj, francan literaturon, anglan Shakespeare, rusajn Belinskij, Ĉerniŝevskij kaj Stanislavskij kaj Ŝolohov de la reviziisma Sovetunio. Ni devas kritike heredi la antikvaĵojn, kiuj estas bonaj kaj ankaŭ kritike asimili la fremdlandaĵojn, kiuj estas bonaj. Sed tion farante, ni nepre devas sekvi la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**”, kaj neniam esti misgvidataj de la aĉaĵoj de la ekspluatantaj klasoj.

Ĉiu ajn, kiu malestimas la laborantan popolon kaj la proletaron, blinde adoras aliajn kaj humilaĉe akomodigaĵas al iliaj volo, neniam povos havi bonan perspektivon. Niaj artaj trezoroj, kiuj skuis la mondon, ne estas *Cigna Lago*, kiun kopiis de la burĝaro la fremdlanda specialisto adorata kiel “budao” de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, sed niaj propraj revoluciaj baletoj *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj *Blankhara Knabino*. Propracele, niaj du baletoj ne estis kreitaj por prezentiĝi al la tutmonda spektantaro, ili tamen ricevis varman akklamadon de la progresema homaro de la tuta mondo. La tutmonda progresema homaro ne atendis, ke tiu ĉi antikva arta formo iom post iom de-

kadencanta en la okcidenta mondo povas akiri novan freŝan vivon en la orienta mondo. La plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj iliaj subtenantoj nomis niajn artajn trezorojn “vulgaraĵoj” kaj rigardas eksterlandajn malprogresiĝojn kiel diaĵojn. Manĝinte kelkajn fremdlandajn pantranĉaĵojn, ili forgesis siajn prapatrojn kaj babilaĉas ke “eĉ la luno en fremdaj landoj vidiĝas pli ronda”. Estas ja dubinde, ĉu ili ankoraŭ havas la senton de honto!

Ni devas lerni de la iniciatintoj de la revolucio en la pekina opero, baleto kaj simfonio kaj de tiuj avangardaj batalantoj por la revolucio en teatraĵo, danco kaj muziko. La revolucio en la pekina opero, baleto kaj simfonio estas la plej malfacila batalo de atakado kontraŭ firmaj fortikaĵoj sur la literatura kaj arta fronto. Ĝi estas la prologo de la senprecedenca granda proleta kultura revolucio. La malfaciloj estas grandaj kaj la batalo estas peniga. La burĝaro kaj la demonoj kaj diabloj senĉese kaj ĉiamaniere atakis, kalumniis, primensogis kaj malice persekutis kaŝe kaj publike la avangardajn batalantojn sur la literatura kaj arta fronto. Sed la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ ilin kuraĝigis, kaj ili neniam senkuraĝiĝis kaj neniam timis malfacilojn. Por depreni la literaturan kaj artan poziciojn el la manoj de la burĝaro, por defendi la revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, la pioniroj de la kultura revolucio faris, sub la gvido de kamaradino Giang King, longan, seninterrompan kaj malfacilegan batalon. Post venko super sennombraj malfaciloj kaj obstakloj, ili finfine elhakis luman vojon tra la dornoplena sovaĝejo, uzante la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kiel sian armilon. Ilia revolucia batalspirito, manifestiĝinta en iliaj kuraĝeco, persisteco kaj neŝancebleco, estas lerninda ekzemplo por ĉiuj kulturaj batalantoj. Se tiaj malfacile konkereblaj fortikaĵoj de literaturo kaj arto kiaj la pekina opero, baleto kaj simfonio jam estas trarompitaj de niaj avangardaj batalantoj, ĉu ankoraŭ troviĝas en la mondo ia ajn nekonkerebla fortikaĵo de literaturo kaj arto? Batalantoj de nia potenca kultura armeo, alte tenu la standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj antaŭenmarŝu kuraĝe kaj kun plena memfido!

Kvare, disvolvu amasan kritikon en literaturo kaj arto.

Prezidanto Maŭ instruas nin: “**Unu el la ĉefaj metodoj de batalo en la literatura kaj arta sferoj estas literatura-arta kritikado.**” En literatura kaj arta kritiko estas necese teniĝi al la principo, ke politika kriterio devas esti metita sur la unua loko kaj arta kriterio sur la dua. Ĉiuj reakciaj ideoj kaj verkoj de literaturo kaj arto, kiuj malutilas al

la proleta diktaturo kaj la socialisma revolucio, nepre devas esti kritikitaj. Oni neniel devas lasi la venenajn herbaĉojn disvastiĝi libere kaj veneni la menson de la popolo.

La plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj iliaj subtenantoj plenenergie distrumpetas la absurdan argumenton pri "senmalutilaj" verkoj, dirante ke ĉia ajn teatraĵo, "kiu distras kaj plezurigas la spektantojn, estas bona". La t. n. "senmalutileco" priparolita de ili estas nur trompo. Ĉiuj eksterlandaj "senmalutilaj" filmoj, por kies libera prezentado ili publike pledis, efektive estas verkoj, kiuj predikas pri kapitalismo kaj reviziismo. Ĉiuj "senmalutilaj" teatraĵoj, por kies libera prezentado en ĉiuj lokoj ili publike pledis, efektive estas verkoj, kiuj glorigas la ekspluatantajn klasojn kaj malbeligas la laborantan popolon kaj eĉ alude oponas la Partion kaj socialismon. Ĉu vere troviĝas tiaj t. n. "senmalutilaj" verkoj en la mondo? Ne. Prezidanto Maŭ instruas nin en la *Paroladoj*: "En la hodiaŭa mondo, ĉiu kulturo, ĉiu literaturo aŭ arto apartenas al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion." Kio estas senmalutila por unuj, tio tamen estas malutila por aliaj. Kiel povas ekzisti literatura aŭ arta verko, kiu estas "senmalutila" al ĉiuj klasoj? Ĉu ankoraŭ ne sufiĉe multa estas la malutilo, kiun la putraj literaturaj kaj artaj verkoj de la burĝaro kaj reviziismo alportis al la laboranta popolo, kaj precipe al la juna generacio? La celo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj en disvastigado pri la teorio de "senmalutileco" estis uzi ĝin kiel ŝildon por preventi kritikon fare de la amasoj, tiel ke ĉiaj grandaj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj venenaj herbaĉoj povis esti signitaj per la etikedo "senmalutila" kaj venditaj al centmilionoj da revoluciaj popolanoj. Ilia celo estis narkoti la laborantajn popolanojn kaj veneni ilian menson per tiaj literaturaj kaj artaj verkoj por ke efektiviĝu ilia intrigo pri paca evoluo kaj restarigo de kapitalismo.

Krome, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj rezistis literaturan kaj artan kritikon sub la ŝildo de "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj". Ili brue postulis "disvolvono", dirante ke "devas esti libero de 'disvolvo'", ke "ĉiaj aferoj devas esti tolerataj kaj akceptataj", ke "devas esti libera konkurso", ke "revizia limigo estu reduktita", ke "ne devas esti tro multe da intervenoj" kaj ke "ne estu kruda". Ili uzis tiajn sloganojn por malfermi la vojon por la eligo de iliaj venenaj herbaĉoj kaj krei publikan opinion

por siaj konspiraj aktivadoj por burĝa restarigo.

Ili komplete distordis la principon de Prezidanto Maŭ de "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj", kaj fortranĉis la klasan enhavon de tiu ĉi granda politiko. "Samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj" estas la klasa politiko de la proletaro kaj celas firmigi la proletan diktaturon kaj prosperigi la proletan kulturon. Eksplikante tiun politikon, Prezidanto Maŭ diris: "Ni ankoraŭ devas fari longdaŭran bataladon kontraŭ la burĝa kaj etburĝa ideologio. Estas erare ne kompreni tion kaj forlasi la ideologian lukton. Ni devas kritiki ĉiajn ideojn erarajn, ĉiajn herbojn venenajn kaj ĉiajn demonojn kaj diablojn, kaj neniel permesi ilin inundi senbride." Li ankoraŭ diris: "Disvolvo signifas senrezerve permesi ĉiujn esprimi siajn opiniojn libere, por ke oni kuraĝu paroli, kuraĝu kritiki kaj kuraĝu debati". Sed la t. n. disvolviĝo de ili signifas burĝan liberaligon, kiu permesas nur disvolviĝon de venenaj herbaĉoj sed ne disvolviĝon de aromaj floroj, kaj permesas nur la destruktojn esprimi siajn opiniojn sed ne la maldekstrulojn fari refuton. Tio signifas diktaturon de la burĝaro super ni la proletaro, kaj tion ĉi ni absolute ne povas permesi! Ni nepre agos laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj elradikos ĉiujn venenajn herbaĉojn disvastigitajn de vi.

Ĉu "ne estu kruda?" Vere krudaj estas neniu aliaj ol la burĝaj sinjoraj moŝtoj. "Artikolo de malgrandaj personoj", "la partia ĵurnalo ne estas forumo por libera debato" — ĉu ĉio ĉi tio ne estas dirita de ili? Iliaj vortoj ankoraŭ sonas en la oreloj, do neniel estas malkonfeseblaj.

Kamaradoj! En lokoj sub ilia regado, eĉ unu sola ĝermo de la proletaro ne estas permesita kreski. Ĉu tio ĉi ne estas kruda? Apenaŭ novaj aferoj ekaperas, ili tuj intencas freneze subpremi, moki, insulti, tirani, ataki, sieĝi kaj strangoli ilin, alprenante ĉiam la ekstreman paŝon. Ĉu ankoraŭ troviĝas io pli kruda ol tio ĉi?

Apenaŭ kelkaj modeloj estas kreitaj dum la revolucio de la pekina opero, la burĝaj sinjoraj moŝtoj tuj klopodis ilin subpremi kaj subfosi. Kaj fiaskinte en tio, ili komencis insulti senbride per amaso da kulpigoj, dirante ke "modernaj pekinaj operoj estas sengustaj kiel bolinta akvo", ke "tio estas nur moderna dramo plus kantado". Guste kiel niaj avangardaj batalantoj en la pekina opera revolucio diris, "Tiuj homoj estas ja sensciuloj! Ĉu bolinta akvo estas io malbona? Nur se oni havas bolintan akvon, oni povas infuzi teon kaj prepari vinon. Sen akvo oni eĉ ne povas sin vivteni. Ĉu 'moderna dramo plus kantado' estas io malbona? Ja la pekinaj operoj de ĉiam estas moderna dramo plus kantado. Ĉu povas esti opero

sen parolo kaj kantado?" Burĝaj sinjoraj moŝtoj, por oponi modelon starigitan en la pekinopera revolucio, vi eĉ forgesis la deĉecon kaj diris tiajn absurdaĵojn kaj delirojn. Ĉu tio ĉi tamen ne estas kruda? "La modernaj pekinaj operoj estas sen-gustaj kiel bolinta akvo"! "Moderna dramo plus kantado"! Ĉu vi ankoraŭ ne volas konfesi vian fiaskon? Bonvolu kompari la plej bonajn malnovajn pekinajn operojn kun niaj modelaj operoj! Ja en kiu flanko ili povas sin kompari kun la niaj? Ja kiuj estas pli belaj — ĉu la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en niaj modernaj operoj aŭ la ge-sinjoraj moŝtoj kaj iliaj geidoj en la malnovaj pekinaj operoj? La imperiestroj, reĝoj, generaloj, ministroj, dandoj kaj belulinoj sur la scenejo de la malnova pekina opero estas ege malbelaj de ilia animo ĝis ilia aspekto. Ĉu ili estas kompareblaj kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur nia scenejo? Ili estas ege nekompareblaj kun la niaj eĉ en arto, por jam ne paroli pri la kvalitoj de politiko kaj ideologio. Ĉu troviĝas en niaj modernaj operoj tiaj malstreĉeco, longtirateco kaj mallakoneco kiaj en la malnovaj pekinaj operoj?

La malnova pekina opero ludiĝis dum 130-140 jaroj, dum ni surscenigis la novajn nur por 3-4 jaroj. La 3-4 jaroj de la novo jam venkis la 130-140 jarojn de la malnovo. La revolucio frape dolorigis la burĝajn sinjorajn moŝtojn kaj via arbitra regado ne plu povas esti konservata. Do vi ruze nin kulpigis dirante, ke ni estas krudaj. Tio ĉi ja estas konfuzo de nigro kaj blanko kaj inversigo de pravo kaj malpravo! Ĉu ni estas krudaj? Ni estas tro ĝentilaj. Estas pli bone, ke vi reprenu ĉion ĉi tion!

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj la plenmano da kontraŭ-revoluciaj reviziistoj plej timas la amasan kritikon kaj ili insultas, ke nia kritiko estas "klabo". Prezidanto Maŭ diris: "**Ni devas subteni ĉion, kion la malamiko oponas.**" Tio, kion ili timas, estas ĝuste tio, kion ni porpledas. Ni ja devas disvolvi amasan literaturan kaj artan kritikon. Se tiu ĉi amasa kritiko estas nomata "klabo", do ĝi estas la proleta "ŝtalklabo" kaj "orklabo" speciale por bati la burĝaron kaj reviziismon. Ĝi estas ja trezorega. Kaj krome, ni diras al la burĝaj sinjoraj moŝtoj: tiu ĉi speco de "klabo" estos ege plifortigita tra la granda proleta kultura revolucio.

La "specialista" linio en literatura kaj arta kritiko nepre devas esti frakasita. Estas tute erare fari literaturan kaj artan kritikon "ebura turo" de intelektuloj, afero monopoligita de malmulte da personoj.

La okuloj de la amasoj estas akregaj. La armilo de literatura kaj arta kritiko devas esti mastrata de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Ĉar tiuj, kiuj plej multe zorgas pri la proleta revolucia afero, kiuj plej amas la proletan diktaturon, estas la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Nur kiam la centmilionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj tra la lando estas mobilizitaj por ekzameni literaturajn kaj artajn verkojn, la vere venenaj herbaĉoj povas esti elradikitaj kaj la vere aromaj floroj esti protektataj. Nur kiam ili estas mobilizitaj al ekzameno pri literaturaj kaj artaj verkoj, la kvalito de la verkoj povas esti altigita kaj krea afero de revolucia literaturo kaj arto povas prosperi.

Bonega estas amasa literatura kaj arta kritiko, kaj ni devas varme ĝin akلامي.

Kamaradoj! La senprecedenca granda proleta kultura revolucio jam malfermis novan epokon, kiu provizos bonegajn kondiĉojn por granda disvolviĝo de proletaj literaturo kaj arto. La putra malnova kulturo de la ekspluatataj klasoj disfalis sub la atako de la ŝtormo de la granda proleta kultura revolucio. Nova epoko de brila revolucia kulturo jam alvenis!

Prezidanto Maŭ instruas nin, ke la batalo inter la proletaro kaj la burĝaro kaj inter la du linioj de tiuj du klasoj estas longdaŭra, zigzaga kaj komplika. "**La demando kiu venkos kaj kiu malvenkos en la revolucio povos esti solvita nur en tre longa historia periodo.**" Ekde nun, la malamiko ankoraŭ kondukos batalon kontraŭ ni por sia restariĝo. La kultura pozicio troviĝas sur la fronto de la klasa batalo, do la batalo estas ankoraŭ pli komplika kaj malfacilega. Sur la antaŭenmarŝa vojo ni renkontos ankoraŭ novajn malfacilojn kaj obstaklojn. Sed la antaŭen ruliĝanta rado de la historio estas ne rezistebla, la senlime potenca sunbrilo de la penso de Maŭ Zedong prilumas nin kaj do neniaj malfaciloj kaj obstakloj povos haltigi niajn antaŭenmarŝantajn paŝojn.

Kamaradoj! Novaj venkoj atendas nin. Ni armu nin per la brilaj verkoj de nia granda gvidanto, senĉese nin remuldu, firme sekvadu Prezidanton Maŭ kaj la revoluciajn laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, seninterrompe kaj ĉiam konduku revolucion. Ni batalu por defendi la grandan proletan diktaturon kaj konstruu proletan revolucion kulturon, la plej grandiozan kaj plej brilan kulturon en la homa historio!

Ĉiuj reakciuloj, kiuj provas iri kontraŭ la tajdo de la historio, tremu antaŭ la grandaj venkoj de la proletaro!


Vivu la granda proleta kultura revolucio!

Vivu la proleta diktaturo!

Vivu la granda Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Vivu, vivu, longe vivu nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ!



Novaj eldonoj de la tri revoluciaj trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ: Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto kaj Versaĵoj de Prezidanto Maŭ.

Reeldono de la Brilaj Verkoj de Prezidanto Maŭ pri Literaturo kaj Arto

DUM la tagoj kiam estis celebrata la 25-a datreveno de la publikigo de *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, la Popola Literatura Eldonejo en Pekino reeldonis la jenajn tri trezorajn librojn de revolucio: *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, *Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto* kaj *Versaĵoj de Prezidanto Maŭ*, kiuj nun estas distribuataj en diversaj lokoj de la tuta lando.

Al la ĉi-foje reeldonita *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* estas aldonita la redakcia noto de Hongqi (*Ruĝa Flago*) sub la titolo "Kompaso por la Granda Proleta Kultura Revolucio", aperigita en ĝia 9-a numero de 1966, okaze de la republikigo de la sama verko en tiu gazeto. La libro *Prezidanto Maŭ pri Literaturo kaj Arto* konsistas el *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, *Pri Nova Demokratio (parto)*, *Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro* kaj aliaj verkoj de Prezidanto Maŭ pri literaturo kaj arto. Al ĉi tiu reeldono estas nove aldonita la "Letero pri la Problemo de *Studo pri la Romano 'Songo de Ruĝa Buduaro'*" skribita de Prezidanto Maŭ en la 16-a de oktobro, 1954.



VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

(en Esperanto)

358 P.

9 x 13 cm.

En poŝformato kun
ruĝa plasta kovrilo

prezo: £. 0-2-0

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas: Libro servo de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, Ĉinio

Aĉetu ĉe niaj perantoj en via lando aŭ rekte ĉe
ni — Libro servo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O.
Kesto 313, Pekino, Ĉinio. Katalogo laŭ peto.

"Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto" en Japanlingva Traduko Eldoniĝis en Tokio

LA japana librejo *Oriente* eldonis en majo de la kuranta jaro *Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto* en japanlingva traduko. En la antaŭparolo de tiu libro, la tradukintoj Kenji Asakawa kaj Hikotaro Ando, japanaj famkonataj revoluciaj kleruloj, alte prilaudis la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kaj la grandan proletan kulturen revolucion de Ĉinio.

Tiu japanlingva eldono de *Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto* tradukiĝis kaj eldoniĝis laŭ la samtitola libro eldonita de la Popola Eldonejo de Ĉinio.

Sur la kovrilo presiĝis la profila portreto de la granda gvidanto de la mondaj popoloj Prezidanto Maŭ kaj sur la frontispico la surskribo de la intima batalmiko de Prezidanto Maŭ, kamarado Lin Biao: "Studu la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn instruojn kaj agu laŭ liaj instrukcioj."

La eldoniĝo de tiu ĉi granda verkaro de Prezidanto Maŭ en Japanio celis memorigi la 25-an datrevenon de la publikigo de *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ por energie propagandi en Japanio la senlime brilan penson de Maŭ Zedong.

Poŝtmarkoj Memore al la 25-a Datreveno de Publikigo de "Paroladoj"

MEMORE al la 25-a datreveno de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, la Ministerio de Poŝto kaj Telekomunikoj emisiis ekde la 23-a de majo serion da memorigaj poŝtmarkoj kun jenaj desegnoj:

La unua: Citaĵo el *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*: Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por ili kaj utiligataj de ili.

La dua: Literatura kaj Arta Propagandgrupo pri la Penso de Maŭ Zedong.

La tria: Citaĵo el *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*: Ke literaturo kaj arto bone fariĝu konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, servu kiel potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpu la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuanime.





Revolucia simfonio Ĝagiabang

Aklamo pri la Sukcesa Prezentado de la Ok Modelaj Revoluciaj Teatraĵoj en Pekino



Ŝaŭ Gianbo gvidas la persekutan taĉmenton propagandi la politikon de la Partio kaj mobilizi la amason — sceno el la revolucia moderna pekina opero Sagaca Kapto de la Tigra Monto.

DE la 20-a de majo ĝis la 15-a de junio, la ok modelaj revoluciaj teatraĵoj, nome la pekinaj operoj *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *La Haveno*, *La Ruĝa Signal-lanterno*, *Ŝagiabang* kaj *Surprizatako kontraŭ la Blanktigra Regimento*, la baletoj *Blankhara Knabino* kaj *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj la simfonio *Ŝagiabang*, kiuj dissendas la brilajn radiojn de la penso de Maŭ Zedong, estis samtempe prezentataj en la ĉefurbo, meze de la huraado de centmilion-nombra revolucia popolo, kiu plej entuziasme celebris la 25-an datrevenon de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*. Tio ĉi estis grandioza revuado pri la brilaj sukcesoj de la proleta literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj peza bato al la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj la kontraŭrevolucia reviziisma literatura kaj arta linio, kiu havas lin kiel la ĉefan postkulisan subtenanton!

Ĉi tiuj revoluciaj modernaj pekinaj operoj, baletoj kaj simfonio, naskiĝintaj en la serioza klasbatalo, estas brilaj perloj en la trezorejo de la proletaj literaturo kaj arto. Ilia naskiĝo starigis brilajn modelojn por la disvolvigo

de la novaj literaturo kaj arto de la proletaro. Per sia klara politika enhavo de servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la proleta politiko kaj al socialismo, per sia granda infekta forto de arto, ĉi tiuj modelaj revoluciaj teatraĵoj, senprecedencaj en la historio de literaturo kaj arto, paligis ĉiujn t. n. artajn kreaĵojn de la burĝaro, reviziismo kaj feŭdismo.

La prezentado de la ok modelaj revoluciaj teatraĵoj sur ĉefurbaj scenejoj daŭris 37 tagojn en sume 218 prezentoj kaj akceptis ĉirkaŭ tricent tridek mil spektantojn. Tiu ĉi grandioza prezentado akiris altan laŭdon kaj entuziasman aklamon de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili laŭdis, ke ĝi estas brila frukto de la proleta kultura revolucio kaj granda venko de la penso de Maŭ Zedong! Ĉiuj ĝojis el la tuta koro kaj forte emociiĝis post la spektado de la modelaj revoluciaj teatraĵoj. Ili diris, ke de la komenco ĝis la fino, ĉiu el tiuj modelaj revoluciaj teatraĵoj prikantas la brilan penson kaj proletan revolucion linion de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj prikantas laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, kiuj estas armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj havas altan komunisman idealon kaj



La batalantoj de la Ĉina Laborista kaj Kamparana Ruĝa Armeo dancas kune kun la vilaĝanoj la Pajlo-ĉapelan Dancon — sceno el la revolucia moderna baleto Ruĝa Virina Taĉmento.

grandan animon. Ĉiuj tiuj teatraĵoj donis al ili ege profundan edukon kaj kuraĝigon kaj igis ilin pli ami senlime Prezidanton Maŭ, la plej plej ruĝan sunon en nia koro. La spektintaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj fiere diris: “Bonegaj estas la modelaj teatraĵoj! La kantoj kaj la vortoj ĉiuj iras rekte en nian koron; tiuj teatraĵoj ja estas vere niaj, de ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.” Dum la prezentado, la altaj figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur la scenejo foje-refoje elvokis fortajn resonojn ĉe la spektantaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Multaj rigardantoj emociitaj ĝis larmo ne povis sin deteni de foja-refoja manklakado por esprimi

sian amegon al la modelaj revoluciaj teatraĵoj kaj sian laŭdon al la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj, kiuj sukcese modlis tiujn brilajn altajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Fremdlandaj amikoj, kiuj rigardis la modelajn revoluciajn teatraĵojn, ankaŭ ne povis regi sian elkoran ĝojon. Kun emocio ili diris: “La vojo kiun vi nun malfermas, estas irota ankaŭ de la revoluciaj literaturo kaj arto de la tuta mondo; la revolucia literatura kaj arta direkto de Prezidanto Maŭ estas ankaŭ la revolucia literatura kaj arta direkto de la tuta mondo. Hodiaŭ, kiam la kulturoj de imperiismo kaj moderna reviziismo putras kaj deka-

Kun sia bajoneta subplotono Jang Vejcaj rekte entrudiĝis en la sidejon de la Blanktigrigra Regimento kaj kaptas vivajn la estron de la regimento kaj la usonan militan konsiliston — sceno el la revolucia moderna pekina opero Surprizatako kontraŭ la Blanktigrigra Regimento.



dencas, monte stariĝis sur la socialisma literatura kaj arta scenejo de Ĉinio la brilaj figuroj de herooj el inter laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj — la mastroj de la historio. La naskiĝo de la ok modelaj teatraĵoj malfermis novan epokon de la proletaj literaturo kaj arto kaj donis ekzemplon al la literaturo kaj arto de la tutmonda proletaro. Post rigardo de la prezentado, iuj fremdlandaj gastoj nereteneble ekkriis: “Vivu! Longe vivu Prezidanto Maŭ!”

Ĉifoja kuna prezentado donis al revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj grandegan kuraĝigon kaj stimulon. Ili sentis, ke la fakto, ke ili havas ŝancon prezenti en la ĉefurbo la modelajn revoluciajn teatraĵojn en la alta tajdo de la proleta kultura revolucio kaj en la brila festo, kiam centmilion-nombra popolo ĝoje celebras la 25-an datrevenon de la publikigo de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ, estas senlimaj zorgo kaj fido montritaj al ili de Prezidanto Maŭ kaj la popolo de la tuta lando. Ili esprimas ke ili nepre estos ĉiam fidelaj soldatoj de la literatura kaj arta armeo de la penso de Maŭ Zedong, pli bone studos kaj aplikos kreive la verkojn de Prezidanto Maŭ, pli alte tenos la standardon de la *Paroladoj*, profundigos inter laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, lernos de ili, solide remuldos sian mondkoncepton, realigos revoluciigon de la ideologio, aktive tenos la revolucion kaj forte stimulos la produkton, neniam kontentiĝos pri la jam akiritaj sukcesoj, nepre kreos pli multajn, pli altajn, pli bonajn revoluciajn modelojn en ĉiuj kampoj de literaturo kaj arto, por ke la ĝardeno de la proletaj literaturo kaj arto estu plena de aromaj veluraj herbejoj kaj buntaj freŝaj floroj.

La prezentado de la ok revoluciaj modelaj teatraĵoj sur niaj scenejoj estas deklaro al la tuta mondo, ke sub la senlime brila penso de Maŭ Zedong, en la kampo de socialisma kulturo, aperos en nia lando printempo, en kiu plene floros kune ĉiuj floroj. Venas jam la epoko, en kiu laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj staras sur la literatura kaj arta scenejo kun levitaj kapoj.



Li Tiemej transprenas la ruĝan signal-lanternon de revolucio por daŭrigi la proletan revolucion aferon — sceno el la revolucia moderna pekina opero La Ruĝa Signal-lanterno.

Hi-er indigne akuzas Huang Ŝifen antaŭ la samvilaĝanoj pri liaj krimoj — sceno el la revolucia baledo Blankhara Knabino.





La portistoj de la haveno sinforseme laboras por la revolucio de Ĉinio kaj de la mondo — sceno el la revolucia moderna pekina opero La' Haveno.

Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direkttilisto

— Traduko de la kanto *Dahaj Hangŝing Kaŭ Dŭoŝoŭ*,
jam aperigita en la 7-a numero

Dahaj hangŝing kaŭ dŭoŝoŭ, (Navigadon en maro oni dankas al la direkttilisto,)
Ŭan u ŝengĝang kaŭ tajjang. (Ĉiuj vivaĵoj dankas sian kreskon al la suno.)
Julu ziĵun homjaŭ ĝuang, (Malsekigitaj de roso kaj pluvo, plantidoj kreskas fortaj,)
Gan goming kaŭ di ŝi Maŭ Zedong siŝjang. (Farante revolucion, oni apogas sin sur la
penso de Maŭ Zedong.)

Juer li bu kaj ŝuj ja, (Fiŝoj ne povas vivi for de akvo,)
Gŭaer li bu kaj jang, (Melonoj ne povas kreski for de sia stolono,)
Goming ĉjunĝong li bu kaj gongĉandang, (La revoluciaj amasoj ne povas forlasi la
Komunistan Partion,)

Maŭ Zedong siŝjang ŝi bu lŭo di tajjang. (La penso de Maŭ Zedong estas la nesubiranta
suno.)

bu lŭo di tajjang. (la nesubiranta suno.)

Herooj de la Proletaro

Okupu la Scenejon de

la Pekina Opero

LA somero de 1964 estis somero neordinara. Guste en tiu somero la revolucio de la pekina opero klaronis la marŝon de la granda proleta kultura revolucio de nia lando.

Sub la brilo de la granda penso de Maŭ Zedong, kaj dank' al la gvido de kamaradino Giang King kaj la penado de la vastaj revoluciaj kamaradoj en la rondo de la pekina opero, tiu ĉi speco de opero fine rompis la katenon de la kontraŭrevolucia reviziismo, alte starigis sur la opera scenejo la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ŝanĝis la scenejojn okupitajn de imperiestroj, reĝoj, generaloj, ministroj, dandoj kaj belulinoj en scenejojn kie brile rolas laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj transformis la propagandan pozicion de feŭdismo kaj kapitalismo en propagandan pozicion de la penso de Maŭ Zedong.

La opera pozicio estas tre grava pozicio de la batalo inter du klasoj kaj inter du linioj sur la literatura kaj arta batalfronto. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĉiam tre zorgas tiun pozicion. En 1944, post rigardo de *Premite al Liangŝan por Ribeli* prezentita de la Janana Pekin-opera Teatro, Prezidanto Maŭ montris: "La historio estas kreita de la popolo, sed sur la scenejo de malnova opero (kaj en ĉiuj la popolon forlasintaj malnovaj literaturaĵoj kaj artaĵoj) la popolo ja fariĝis feĉo, kaj la scenejon regas sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoridoj kaj sinjoridinoj. Tian ĉirkaŭigon de historio vi nun reinversigis, redonante al la historio ties propran fizionomion, kaj de nun la malnova opero akiris novan aspekton; tio ĉi meritas gratulon." Post la liberiĝo de la tuta lando,

Prezidanto Maŭ ankaŭ elmetis la gravajn orientilojn "Floru kune cent floroj, forigu la oldajn por elŝovi la novajn", "utiligu la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligu la fremdlandajn en servo al Ĉinio" kaj aliajn. La instrukcioj de Prezidanto Maŭ solvis serion da radikaj problemoj en la opera revolucio kaj estas la plej altaj kriterioj por ni en tiu revolucio.

La venko de la revolucio de la pekina opero en nia lando estas venko de la granda penso de Maŭ Zedong kaj granda venko en efektivigado de la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an!*

Okaze de la 25-a datreveno de la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, la vastaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj kaj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj de nia lando amase okazigis jubileajn kunvenojn kaj kunsidojn, faris paroladojn kaj skribis artikolojn por varme celebri la 25-an datrevenon de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ kaj la grandan venkon de la revolucio de la pekina opero!

En la revolucio de la pekina opero en nia lando, kamaradino Giang King faris eksterordinaran eminentan kontribuon. Dum la tagoj de ŝia laboro kaj batalo ŝultro-ĉe-ŝultre kun la revoluciaj laborantoj de la pekina opero, ŝi donis al ili neforviŝeblan impreson. Kun senlima estimo kaj adoro multaj laborantoj de la pekina opero skribis pri la por la tuta vivo neforgeseblaj horoj de kontakto kun kamaradino Giang King.



Tan Juanŝou en la rolo de Guo Gianguang

Tan Juanŝou estas membro de la Pekina Revolucia Komitato kaj aktoro de la Unua Pekin-opera Trupo de Pekino. En la revolucia modela opero *Ŝagiabang* li ludis rolon de Guo Gianguang, politika direktanto de iu trupo de la Nova Kvara Armeo. En sia artikolo li skribis:

“La Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ publikigita antaŭ 25 jaroj estas trezora libro por niaj revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de la proletaro.

“Prezidanto Maŭ montris: ‘Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamaso, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por ili kaj utiligataj de ili.’ En la praktikado mi profunde konvinkiĝis, ke la instrukcio de Prezidanto Maŭ estas senkompare saĝa kaj granda.

“Dum la pasintaj 17 jaroj, la kontraŭrevolucia reviziisma nigra linio de literaturo kaj arto kun la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kiel sia ĉefa postkulisa mastro longdaŭre kontraŭstaras la proletan literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ. En la kriza momento de la batalo inter du linioj, nia estimata kaj amata kamaradino Giang King alvenis al la Unua Pekin-opera Trupo de Pekino. Ŝi kunportis al ni la grandan penson de Maŭ Zedong kaj trahakis tute novan vojon por la revoluciigo de la pekina opero.

“Por ke la socialismaj literaturo kaj arto pli bone servu al la proleta politiko, kamaradino Giang King faris profundan, detalan kaj ĉiuf flankan esploron en la teatraj rondoj. Kiam ŝi unuafoje venis al nia trupo, ŝi akceptis nin, kelkajn junajn aktorojn. Ŝi demandis al ni, kial pli kaj pli malmultiĝas la spektantoj de la malnova pekina opero kaj kial junaj lernantoj ne ŝatas rigardi pekinajn operojn. Krome ŝi pacience klarigis al ni: Tio, ke sur la scenejo de operoj kaj teatraĵoj en la socialisma lando ankoraŭ estas prezentataj imperiestroj, reĝoj, generaloj, ministroj, dandoj kaj belulinoj, konformas nek al la socialisma ekonomia bazo nek al la sistemo de la diktaturo de la proletaro. En la


pasinteco nur imperiestroj, reĝoj, generaloj, ministroj, dandoj, belulinoj, bienuloj kaj bienulinoj estis prezentataj. Ĉu tio ne estis hontinda? Ŝi alvokis nin fari aferon neniam faritan de la antaŭuloj, konscie sin revoluciigi kaj stari sur la plejfronto de revolucio.

“Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj unuiĝinte kun la vasta revolucia kamaradaro de nia trupo, kamaradino Giang King plenumis la reverkadon kaj provludadon de la revolucia modela opero *Ŝagiabang* en la akra batalo kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziismo. Ŝia ekstreme respondecema spirito al la revolucia afero ege kuraĝigis kaj edukis nin kaj plifirmigis nian memfidon. Kaj ni faris firman decidon tutkore kaj tutanime servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj dum la tuta vivo.”

Li Lifang estas aktorino de la Ŝanhaja Pekin-opera Teatro. Ŝi rolas, en la revolucia modela opero *La Haveno*, kiel Fang Hajĝen, sekretario de la partia filio. En sia artikolo ŝi diras:

“La prezentata de ni revolucia opero kun moderna temo *La Haveno* estas kreita dank’ al la brilo de la penso de Maŭ Zedong kaj la intima zorgo kaj entuziasma direktado de kamaradino Giang King. Sur la vojo de la revoluciigo de la pekina opero kamaradino Giang King estas la plej antaŭe iranta portanto de la ruĝa standardo de la literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ. Por ke mi pli bone figuru la heroinon Fang Hajĝen, sekretarion de la partia filio, kamaradino Giang King klare montris ke mi iru al la Ŝanhaja Haveno por

Li Lifang en la rolo de Fang Hajĝen



profundiĝi en la vivon. Mi ripete studis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ en lia *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*: La revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj 'nepre devas iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn, en la solan plej vastan kaj plej riĉan fonton'. Mi alvenis al la doko de la Ŝanhaja Haveno por profundiĝi en la vivon kun la memfido fari la eksteran kaj internan subpremon kaj reziston movforto.

"Kiam mi unuafoje alvenis al la haveno mi estis tute altirita de la socialisma laborentuziasmo de la doklaboristoj. La streĉe funkcia Ŝanhaja Haveno tage kaj nokte en- kaj el-portas milojn kaj milojn da tunoj da materialoj. Argano kaj argano kiel montetoj, vico post vico da dependĉaroj kiel drakoj kun tondroj ŝarĝas kaj malŝarĝas per maŝinoj, grenoj kaj ĉiutagaj necesajoj barĝojn, oceanajn ŝipegojn kaj riverajn vaporsipojn. La haveno estas batalpozicio de la doklaboristoj, kie ili penas kapti ĉiun minuton kaj ĉiun sekundon por konstrui socialismon kun patriotisma kaj internaciisma spirito. Ili rigardas la ŝarĝadon kaj malŝarĝadon kiel politikan batalon, kaj la eksterordinara rapideco de ilia laboro tiel mirigis la maristojn de kapitalismaj landoj, ke ili ĝapadis kaj kriadis 'Brave!' kun starigita polekso. Starante sur la kajoj la doklaboristoj tenas la patrion en sia koro, kaj ĉirkaŭprenas la mondon en sia rigardo. Ilia kulmina entuziasmo por la efektivigo de sia grandanima kaj nobla idealo vokis en mi ardan deziron kompreni, kaj bone koni ilin kaj humile lerni de ili. Dum mi vivis kaj laboris kune kun la doklaboristoj, ili intime faris al mi kelkfojajn rememorojn pri la malnova socio kaj komparojn inter la nova kaj malnova socioj. Tio donis al mi profundan klasan edukon kaj konigis al mi, kial la doklaboristoj, peze subprematj de la 'tri montegoj' de imperiismo, la burokrataj kompradoroj kaj feŭdaj labormastraĉoj, havas tian ardan senton de suprenturniĝo kaj altan entuziasmon en laboro. Tial kiam mi faris la oficialan provludadon kun nia akirita sperto pri la dokista vivo, mi estis relative plena de memfido kaj revolucia spirito. La leciono de enprofundiĝo en la vivon ĉe la doko metis por mi pli bonan bazon por krei la heroan figuron de Fang Hajĝen.

"Dum la kreado de la pekina opero *La Haveno*, ekde la enprofundiĝo de la Trupo en la vivon kaj ripetada revizio de la dramo ĝis la provludado kaj prezentado, ĉiu antaŭenpaŝo rezultigis el venko en batalo kontraŭ la reviziisma linio.

"Okaze de la 25-a datreveno de la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, denova studo de tiu ĉi grava kaj brila literaturo pli fortigis mian memfidon pli bone surscenigi la heroajn figurojn de la laborista klaso per la pekina opero. Mi certe firme gravuros en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ: 'Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj nepre devas plenumi tiun ĉi taskon, ili nepre devas ŝanĝi sian starpunkton, iom post iom transigi ĝin al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la

flanko de la proletaro en la procezo de enprofundiĝo en la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, de enprofundiĝo en la aktualajn batalojn, kaj de studado de marksismo kaj la socio', tenante ĝin kiel devizon dum mia tuta vivo de la prezenta arto de la pekina opero. La heroaj figuroj de la proletaro armitaj per la penso de Maŭ Zedong okupu la socialisman scenejon!"

Du Ginfang estas aktorino de la Pekin-opera Teatro de Ĉinio. Ŝi ludis la rolon de Li Tiemej, la filino de la fervojisto en la modela opero *La Ruĝa Signal-lanternino*. En sia artikolo ŝi diras:

"Okaze de celebrado de la 25-a datreveno de la publikigo de la verko de nia plej estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* publikigis la grava parolado de kamaradino Giang King en la kunsido de partoprenantoj en interlerna prezentado de pekinaj operoj kun moderna temo en julio, 1964. La parolado de kamaradino Giang King estas grava dokumento por solvi la problemon de la revolucio de la pekina opero per marksismo-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong.

"Dum la pasintaj dekelkaj jaroj la malnova Propaganda Departemento de CK de KPĈ, la malnova Ministerio de Kulturaj Aferoj, la malnova Pekina Partia Komitato kaj iliaj ĉefaj postkulisaj mastroj — la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, levis demonan venton en la literaturo kaj arta rondo. Ili tuforte bojkotis la proletan literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, oponante la revolucionan reformon de operoj ke 'utiligu la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligu la fremdlandajn en servo al Ĉinio; forigu la oldajn por elŝovi la novajn', distrumpetante 'elfosi la tradiciojn' kaj 'heredi la skolojn'. La tiel dirata de ili 'elfosi la tradiciojn' estas elterigi la kadavrojn de la reprezentantoj de la subpremantaj klasoj kaj propagandi por ili por ke ilia fantomo daŭre regu la penson de la popolo kaj okupu la scenejon de la pekina opero. La enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon eĉ malkaŝe proponis prezenti la pekinan operon *Vizito al la Patrino*, kiu predikas perfidulan filozofion kaj filozofion de postvivigo, kaj la erotikan operon *Flirtado de la Imperiestro*. Kien iros la pekina opero? En tiu ĉi kriza momento la plej plej ruĝa suno en nia koro Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon 'Nepre ne forgesi la klasan batalon' kaj proponis firme teni la klasbatalon en ideologia kampo. Decideme praktikante la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ, kamaradino Giang King gvidis la revolucionajn literaturajn kaj artajn batalantojn konduki la literaturan kaj artan revolucion.

"En 1963 kamaradino Giang King akceptis nin kaj donis al ni dramon *La Ruĝa Signal-lanternino*. Tiu ĉi ruĝa lanternino lumigis nian koron kaj la vojon de la revolucio de la pekina opero.

"Ni neniam forgesos la diligentan laboradon de kamaradino Giang King por la perfektiga provludado de *La Ruĝa Signal-lanternino*. De la aranĝo de la strukturo de la dramo, la prezento de la sentimentoj de

roloj, la konkordigo de muziko kaj melodioj ĝis la projektado de belarto — ĉio ĉi saturiĝas de la zorgo de kamaradino Giang King. Por bone kreigi la grandajn figurojn — la tri generaciojn de la familio de Li Juhe, kamaradino Giang King kun ekstreme respondecema kaj ekstreme varmkora spirito antaŭ ĉio metis la politikon sur la unuan lokon. Ŝi ofte maldormis tutnokte, kelkfoje rigardis nian provludadon kaj donis konkretajn konsilojn pri prezentarto eĉ spite al sia malbonfarto. Per la malcedema batalspirito kamaradino Giang King venkis diversajn obstaklojn, superis ĉiujn malfacilojn, ege starigis la noblan moralon de la proletaro kaj peze batis la herezon de reviziismo kaj donis al ni brilan ekzemplon.

“Mi neniam forgesos, ke kamaradino Giang King donacis al mi *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* je la novjaro de 1965. Tenante per ambaŭ manoj la kvar volumojn de la trezora kolekto de la revolucia vero mi tre emociiĝis kaj bolis mia sango. Kie ajn ni estas, ĉu en aŭ ekster la lando, ĉie ni povas aŭdi la ĝojkrion ‘Vivu Prezidanto Maŭ’. Kiom da spektantoj sopiras aŭdi la voĉon de Prezidanto Maŭ kaj vidi la brilon de la penso de Maŭ Zedong en nia prezentado! Estante ordinara literatura kaj arta batalanto instruita de Prezidanto Maŭ, mi iom post iom komprenis, ke mia vivo devas esti tiu de studado de la penso de Maŭ Zedong kaj tiu de propagando pri la penso de Maŭ Zedong. Antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ mi solene ĵuras: Mi aŭskultos viajn vortojn kaj ĉiam antaŭenmarŝos dum la tuta vivo laŭ la montrita de Vi direkto ke la literaturo kaj arto servu al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.”

Gaŭ Venkuj estas aktoro de la Ŝanhaja Pekin-opera Teatro, kiu ludas la rolon de la veterana doklaboristo Gaŭ Ĝijang en la modela opero *La Haveno*. En sia artikolo li diras:

“Antaŭ 1964 la scenejo de la pekina opero en Ŝanhajo estis regata de hereza atmosfero kaj okupata de imperiestroj, reĝoj, generaloj, ministroj, dandoj, belulinoj, demonoj kaj diabloj. Fronte al la akra kaj komplika klasbatalo kamaradino Giang King elpaŝis kaj lanĉis, kun la revolucia sentimeco de la proletaro, ofensivon al la kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra linio de literaturo kaj arto. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kamaradino Giang King faris eksterordinaran eminentan kontribuon al la revolucio de la pekina opero.

“Prezidanto Maŭ instruas nin: ‘Literaturo kaj arto bone fariĝu konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, servu kiel potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpu la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuamente.’ Tamen, la pekina opero prezentis nur imperiestrojn, reĝojn, generalojn, ministrojn, dandojn kaj belulinojn, ludante rolon nur en detruado al la socialisma ekonomia bazo. La revolucio de la pekina opero gvidata de kamaradino Giang King radike solvis la problemon fari la pekinan operon tute nova arto de la proletaro. Nun mi efektive suriris la revolucion vojon de servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj komencis novan vivon de mia prezentarto. Sub la



Gaŭ Venkuj en la rolo de Gaŭ Ĝijang

rekta direktado de kamaradino Giang King ni reviziis kaj prezentis la pekinan operon kun moderna revolucia temo *La Haveno*. En tiu ĉi opero mi ludis la rolon de ŝarĝgrupestro, komunisto Gaŭ Ĝijang. Laŭ la instrukcio de kamaradino Giang King mi unue iris al doklaboristoj por enprofundiĝi en la vivon. En la daŭro de kvar monatoj de mia vivspertado, la heroa spirito kaj nobla kvalito de doklaboristoj ke starante ĉe la haveno ili tenas la patron en sia koro kaj ĉirkaŭprenas la mondon en sia rigardo, edukis min kaj igis min pli kapabla prezenti la karakteron de la laborista klaso. Post rigardo de nia prezentado prilaudanta ilin, la doklaboristoj unuvoĉe ĝojkriis: ‘Bonege!’ Ili diris: ‘Vi ĵetis per piedbato la imperiestrojn, reĝojn, generalojn kaj ministrojn de sur la scenejo kaj unuafoje surscenigis nin doklaboristojn. Tio ĉi estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong!’ La apero de la heroaj figuroj de doklaboristoj sur la scenejo tuj akceptis varman bonvenigadon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kiel aktoro prezentinta malnovajn operojn dum kelkdek jaroj mi sentis unuafoje en mia vivo, ke mi vere servas al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

“Pri la Revolucio de la Pekina Opero de kamaradino Giang King eldiris tion, kio estas en mia koro. Mi certe ĉiam sekvas la instrukcion de kamaradino Giang King, alte tenos la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj prezentos revolucionajn operojn dum la tuta vivo. Mi decidis ne nur bone prezenti la doklaboriston en *La Haveno*, sed ankaŭ kreas pli multe da heroaj figuroj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la epoko de Maŭ Zedong kaj servos al la politiko de la proletaro kaj servos al socialismo.”

Modlo de la Alta Figuro de Proleta Heroo

Celebrante la 25-an datrevenon de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* en la tempo, kiam la granda proleta kultura revolucio eniris en la stadion de decida batalo, mi estas en tre granda emocio. Kiam la malpura reviziisma atmosfero regis la tutan scenejon de la pekina opero kaj la tutan literaturan kaj artan rondon, estis kamaradino Giang King, kiu elpaŝis fari pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ tiu nigra literatura kaj arta linio de kontraŭrevolucia reviziismo kaj defendi la proletan revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kamaradino Giang King persone gvidis nin redakti la scenaron de la revolucia moderna pekina opero *La Ruĝa Signal-lanterno* kaj provludi ĝin, kaj per tio sonorigis la klarigon por marŝo al la revolucio de la pekina opero.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: “La problemo por kiuj estas literaturo kaj arto estas problemo

fundamenta, problemo de principo.” Voli prezenti modernan operon ne signifas ke tiu problemo jam estas solvita. Tra la kreado de la pekina opero *La Ruĝa Signal-lanterno* ja kuris kompleksa kaj akra klasbatalo. La fokuso de la batalo koncentriĝis sur la problemon kiel elstarigi la altan figuron de Li Juhe.

Kamaradino Giang King indikis, ke oni devas fari scenaron de la pekina opero *La Ruĝa Signal-lanterno* sur la bazo de la samnoma ŝanhaja opero. En la scenaro oni devas nepre elstarigi la figuron de Li Juhe, heroo de la laborista klaso. Ŝi diris, ke Li Juhe estas ne nur reprezentanto de la laborista klaso, sed ankaŭ reprezentanto de la revoluciaj martiroj kaj komunisto, kaj ke li estas granda homo kaj proleta heroo, kaj oni devas meti la gravitan punkton sur lin kaj elstarigi lian altan figuron. Sed, dum la redaktado de la scenaro de *La Ruĝa Signal-lanterno*, la kontraŭrevoluciaj reviziistoj trompis la superulojn, blokadis informojn al la

subuloj, kaj agis laŭ sia propra opinio post la dorso de kamaradino Giang King. Ili ne elstarigis la heroan figuron de Li Juhe, sed pledis por “egala divido inter la tri generacioj”, kaj eĉ kunpremismis Li Juhe per plenigo de multaj scenejaj agadoj de negativaj figuroj. Ili ellasis la bonajn partojn de la scenaro de ŝanhaja opero *La Ruĝa Signal-lanterno*, disvolvis ĝiajn malbonajn, kaj eĉ enportis malbonajn de aliaj operospecoj.

“Eldanĝerigo en Kaĉa Butiko” estas la sola sceno, kiu priskribas la subteran laboron de Li Juhe kaj lia kontakto kun la amaso. Tiu sceno rekte prezentas, kiel Li Juhe intime vivas inter la malriĉaj laborantaj amasoj kaj dividas kun ili la ĝojon kaj malĝojon, feliĉon kaj malfeliĉon, kaj kiel li kondutas sagace kaj brave, aplombe kaj lerte, sen ia ajn konfuziĝo kaj timo antaŭ la malamiko. Sed, la kontraŭrevoluciaj reviziistoj diris ke tiu sceno ne havas ion “ludindan”, kaj sub la preteksto “adaptiĝi al la karaktero de la pekina opero” forhakis la tutan scenon, lasante Li Juhe poste rakonti sian eldanĝerigon en formoj de paroloj kaj kantado en la kvara sceno. Tio fakte devigis

Li Juhe sin laŭdi mem antaŭ la maljuna Avino kaj Tiemej, kaj estas tute nekonforma al la karaktero de komunisto kaj al la discipliniteco de subtera laboranto. Nur pro la kritiko kaj insistado de kamaradino Giang King ili estis devigitaj ree aldoni tiun scenon. Sed dum la provludado, ili intence malbonigis tiun scenon por refoje forhaki ĝin.

Ankaŭ trairis batalo dum la redaktado de la sceno “Lukto kontraŭ Hatojama ĉe Bankedo”. Laŭ la esenco de la instrukcio de kamaradino Giang King, oni devis refoje sursceniĝi Li Juhe post lia ricevo de torturado, por pli bone montri lian nesubigeblan heroan temperamenton kaj lian altan spiritan forton povantan subigi ĉiajn putrajn reakciajn fortojn. Sed, sub la preteksto ke lia resursceniĝo donos nenion “ludindan”, la kontraŭrevoluciaj reviziistoj rifuzis plenumi la instrukcion de kamaradino Giang King dum longa tempo. Kontraŭe, ili lasis Vang Lian-gju, la perfidulon, multfoje sursceniĝi post sia perfido. Dank’ al la persista batalo de kamaradino Giang King, la sceno poste estis tiel reviziita, ke post la torturado, Li Juhe

Li Juhe (maldekstre, ludata de Kian Haŭliang) kolere kondamnas Hatojama, elmontrante sian neflekseblan heroismon de komunisto — sceno el la revolucia moderna pekina opero La Ruĝa Signal-lanterno.





Kian Haŭliang kantas el la revolucia moderna pekina opero La Ruĝa Signal-lanterno por la membroj de Sigiking-popol-komunumo en antaŭurbo de Pekino.

forte kondamnas Hatojama kvazaŭ en la pozicio de juĝisto, kaj tio montras la heroan naturon de Li Juhe: "Absolute ne eblas klini mian kapon."

Kamaradino Giang King instrukiis, ke en la sceno de "Lukto en la Ekzekutejo" Li Juhe devas havi longan kantadon, por ke en tiu sceno li plene elmontru sian revolucionan heroan spiriton kaj elkantu sian idealon al la revolucio kaj firman fidon pri la nepra venko de la revolucio. Pere de tio elmontriĝu, ke pli firma restas la volo de Li Juhe post la ricevo de torturado. Kvankam li scias ke li estos tuj mortigita de la malamiko, tamen li ne-ŝanceleble persistas pri sia justa afero kaj aplombe spitas la morton. Irante al la ekzekutejo, li alte kantas:

*Alte flirtas la revolucia ruĝa flago,
Jam bruliĝis la kontraŭjapana militfajro,
Kiom longe restos por vi, japanaj diabloj,
Ankoraŭ la tempo por senbrida tiranado?
Buntos ja denove la florar' post vent' kaj pluvo.
Kaj nova Ĉinio brilos sune en la mondo.*

*Tiam flirtos ruĝaj flagoj tra la tuta lando,
En pripens' de tio, des pli kreskas mia fid' kaj volo.*

Tiamaniere, profunde elmontriĝas la spirita mondo de Li Juhe, lia revolucia heroismo teni la patrimon en zorgo kaj ĉirkaŭpreni la mondon per rigardo kaj lia revolucia optimisma spirito, sekve lia heroa figuro estas sublimigita ĝis la plej granda alteco kaj la tuta opero atingas sian kulminon. Laŭ la esprimo maniero de la pekina opero, oni povas torente elverŝi la koron de la revoluciulo, esprimi la per sango ligitan klasan senton de la tri generacioj de la familio de Li Juhe kaj manifesti la noblan revolucionan idealon de la komunisto nur pere de longa serio da kantoj en perfekte belaj melodioj. Sed la kontraŭrevoluciaj reviziistoj diris absurde, ke en tiu sceno ne estas konvene tro multe kantigi Li Juhe, ĉar tio lacigus la rigardantojn. Ili krome senbride predikis "homecon", intencante eksciti la rigardantojn per la amo inter patrino kaj filo de ekspluata klaso kaj energie emfazi la terurecon de la batalo en la ekzekutejo per sceno de kruela torturado al Li Juhe kaj lia patrino.

Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke en la arta kreado oni devas atingi **“unuigon de politiko kaj arto, unuigon de enhavo kaj formo, unuigon de revolucia politika enhavo kaj laŭeble plej perfekta arta formo”**. Tial, kamaradino Giang King postulis nin modli Li Juhe, la heroan figuron proletan, per ĉio bela kaj bona. Tio estas prezenti Li Juhe per la plej bela muziko, plej bonaj melodioj, plej imponaj gestoj kaj plej elstariga situo sur la scenejo, por pli bone reliefigi, perfektigi kaj altigi tiun heroan figuron. Sed, dum la provludado, la kontraŭrevoluciaj reviziistoj ja malobeis tiun instrukcion de kamaradino Giang King.

Ekzemple, en la unua sceno, ili aranĝis unue ke Li Juhe iru sur la scenejon, kovrante sian vizaĝon per basko de la surtuto en streĉita muzika etoso, kaj mienu streĉite post la sursceniĝo. Tio distordis la singardemon de la subtera laboranto en timemon kaj malkuraĝon. Tiel, tuj ĉe la sursceniĝo, Li Juhe donis al la rigardantoj palan impreson, sed ne montris sin figuro de bravulo. Ili diris absurde ke nur per tio la sceno povas **“kapti la rigardantojn tuj ĉe la komenco”**. Nur dank’ al la insistado de kamaradino Giang King, poste rearanĝiĝis tiel, ke Li Juhe paŝas sur la scenejon per firmaj paŝoj kun ruĝa signal-lanterno en la mano, kaj post veno al la sceneja fronto li ekobservas la ĉirkaŭaĵon vizaĝe al la rigardantoj. Tio donas al la rigardantoj senton de trankvilo kaj sentimo, kaj, samtempe, ankaŭ elmontriĝas revolucia singardemo. Tiamaniere, la sursceniĝo de Li Juhe tuj donas al la rigardantoj la impreson de alta heroa figuro.

En la kvina sceno, sub la direktado de kamaradino Giang King, la parto ekde la hejmmreveno ĝis la arestiĝo de Li Juhe estis tiel rearanĝita: Tuj post kiam Li Juhe eniras la pordon, li trovas ke io okazis, kaj ekscias ke li eble estos arestita. Li do tuj komunikas al la maljuna avino bataltaskon. Dum la brava adiaŭo, la maljuna avino prezentas al Li Juhe bovlon da vino por kuraĝigi lian batalvolon. Tio esprimas ke en la kriza momento, Li Juhe pensas antaŭ ĉio ne pri sia propra vivsekureco, sed pri la interesoj de la revolucio kaj la laboro de la Partio. Kaj tio montras la revolucion spiriton de la tri generacioj de la familio de Li Juhe, ke por la revolucio ili antaŭen marŝas unu sekvante alian, se nur restas ankoraŭ unu homo, tiu daŭre batalas plu.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: “Se vi estas burĝa literaturisto aŭ artisto, vi prikantas ne la proletaron sed la burĝaron; se vi estas proleta literaturisto aŭ

artisto, vi prikantas ne la burĝaron sed la proletaron kaj la laborantan popolon: unu el la du kazoj devas esti.” Dum la scenarigado kaj provludado de *La Ruĝa Signal-lanterno*, la sinteno al Li Juhe, ĉu meti la gravitan punkton sur la modladon de Li Juhe, la heroa figuro, aŭ ne, ja ne estis problemo de arta traktado, sed problemo de starpunkto, ĉe kiu flanko stari, al kiuj servi, ĉu subteni kaj praktiki la proletan revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, aŭ oponi kaj rezisti kontraŭ ĝi. Kaj ĝi estis ankaŭ la akvodivida montkresto inter la literaturistoj kaj artistoj de la proletaro kaj tiuj de la burĝaro. Tio estis akra batalo inter la du klasoj kaj du linioj. En tiu ĉi batalo, alte tenante la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong pri literaturo kaj arto, kamaradino Giang King ĉiam persistis pri la direkto de servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de literaturo kaj arto, kaj gvidis nin en trarompado de la multtavola sieĝo, venkado de multaj malfaciloj, frakasado de diversaj intrigoj kaj konspiroj de la reakciaj reviziistoj, tiel ke ni fine sukcesis en la scenarigado kaj provludado de la revolucia moderna pekina opero *La Ruĝa Signal-lanterno* kaj elmodlis altan proletan heroan figuron sur la scenejo de la pekina opero.

La sukceso de la revolucia moderna opero *La Ruĝa Signal-lanterno* estas granda venko de la revolucio de pekina opero, granda venko de la *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ, kaj granda venko de la proleta revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ. La venko de la revolucio de la pekina opero signas ke la pekina opero, tiu plej obstina fortikaĵo, estas konkerita, ke tiu klasika arto de pekina opero akiris novan vivforton, kaj ke tio malfermis senlime vastan vojon por krei arton de la pekina opero ŝatatan de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La scenejo de la pekina opero fariĝis pozicio por propagandi la penson de Maŭ Zedong kaj prikanti la heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La verko *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ estas trezoro de nia revolucia popolo, kaj la orientilo por disvolvi la revolucion literaturan kaj artan. Okaze de la 25-a datreveno de la publikigo de tiu brila verko, ni devas brave marŝi antaŭen pli alte tenante tiun grandan ruĝan standardon. Ni devas ĉiam sekvi Prezidanton Maŭ, por esti revoluciuloj, fari revolucion kaj ludi la modernan revolucion operon dum la tuta vivo. La brilo de la penso de Maŭ Zedong ĉiam lumigu la literaturajn kaj artajn rondojn, la tutan Ĉinion, la tutan mondon.

La Simfonio

“Ŝagiabang”

EN la sama tempo kiam la revolucio de pekina opero kaj baledo en nia lando akiris brilan sukceson, naskiĝis ankaŭ *Ŝagiabang*, simfonio apartenanta al la proletaro kaj la cetera laboranta popolo. Ĝi estas muzikverko **“kreita por kaj utiligata de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj”** kaj unu el la brilaj modeloj kreitaj de la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj, kiuj faras literaturan kaj artan revolucion, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj sekvante la direktivon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ **“utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio kaj forigi la oldajn por elŝovi la novajn”**.

Prezidanto Maŭ instruis al ni jam antaŭ longe: **“En la hodiaŭa mondo, ĉiu kulturo, ĉiu literaturo aŭ arto apartenas al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion.”** **“Literaturo kaj arto bone fariĝu konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, servu kiel potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon,**



En la revolucia simfonio Ŝagiabang, dek ok vunditoj de la Nova Kvara Armeo persistas sub la komando de la politika direktanto Guo Ganguang ĉe batalo en la fragmitejo ĝis la fina venko.

kaj helpu la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuanime.” Kiel unu el la formoj de arto, ankaŭ simfonio nepre devas servi al la politiko de la proletaro de nia lando kaj fariĝi potenca batalilo por unuigi la popolon kaj bati la malamikon.

Por Ĉinio simfonio estas artformo enportita de eksterlando. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **“utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio”**, tiu ĉi enportita formo de arto estas utila por studi kaj disvolvi la proletajn literaturon kaj arton de nia lando. Sed en la pasintaj 17 jaroj, la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj Goŭ Jang kaj aliaj

rifuzis praktiki la revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ kaj obstine persistis ĉe kontraŭrevolucia reviziisma linio de literaturo kaj arto, utiligante la de ili uzurpitan gvidantecon en la sfero de kulturo. Sub ilia komando, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la malnova Centra Muzika Ensemblo plenenergie kolportis varojn kapitalismajn kaj reviziismajn. Per ĉiuj siaj fortoj ili oponis la literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, oponis prikantadon pri ĉi tiuj kaj lasis imperiestrojn, reĝojn, generalojn kaj ministrojn, dandojn kaj belulinojn, fremdulojn kaj “mortintojn” plenokupi la scenejon. Ili degeneris ĝis tiu grado, ke ili eĉ provludigis reakciajn verkojn de Richard Strauss, ministro de muziko de la germana faŝista ĉefo Hitler! Ili adoris la eksterlandan burĝan simfonion kiel “sanktaĵon” kaj ĝin laŭdis kiel “arton de la tuta homaro”!


La celo de ĉi tiuj reakciaj reviziistoj estas vastigi la ideologian influon de la ekspluataj klasoj kaj fabriki publikan opinion por prepari burĝan restariĝon, ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris al ni jam antaŭ longe: **“Por renversi regpotencon**

estas ĉiam necese, unue, krei publikan opinion, fari laboron en la ideologia sfero. Tiel agas la revolucia klaso kiel ankaŭ la kontraŭrevolucia klaso.”

Kiam la proletaro jam transprenis la regpotencon kaj fondis socialisman ekonomian bazon, se en la superstrukturo, ĝi tamen lasus fremdulojn kaj mortintojn el feŭda kaj burĝa klasoj daŭre regi la arenon de literaturo kaj arto kaj lasus reviziisman pensfluron de literaturo kaj arto daŭre inundi, nia lando certe ŝanĝus sian koloron. Tio estas absolute netolerebla.

En 1964, la revolucio en la pekina opero finfine frakasis la belan sonĝon de la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj Ĝoŭ Jang kaj aliaj, kaj la ruĝa standardo de la literatura kaj arta linio de Maŭ Zedong servi al la proleta politiko alte ekflirtis super la scenejo de la pekina opero. En januaro de tiu sama jaro, kamaradino Ĝiang King venis en la Centran Muzikan Ensemblon kunportante la prizorgon de Prezidanto Maŭ kaj alte tenante la torĉon de la penso de Maŭ Zedong. Ŝi ekbruligis la revolucion incendion de la arto simfonio kaj elmetis la batalan alvokon,

En la revolucia simfonio Ŝagiabang, bofratino Aking (meze) sintenas aplombe antaŭ la malamikoj kaj sagace ŝirmas la vunditajn kaj malsanajn anojn de la Nova Kvara Armeo.



ke oni “kreu simfonian muzikon de la proletaro, simfonian muzikon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj”. Ŝi faris esploradon kaj proponis transformi revolucion modernan pekinan operon *Ŝagiabang* en simfonion. La muzikaj batalantoj de la Centra Muzika Ensemblo leviĝis por revolucii. Ili lanĉis atakon kontraŭ la obstina citadelo de la burĝaj literaturo kaj arto, kaj komencis la kreadon de la simfonio *Ŝagiabang*.

La reakciuloj ja ne povas forlasi la historian scenejon memvole. La kontraŭrevolucia reviziisto Ĝoŭ Jang kaj similaj same ne volontis lasi sukcesi la revolucion de simfonio. Ili klopodis ĝin ataki kaj subfosi per ĉiaj rimedoj. Ili kreis malfacilojn en asignado de kantistoj kaj kopiado de muziknotoj; ili timigis la kantistojn dirante, ke “la pekinoperaj kantoj difektos la voĉon”; ili intencis fari la simfonion *Ŝagiabang* “pure muzika verko” burĝa kaj oponis apliki en ĝi deklamadon kaj klarigadon kaj uzadon de naciaj muzikiloj. Krome, ili intence aranĝis muzikajn prezentadojn por redukti la fortojn necesajn por la kreado kaj provludado de tiu simfonio. Sed sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, finfine la revolucia simfonio

elhakis sian vojon el la malnova citadelo tra vico post vico da baroj kaj sonigis grandiozan himnon al la revolucio de la ĉina popolo.

La simfonio *Ŝagiabang* estas verkita laŭ la rakonto de la samtitola nuntempa pekina opero, pri kiu legu la jenan lakonan skizon:

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, en la regiono ambaŭborde de Jangzi-rivero, kiun Kuo-mintango cedis senreziste al la japanaj agresantoj, la Komunista Partio de Ĉinio sin apogis sur la popolamasoj, mobilizis ilin, disvolvis kaj plifortigis la popolan armitan forton Nova Kvara Armeo, kaj vaste disvolvis aktivadojn por bati kaj ekstermi la malamikon en ĝia postfronto. Foje, okaze de translokiĝo, la armeo restigis 18 vunditajn kaj malsanajn armeanojn en la urbeto *Ŝagiabang* sude de Jangzi-rivero, por ke ili resaniĝu en domoj de la popolamasoj sub la prizorgo de la subtera partia laborantino bofratino Aking.

Tiutempe, bando da armitaj banditoj alvenis al la urbeto, en koluzio kun la japanaj agresantoj kaj Ĉiang Kajŝek, por eltrovi kaj kapti la vundi-

En la revolucia simfonio Ŝagiabang, revolucia avino Ŝa timas nek tiranecon nek sinoferon kaj indigne riproĉas la nacioperfidulojn ignorante iliajn minacon kaj logon.



tojn kaj malsanulojn. Sed la popolamasoj, kiuj sincere subtenas la revolucion, estas vera bronza muro. Sub la gvido de la Partio kaj sinapogante sur tiu bronza muro, bofratino Aking sukcese ŝirmis la vunditojn kaj malsanulojn, dank' al kio la lastaj resaniĝis, kaj plene ekstermis la banditaron, kunagante kun la ĉefaj fortoj de la armeo. (Vidu la parton de *La Fajreroj en Fragmitejoj*, la embria verko el kiu elvolviĝis la pekin-opera dramo *Ŝagiabang* publikigitan en nia gazeto n-ro 1 de la jaro 1965.)

Tiu ĉi rakonto bone eksplikas la penson de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj. Ĝi montras al ni, ke nur armita revolucio povas kontraŭbatali kaj frakasi armitan kontraŭrevolucion, bati kaj frakasi militan agreson de imperiismo. Ĝi pruvas al ni la veron en la vortoj de Prezidanto Maŭ: **“La plej profunda kaj abunda fonto de grandaj militaj fortoj troviĝas en la popolamasoj.”** **“Revolucia milito estas popolamasa milito, kiun oni povas fari nur per mobilizado de la amasoj kaj dank' al la subteno de la amasoj.”** La simfonio *Ŝagiabang* prikantas ĝuste la popolan militon kaj la heroojn de la proleta revolucio.

La simfonio *Ŝagiabang* komenciĝas per preludo, kiu prenas la *Himnon de la Nova Kvara Armeo* kiel sian bazan melodion. Majesta, potenca kaj rapidritma, kvazaŭ miloj kaj miloj da batalantoj sturmas kaj da ĉevaloj galopas, ĝi prezentas la heroan militradon de la Nova Kvara Armeo en la sudo kaj nordo de Jangzi-rivero dum la rezistmilito kontraŭ la japanaj agresantoj. Post la preludo la klariganto sciigas al la aŭskultantoj la enhavon de la simfonio. Kaj dum la irado de la simfonio intermetiĝas ĥoraj, soloj kaj akompanaj kantoj. Kvin ĉefaj geaktoroj prezentas per kantoj respektive la ĉefajn okazaĵojn de la scenoj “Matenruĝo”, “Saĝo kontraŭ Ruzo”, “Persistado”, “Kondamno al la Malamikoj” kaj “Fulma Atako”. Kaj tion sekvas la finalo. Tiu muzikverko perfekte prezentas la subjekton de brava kaj grandioza revolucia batalo kontraŭ la malamikoj fare de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj revoluciaj trupoj kaj popolamasoj.

Tiu simfonio sukcese modlis revoluciajn figurojn, kiaj politika direktanto Guo, bofratino Aking, avino Ŝa k. a., armitaj per la penso de Maŭ Zedong, priskribas la bravan kaj sencedan batalon de la popolamasoj kaj prikantas iliajn grandiozajn faŭrojn kaj meritojn. Per la priskribo pri la politika direktanto la verko profunde montras la noblan penson de niaj komandantoj kaj batalantoj, kiuj tenante la patrolandon en sia penso, tutkore kaj plenanime batalas por la intereso de la popolo, kaj ilian spiriton de revolucia heroismo **“subiĝi**

ĉiujn malamikojn sed neniam esti subigita de la malamiko”. La justoplenaj vortoj kaj muziko de la kantoj de avino Ŝa prezentas la sentiman revolucion spiriton de la maljunulino, kiu pretas oferi sian vivon volonte por la intereso de la revolucio kaj alte staras antaŭ la malamikoj kiel montego. Kontraŭ ŝi, eĉ la plej ruza malamiko kaj plej kruela ekzekutisto povas fari nenion! La altpiĉaj, aplombaj, optimismaj kaj fidplenaj kantoj de bofratino Aking plene montras ŝiajn kuraĝon kaj sagacon, per kiuj ŝi frakasas en danĝeriga cirkonstanco la intrigon kaj persekutadon fare de la malamiko, kaj la muzika priskribo pri ŝi elstarigas ŝian senkompare noblan revolucion stilon.

Kaj la muziko, kiu prezentas la malamikojn, montras ilian stultecon, kruelecon, ruzecon kaj malicegon kaj ilian fatalon de neevitebla pereco.

Per la diritaj priskriboj, la simfonio tre klare manifestas la brilan penson **“por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon”**.

Ankaŭ en la arta formo, tiu simfonio rompis la rutinojn de la okcidenta simfonio kaj alprenis diversajn muzikaĵojn kaj kantojn por bone esprimi la pensojn, sentojn, vivon kaj batalojn de la proleta revolucia popolo kaj la revolucion politikan enhavon.

Tiu ĉi simfonio karakteriziĝas ne nur per trajtoj de la epoko de la proleta revolucio, sed ankaŭ per brilaj koloroj de nacia muziko. Ĝia muzika lingvo estas kreita surbaze de la tradicia muziko de la ĉina pekina opero kun reformoj kaj novaj kreo kaj kunfandis en si diversajn tradiciajn melodiojn de la pekina opero. En la orkestro estas aldonitaj ankaŭ karakterizaj muzikiloj de la pekina opero, kiaj la kordinstrumentoj ĝinhu-o, erhu-o, jueĉin-o kaj trikordo kaj diversaj perkut-instrumentoj, tiel ke la tuta muzikverko havas kaj la imponecon de simfonio kaj distingigajn trajtojn de la pekin-opera muziko. Ĉio ĉi tio multe fortigis la esprimopovon de la simfonio kaj faris ĝin facile komprenebla por kaj plaĉa al la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ĝi estas granda sukceso de la principo **“utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio”** en la sfero de muzika revolucio.

Ŝagiabang estas, oni povas tiel diri, la unua simfonio kiu ricevis ŝaton kaj laŭdon de ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ĉar ĝi servas al ili kaj al la proleta politiko, kaj prezentas ilian revolucion batalon. Ĝi estas muziko popularigata al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj samtempe altigita de la bazo de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, alivorte, ĝi plene plenumis la literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ.



Novzelanda amiko Rewi Alley parolas dum la inaŭgurado de la diskutkunveno okaze de la 25-a datreveno de la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.

Solena Internacia Kunsido por Lerni la “Paroladojn” de Prezidanto Maŭ

EN la tempo kiam la mondiskua granda proleta kultura revolucio de Ĉinio akiris grandan venkon kaj en la alta tajdo en kiu la proleta revoluciularo kaj revoluciaj amasoj tra la tuta Ĉinio varme celebris la 25-an datrevenon de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj solene malfermis en Pekino je la 31-a de majo kunsidon por celebri la 25-an datrevenon de la publikigo de la *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ, kiun partoprenis pli ol 80 verkistoj kaj amikoj venintaj de 34 landoj kaj regionoj el 6 kontinentoj.

La okazigo de tiu internacia kunsido speciale por studi kaj diskuti la verkon de Prezidanto Maŭ konkrete manifestis ke la mondo estas eniranta en tute novan epokon kun la penso de Maŭ Zedong kiel granda standardo kaj ke la senlime brila penso de Maŭ Zedong kaj la revoluciaj linioj kaj teorioj en literaturo kaj arto de Prezidanto Maŭ estas fariĝantaj potencaj ideologiaj armiloj por la mondaj revoluciaj popoloj kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj kaj batala direkto de la movado de la revoluciaj kaj progresintaj verkistoj de Azio kaj Afriko.

La kunsido estis plena de arda pasio de senlima amo de la mondaj revoluciaj popoloj al Prezidanto Maŭ kaj saturita de atmosfero de revolucio, unuiĝo kaj batalo. Portante en la mano la ruĝan revolucionan trezoran libron de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, la diverslandaj verkistoj kaj amikoj ĝojplene eniris la kunsidojn. Sur la fona kurteno post la podio alte pendis grandformata portreto de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la mondaj revoluciaj popoloj. Ili suprenrigardis al ĝi kun senlimaj adoro kaj estimo kaj emocie voĉlegis la cititajn vortojn de Prezidanto Maŭ sur la muroj interne de la kunsido skribitajn per la lingvoj ĉina, araba, angla kaj franca. Dum la irado de la kunsido, la diverslandaj verkistoj kaj amikoj fervore kriis: “Senliman vivon al Prezidanto Maŭ!” “Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!” “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu! Vivu longe!”

Vespere je duono post la oka, okazis la malferma soleno de la kunsido. Kun senlimaj adoro kaj estimo al Prezidanto Maŭ kaj tenante en la mano la brile ruĝan libreton *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*, la diverslandaj amikoj ĥore voĉlegis el ĝi per malsamaj lingvoj: “La popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popoloj de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, ne timu malfacilojn kaj marŝu antaŭen unuj sekvante aliajn. Do la mondo nepre apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj

estos senescepte ekstermitaj.” “... ke literaturo kaj arto bone fariĝu konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, servu kiel potenca batalilo por unuiĝi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpu la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuanime.”

Guo Moĵuo, ĉefo de la ĉina verkista delegacio, prezidis la solenon laŭ invito. En sia parolado li montris ke jen estas la senprecedence unuafoja en la homa historio por la internacia kunveno en kiu tiom multe da diverslandaj amikoj ĝoje kunsidas por speciale studi kaj diskuti la penson de Maŭ Zedong. Li diris ankaŭ, ke la sukceso de tiu ĉi kunsido nepre ludos rolon de bona ekzemplo por la azi-afrikaj popoloj kaj la mondaj revoluciaj popoloj en ilia studo kaj apliko de la penso de Maŭ Zedong kaj nepre donos signifoplenan influon al la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj tra la tuta mondo kiuj per la penso de Maŭ Zedong kiel sia armilo batalas por pliaŭse firmigi la solidarecon kaj oponi imperiismon, reviziismon kaj diverslandajn reakciulojn.

La ĝenerala sekretario de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj R. D. Senanayake faris la inaŭguran paroladon. Li diris, ke la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj* havas ekstreme grandan internacian signifon, donis ĝustan politikan gvidon al ĉiuj revoluciaj kaj progresintaj literaturaj kaj artaj laborantoj kaj estas vojlumiga lampo por la movado de la azi-afrikaj verkistoj kaj ĉiuj revoluciaj kaj progresintaj literaturaj kaj artaj laborantoj en la mondo.

Li diris krome, ke la celo de tiu ĉi kunsido estas studi kiel ni povas kunligi la du frontojn, kulturen kaj militan, en la batalo de la subpremataj diverslandaj popoloj por liberiĝo, pli bone sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ.

Li rimarkigis, ke la principaj malakordoj ekzistas inter la revoluciaj kaj progresintaj verkistoj de diversaj landoj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo ĉe unu flanko kaj la sovetuniaj modernaj reviziistoj ĉe la alia en la problemoj de literaturo kaj arto, t. e. ĉu voli aŭ ne revolucii kaj ĉu kontraŭbatali aŭ ne imperiismon. Li diris: Mi esperas ke dum la procezo de studo kaj diskuto pri la *Paroladoj*, la partoprenantoj de tiu ĉi kunsido faros kontribuojn por disvolvi revoluciajn literaturon kaj arton sekvante la revolucionan linion elmetitan de Prezidanto Maŭ.

Djowoto, ĝenerala sekretario de la Azi-Afrika Ĵurnalista Asocio montris en sia parolado ke la granda verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj* estas potenca ideologia armilo por la ĉina popolo por venki la malamikojn en- kaj eksterlandajn kaj

ankaŭ por la diverslandaj popoloj tra la tuta mondo en ilia batalo por nacia kaj socia liberiĝo, demokratio kaj paco, kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj, faŝismo kaj reviziismo.

En sia parolado la fama usona verkistino Anna Louise Strong faris retrorigardon pri la okazoj, en kiuj Prezidanto Maŭ akceptis ŝin en Jan-an en 1946 kaj en printempo de 1947 kaj pri la grandaj eduko kaj kuraĝigo ĉerpitaj de ŝi el la paroloj de Prezidanto Maŭ. Ŝi diris: Prezidanto Maŭ saĝe montris ke imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj kaj vere potenca forto apartenas al la popolo, tial ni verkistoj nepre devas apogi nin sur la popolo. Ŝi aldonis: Prezidanto Maŭ instruis nin ke imperiismo montras sin malforta kiam altiĝos la konscio de la popolo, tial, veki la konscion de la popolo per la instruoj de Prezidanto Maŭ — jen la tasko de ni verkistoj.

Sudana verkisto Osman Hassan Ahmed ankaŭ varme aprobis la kunsidon. Li diris, ke la okazo de tiu ĉi kunsido sub la gvido de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong estas signifoplena evento en la historio de la monda revolucia literatura kaj arta movado kaj ĝi estos enskribita per orbrilaj vortoj en la historiojn de la verkista movado de Azio kaj Afriko kaj de la literatura kaj arta movado de la mondo. Li diris, ke ĝi naskos profundan influon al la revolucia literatura kaj arta movado en estonteco.

Parolis en la kunsido unu post la alia ankaŭ G. Fidelia el Haitio, Rewi Alley el Novzelando,


Hassan Petrela el Albanio, Robert Williams el Usono kaj Jang Kuangman, reprezentanto de la proleta revoluciularo el la Unio de Ĉinaj Verkistoj.


La inaŭguron ĉeestis la reprezentantoj el la membroj de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikan Verkistoj Cejlono, Ĉinio, Indonezio, Japanio kaj Sudano.

La aliaj verkistoj kaj amikoj partoprenantaj la solenon estas venintaj el Birmo, Irano, Malajo, Norda Kalimantano, Palestino, Filipinoj, Tajlando, Jemeno, Azanio (Suda Afriko), Botswana, Eritrea, Gvineo, Kongolando (B), Kongolando (K), Nigero, Somalio, Tanzanio, Sudokcidenta Afriko, Brazilo, Ĉilio, Kolombio, Haitio, Albanio, Usono, Belgio, Anglio, Francio, Novzelando, Hispanio kaj aliaj landoj kaj regionoj.

En la fino de la inaŭguro, la ĝenerala sekretario de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikan Verkistoj R. D. Senanayake pasioplene kriis kun alte levita brako gvidante ĉiujn ĉeestantojn: “Vivu la brila Paroladoj de Prezidanto Maŭ!” “Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!” “Vivu la grandioza granda proleta kultura revolucio!” “Vivu la granda ĉina revolucia popolo!” “Vivu la unuiĝo de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj de la tuta mondo!” “For imperiismon! For reviziismon!” Tiuj sonoraj sloganoj refoje esprimis la firman volon kaj decidon de la mondaj revoluciaj popoloj kaj revoluciaj progresintaj verkistoj unuiĝi kaj batali sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong.

Verkistoj el Norda Kalimantano, Jemeno kaj Somalio entuziasme interparolas dum ripozo kun membroj de la Ĉina Delegacio pri sia rikolto post studo de la verko de Prezidanto Maŭ Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.





La Penso de Maŭ Zedong Lumigas la Tutan Mondon



1. Leginte la verkon de Prezidanto Maŭ "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an", albanaj literaturaj kaj artaj laborantoj iras en kamparon kaj fabrikojn por servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.



2. Iu komandanto de la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio diras kun emocio: "La verkoj de Prezidanto Maŭ donas ekstreme grandan helpon al nia vjetnama batalo kontraŭ Usono!"




3. Inter la postlasitaj objektoj de iu glora martiro de Laoso, oni trovis portreton de Prezidanto Maŭ algluitan en ties notlibro, kaj la dorsa paĝo portas lian jenan surskribon: "Prezidanto Maŭ, ni amas Vin!"



4. En nia ekspozicio okazigita en Japanio, multaj japanaj amikoj emocie skribas sur unu ruĝa flago: "Vivu Maŭ Zedong! Vivu la Ĉina Popola Respubliko!"



5. Batalantoj de la patriotaj armitaj fortoj de Kongo (L.) rigardas la verkojn de Prezidanto Maŭ kiel trezoron. Ili diras: "Ĉiu frazo el la verkoj de kamarado Maŭ Zedong estas skribita por ni."



6. Aplikante la penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito, batalantoj de Gvineo Portugala starigis en la kamparo vastajn revoluciajn bazlokojn, disvolvis gerilan militon kaj akiris grandan venkon.



7. Dum la enkarcerigo, iu revolucia junulo de Venezuelo sekrete kunportis verkojn de Prezidanto Maŭ en la malliberejon kaj organizis ĉiujn ilin lerni kaj diskuti.



8. Kunportante verkojn de Prezidanto Maŭ sur montoj, studentoj de Peruo profundigas en la Andes-montaron por organizi kamparanajn asociojn kaj fari terdeprenan batalon kaj lukti kontraŭ la reakcia regado.



9. La "Deklaro por Subteni la Justan Batalon de la Nigraj Popolanoj de Usono kontraŭ Rasa Diskriminacio de la Usona Imperiismo" farita de Prezidanto Maŭ ekstreme multe kuraĝigas la nigrajn popolojn de Usono en ilia batalado kontraŭ la rasa diskriminacio per revoluciaj perfortoj.



10. Antaŭ unu aŭ du jaroj, nia kanto-danca ensemblo vizitis Sovetunion. Dum la prezentado, ĉiŭfoje kiam aperis sur la scenejo la portreto de Prezidanto Maŭ, la rigardantoj tuj varme jubilis kun emocio: "Vivu Maŭ Zedong!"



Kun senlima amo kaj respekto al la granda gvidanto de la revoluciaj popoloj de la mondo Prezidanto Maŭ, Kheir, verkisto el Sudano, entuziasme deklamas sian versajon pri kantantan Prezidanton Maŭ kaj la penson de Maŭ Zedong.

Varma Jubilo de la Revoluciaj Popoloj de la Mondo pro la Granda Venko de la Penso de Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto

LA revoluciaj popoloj de la mondo varme jubilis pro la 25-a datreveno de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, pro la granda venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

Dhimiter Shuteriki, la prezidanto de la Asocio de Verkistoj kaj Artistoj de Albanio, entuziasme laŭdis, ke la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ faris netakseblan kontribuon al la marksism-leninisma beletristiko kaj la disvolviĝo de la literaturo kaj arto de la proletaro.

Shuteriki diris, ke la *Paroladoj* de kamarado Maŭ Zedong — la granda gvidanto de la ĉina popolo — publikigita antaŭ 25 jaroj estas granda programo kaj granda bazŝtono por konstrui ĉinajn literaturon kaj arton, kiuj prenas la komunisman ideologion kiel sian animon.

Shuteriki montris, ke ni devas konduki grandan batalon kontraŭ ĉiu ajn influo de la burĝaro kaj re-

viziismo sur niaj literaturo kaj arto. Nemale multe da verkistoj kaj artistoj en Sovetunio kaj kelkaj orient-eŭropaj landoj kaj iliaj sekvantoj tra la mondo perfidis marksism-leninismmon. Tiu sensacia perfido ofte tre ruze sin kamuflas. Tio postulas, ke la marksism-leninismaj literaturaj kaj artaj laborantoj de Ĉinio, Albanio kaj aliaj landoj posedu altgradan singardemon. La granda doktrino de kamarado Maŭ Zedong havas apartan aktualan signifon en tiu rilato. Lia doktrino prilumas nian batalan vojon kaj alvokas nin unuigi niajn vicojn, pretigi municion kaj sturmi la ruzajn malamikojn.

Daja Prija Samaranajake, redaktoro de la cejlona gazeto *Spirito*, lasttempe diris al raportisto de la Hinhua-a Novaĵ-agentejo ke la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ estas “ruĝa suno de la nuntempaj proletaj revoluciaj literaturo kaj arto”, kaj “brila direkto por la revoluciaj artistoj, precipe por la revoluciaj artistoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.”

Japanaj amikoj tenas en siaj manoj la brile ruĝan libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong kaj serioze voĉlegas.



Mohamed Ali, vicĉefsekretario de la Tanzania Verkista Asocio, diris, ke la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ “estas brila vojmontra lampo, kiu prilumas la vojon por la triumfa plenumo de la granda proleta kultura revolucio nun progresanta en Ĉinio”, kaj samtempe “direktas ankaŭ la batalojn de multaj sendependaj landoj de Afriko kontraŭ la kulturo importita de imperiismo”.

Li diris: “Laŭ la spirito de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, la ĉina popolo estas brave marŝanta antaŭen kaj akiris unu venkon post alia en sia batalado kontraŭ la putra malnova kulturo.”

Li diris plie: “Ni havas plenan devon prilauldi la *Paroladojn ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de la granda revolucia gvidanto Maŭ Zedong.”

La vjetnama verkisto To Hoai diris en sia skriba parolado, ke la *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ “helpis min starigi mondkoncepton en mia verkado”. Li revokis al memoro, ke en la malfacila medio dum la longdaŭra rezistmilito antaŭ 20 jaroj, li ricevis mimeografitan ekzempleron de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ Zedong en vjetnam-lingva traduko. De tiam la *Paroladoj* de Prezidanto Maŭ ĉiam kuŝas en lia malgranda dorssako, kiu akompanis lin traŭ diversajn batalejojn.

To Hoai daŭre diris: “Profundiĝi inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj lerni de ili — jen estas orientilo, kiu solvis serion da ofte de mi pripensitaj problemoj, t. e., por kio skribi kaj por kio skribi”. Li diris, ke la orientilo helpis lin trovi la direkton por antaŭenmarŝi.



Verkistoj kaj amikoj el la ses kontinentoj de la mondo kune voĉlegas en malsamaj lingvoj Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong kun revolucia pasio.

Fremdlandaj Amikoj

Laŭdas Modelajn Revoluciajn

Teatraĵojn de Ĉinio

ĈIUJ fremdlandaj amikoj, kiuj spektis modelajn revoluciajn teatraĵojn de Ĉinio, varme jubilis sinsekve per paroloj aŭ artikoloj, pro la brila venko de la penso de Maŭ Zedong, kaj pro la okupo de teatra scenejo fare de la proletoj revoluciaj heroj.

Mogogo J. Marie de Kongolando (B) diris:

La modela pekina opero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* kaj la revolucia moderna baleto *Ruĝa Virina Taĉmento* de Ĉinio radias novan brilon en la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. Ili montras fortan politikan enhavon kaj posedas perfektan artan formon. Tio pruvas, ke la granda proleta kultura revolucio jam akiris elstaran sukceson en la kampo de teatra arto. Precipe la sukcesa prezentado de la pekina opero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* montras la rimarkindan atingon en la reformo de la antikva tradicia opero.

Baboci de Albanio diris:

La baleto *Ruĝa Virina Taĉmento* saturiĝis de revolucia enhavo, kaj ĝia prezentado akiris tre grandan sukceson. Ĉinio akiris grandan atingon en prezentado de revoluciaj temoj per baleto. Bonvolu permesi min transdoni al la ĉinaj popolo kaj artistoj la profundan senton kaj sinceran amikecon de la albanaj popolo kaj artistoj, kiujn mi portis de la malproksima Albanio.

Viriato da Cruz de Angolo diris:

Ruĝa Virina Taĉmento kaj *Blankhara Knabino* estas du ekzemploj de nova direkto de disvolvigo de la danc-arto sub la movado de la kultura revolucio.

La baleto prezentas la artan spiriton de Ĉinio, ĉar ĝi estas arta formo kiun Ĉinio ne posedis en la

pasinteco, sed ĝia okcidenta formo, trairinte ŝanĝigon, posedas trajtojn por montri la nove emergantan ĉinan popolon. La prezentado de la baleto *Ruĝa Virina Taĉmento* akiris tre grandan sukceson. Mi vidis la fizionomion de la granda kultura revolucio de Ĉinio, kaj la revoluciaj bataloj de Ĉinio estas vivece montritaj en tre alta nivelo per la formo de baleto.

Jasushi Nishikawa de Japanio diris:

En la pekina opero *Surprizatako kontraŭ la Blanktigra Regimento* oni uzis kaj disvolvis la tradician formon por servi al la nova enhavo. Tio estas tre malsimpla, kaj ties efektivigo estas granda afero. La pekina opero de Ĉinio prezentas vastan perspektivon.

Nicolas Curiel de Venezuelo diris:

La Ruĝa Signal-lanterno estas bona opero, spegulanta la nuntempan enhavon per la antikva tradicia formo de Ĉinio. Vi esprimis la senton de la popolo kaj faris servon al la popolo. Vi donis al la popolo ne nur belan artan ĝuon, sed ankaŭ tre bonan edukon.

Dorise Nielson de Kanado diris:

Estas necese reformi la pekinan operon, ĉar ĝi ne konformiĝas al la bezono de la socialisma socio. Fakte, *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* jam akiris sukceson, ĝi enkorpiĝis novan enhavon, kaj estas vera arto por la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.


Nur sub la sagaca gvido de Prezidanto Maŭ, la Popola Liberiga Armeo povas plene disvolvi siajn saĝon kaj kuraĝon.

Arta Festivalo de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj en Ŝanhajo



Propaganda grupo de la penso de Maŭ Zedong de la trafika sistemo de Ŝanhajo, kiu partoprenas la Artan Festivalon de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj de Ŝanhajo, kunsidas por paroli pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ.





La Laborista, Kampana kaj Soldata Propaganda Grupo de Ŝanhajo faras prezentadon ĉe riverbordo fine de Nankina Strato.

LAŬ la instruo donita de Prezidanto Maŭ en *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj heredante kaj disvolvante la gloran kaj batalan tradicion de la propagandaj grupoj kaj ensembloj de la malnova Ruĝa Armeo, la vastaj amasoj de laboristoj, kampanoj kaj soldatoj kaj la junaj ruĝaj gvardianoj en Ŝanhajo, organizis pli ol 360 "propagandajn grupojn de la penso de Maŭ Zedong" — organizoj de artaj kaj literaturaj husaroj, — kiuj faris prezentadon en fabrikoj, sur stratoj, ĉe kampoj kaj sur insuloj por la laboristaj, kampanaj kaj soldataj amasoj, en la daŭro de pli ol duonmonato ekde la 21-a de aprilo ĉijare.

En batala maniero kaj alte tenante la ĉiamvenkan grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj la standardon de amasa kritiko pri la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon la grupoj igis la revoluciajn literaturon kaj arton vere servi al la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj, al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj al la granda proleta kultura revolucio. Tio estas la plej granda karaktero de ĉiuj festivaloj.

En la Unua Ŝtata Ŝpinteksejo de Ŝanhajo, la prezentadoj de *Senmaskigo* kaj *Ne Forgesu la Klasan Suferon*, faritaj de tia grupo por tieaj laboristoj, de-

ŝiris de la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon la maskon de "veterana revoluciulo", kaj forte refutis lian absurdan eldiron ke "pravas ekspluatado". Tuj iuj maljunaj laboristoj iris sur la scenon kaj rakontis, el siaj propraj travivaĵoj, la historion de subpremado kaj ekspluatado fare de la reakcia klaso al la laboranta popolo en la malnova socio, plenan de sango kaj larmoj. Ĉiuj programeroj prezentitaj havas fortan batalspiriton.

La fakto, ke la laboristaj, kampanaj kaj soldataj amasoj suriris la scenejon de arto en la ŝtormo de klasbatalo, montras, ke ili estas kreantoj de la novaj socialismaj kulturo kaj arto. Elirante el la intereso de la revolucio kaj el la bezonoj de politikaj bataloj, ili kuraĝe rompis la malnovajn regulojn starigitajn de la burĝaj akademias "aŭtoritatuloj" kaj kreis multajn novaĵojn en la arto de kreado kaj prezentado. La burĝaj akademias "aŭtoritatuloj" ĉiam kriadis ke "la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj ne komprenas arton", distrumpetis la teorion de "arto de artikado kiel la unua neceso" kaj la teorion de "unuigo de sceneja efekto kaj prezenta arto" ktp. Tiu ĉi festivalo donis decideme fortan rebaton al tiuj absurdaĵoj per feraj faktoj. Multaj el la prezentitaj programeroj estas vera spegulado de la arda klasbataloj, kiujn la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj kaj la junaj ruĝaj gvardianoj mem partoprenis,

kaj estas profunda esprimo de ilia senlima kredo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ekzemple, iliaj nove kreitaj prezentformoj, la “amasdeklamado” kaj “rapidritma kantrakonto kun akompano de gongo kaj tamburo” havas fortajn ritmojn kun sonora akompano kaj estas tre esprimivaj, povantaj en prezentado, plene malkovris la reakcian esencon de la enpartia potencitenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon. Ili kreis kantojn, dancojn kaj kantrakontojn kaj ankaŭ utiligis popolajn ariojn por figure enplekti la ideojn de Prezidanto Maŭ, entenatajn en liaj verkoj *Servu al la Popolo*, *Memore al Norman Bethune* kaj *Monttranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* kaj multaj el liaj vortoj, kaj la kreivan studon kaj kreivan aplikon de tiuj ideoj en riĉkolorajn prezentaĵojn, tiel ke la prezentado estas kvazaŭ donado de lecionoj pri liaj instruoj agrable sorbataj de la spektantoj.

Alia trajto de tiu ĉi festivalo estas, ke tiuj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong iris profunde inter la amasojn, kaj aktivadis sur la plej antaŭaj frontoj de bataloj, malfermis vastan mondon por servi la literaturon kaj arton al laboristoj, kamparanoj kaj sol-

datoj, kaj akiris riĉan sperton en la propagando de la penso de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ instruas al ni : “Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por ili kaj utiligataj de ili.” Precipe ĝojinda estas tio, ke tiu ĉi festivalo sukcese starigis la standardon de la literatura kaj arta taĉmento, kiu povas plej bone servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En la pasinteco, sub la influo de la reviziisma politiko de “teatra arto” praktikata de Ĝoŭ Jang kaj similaj, ĉiuj festivaloj de literaturo kaj arto, okazigitaj en Ŝanhajo, limiĝis en la sfero de grandaj teatroj, kaj dediĉis sin al “grandtipaj, fremdaj kaj klasikaj” teatraĵoj, kiuj sin apartigis de la aktualeco kaj de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong pri literaturo kaj arto tiu ĉi festivalo reĝustigis la inversigitan historion. Kie estas amaso, tie estas “scenejo” por prezentado. La amasoj varme laŭdis: “Denove venis al ni la propaganda grupo de la malnova Ruĝa Armeo!”

Propaganda grupo de la penso de Maŭ Zedong de la Arta Festivalo de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj de Ŝanhajo faras vizitan prezentadon por la Liberiga Armeo.





Revoluciaj gejunuloj de Ŝanhajo kune prezentas la revolucion danc teatraĵon Vivu la Heroaj Ruĝaj Gvardianoj.

Granda Festivalo de Revoluciaj Modernaj Teatraĵoj en Ŝanhajo

POR solene celebri la 25-an datrevenon de la publikigo de la *Paroladoj* la proletaj revoluciuloj de la literatura kaj arta rondo en Ŝanhajo okazigis grandan festivalon de revoluciaj modernaj teatraĵoj. Krom la modelaj pekinaj operoj *La Ruĝa Signal-lanterno* kaj *Ŝagiabang* kaj la revolucia simfonio *Ŝagiabang* estis prezentitaj ankaŭ la nove kreitaj revoluciaj modernaj literaturaj kaj artaj produktoj ekz. la grandaj dancoperoj *Januara Ŝtormo* kaj *Vivu la Heroa Ruĝa Gvardio*, la dancopero *Hongdengĝaŭ* (Brilo de la Ruĝaj Lanternoj), la dramo *Farmpaga Kolektejo*, la dancaro *La Longa Marŝo Neniĉo Timigas la Ruĝan Armeon*, la kantrakontado akompanata de bivo kaj

trikordmuzikilo por speciala seanso *Vivu la Granda Proleta Kultura Revolucio*, la pupa teatraĵo *Malgranda Brava Aglo de Neĝmonto* kaj la akrobata kantodancado *Vivu la Granda Proleta Kultura Revolucio*.

Tiuj ĉi teatraĵoj, kantodancoj, kantorakontoj, akrobataĵoj entuziasme prikantas la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, prikantas la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kaj montras la grandegajn meritplenajn heroojn de la vastaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la kreado de historio kaj la ĉiam brilan kontribuon, kiun ili faris al la granda proleta kultura revolucio. La prezentado estis varme bonvenigita de la vasta revolucia amaso.

Granda Dancopero “Printempa Tondro en la Sudokcidento”


EN la urbo Gujjang estis prezentita la granda dancopero *Printempa Tondro en la Sudokcidento* kun la brila venko de la granda proleta kultura revolucio en Gujĝoŭ-provinco kiel sia temo.

Tiu ĉi dancopero estas dividita en jenaj kvin partoj: “Granda Venko de la Revolucia Linio de Prezidanto Maŭ”, “Rigora Provo”, “Ŝtormo en la Monta Urbo”, “Printempa Tondro en la Sudokcidento” kaj “La Nova Gujĝoŭ Antaŭenmarŝas”. Per riĉa, bunta

artformo ĝi prezentas la brilan batalan procezon de la granda proleta kultura revolucio en Gujĝoŭ-provinco, en plena entuziasmo prikantas la grandan venkon de la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ, profunde malkaŝas la kondamnindajn krimagojn de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon obstine persistanta ĉe la burĝa reakcia linio, kaj strikte kunagas kun la aktuala batalo. Dank’ al tio, tiu ĉi dancopero donis grandan kuraĝigon kaj edukon al la vasta spektantaro.

La proletaj revoluciuloj de Gujĝoŭ-provinco efektivigis la grandan revolucion unuigon, kaj la Revolucia Komitato de Gujĝoŭ-provinco estas fondita.





Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ili kanonas kontraŭ plenmanon da enpartiaj potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon.

Elstaraj Programeroj Prezentitaj en Harbino

KUN senlima amo al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj kun profunda klassento de senlima fideleco al la literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj, junaj ruĝgvardianoj kaj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj en la urbo Harbino okazigis imponajn paradon kaj literaturan kaj artan prezentadon puŝante al nova alttajo sian prezentagadon dum la ruĝa Majo, kiam estis celebrata la 25-a datreveno de la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*.

En la 21-a de majo ĉie tra la tuta urbo regis ĝoja atmosfero. Surŝultrigante grandan portreton de Prezidanto Maŭ, alte tenante diverskolorajn flagojn, svingante la ruĝajn libretojn *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, la literatura kaj arta armeo, kiu paradis alivestita, pasis tra la ĉefaj stratoj kantante kaj dancante.

La Stalin-parko apud Songhua-rivero estis la centro de prezentado en la tuta urbo. Sur la riverbordo kelkajn liojn longa staris forsto da flagoj, leviĝis ondoj da kantoj kaj svarmas maro da spektantoj. Pli ol cent propagandgrupoj pri la penso de Maŭ Zedong prezentis okulfrapajn programerojn kurtajn sed fortoplenajn kaj kun riĉenhava batalspirito. La modela revolucia pekina opero *La Ruĝa Signal-lanterno* kaj la revolucia simfonio *Ŝagiabang*, kiujn ili sukcesis provludi en tre mallonga tempo, ankaŭ estis prezentitaj por la vastaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Dum la prezentado miloj kaj miloj da spektantoj, levante siajn brakojn, hurais kune kun la ludantoj: "Vivu la venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ!", "Vivu Prezidanto Maŭ, vivu vivu longe!"

Revolucia Kantodanca Prezentado de Literatur-artaj Propagandgrupoj de Ginan

CELEBRANTE la 25-an datrevenon de la publikigo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj, revoluciaj laboristoj, literaturaj kaj artaj batalantoj de la Liberiga Armeo kaj junaj ruĝgvardianoj de Ginan formis en la 23-a de majo kelkdek literatur-artajn propagandgrupojn. Ili iris sur la stratojn kaj prezentis revoluciajn kantojn kaj dancojn farante multajn stratojn kaj publikajn ejojn pozicioj por propagandi la penson de Maŭ Zedong.

La proletaj revoluciuloj, kiuj partoprenis la prezentadon, priantis kun plej granda politika entuziasmo nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, la grandan venkon de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj la grandan venkon de la granda proleta kultura revolucio en la pasinta jaro. Samtempe kun profunda malamo al klasmalamiko kaj per literaturo kaj arto kiel armilo ili faris furiozan ekpafadon kontraŭ plenumo da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Kie ili prezentis, tie ĉeestis hommaro de spektantoj kaj regis atmosfero plena de vivo kaj ekscito.

Antaŭ la pordego de la provinca revolucia komitato la revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de la Avangarda Kanto-danca Ensemblo kaj la Drama Trupo de la Liberiga Armeo en Ginan prezentis por la vasta revolucia popolamaso la kantserion "Varma Hurao por la 25-a Datreveno de la Publikigo de la Verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*", la ĥoretojn "La Armeo kaj la Popolo Devenas de la Sama Familio", "Kiel Ili Similas al la Veteranaj Ruĝaj Armeanoj Tiamaj!", la tiangin-an alegran kantrakonton "Faligu la Ĥruŝčov de Ĉinio" k. c. Tiuj programeroj varme priantis la grandan venkon de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj esprimis la decidon de la revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj ĉiam kuraĝe antaŭenmarŝi laŭ la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.



人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĉefa Enhavo

Prezidanto Maŭ kaj Kamarado Lin Biao Rigardis *Sagacan Kapton de la Tigra Monto* kaj *La Havenon*
Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an
Letero Skribita al la Jan-ana Pekin-opera Teatro post Rigardo al *Premite al Liangŝan por Ribeli*
Donu Seriozan Atenton al la Diskutado pri la Filmo *La Vivo de Vu Hjun*
Letero pri la Problemo de Studo pri la Romano *Songo de Ruĝa Buduaro*
Du Instrukciaj Notoj pri Literaturo kaj Arto
Letero de Kamarado Lin Biao al la Konstanta Komitato de la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio
Resumo de la Kunsido pri la Literatura kaj Arta Laboro en la Armeo, Kunvokita de Kamaradino Giang King laŭ la Komisiono de Kamarado Lin Biao
Pri la Revolucio de la Pekina Opero
Malfermigis en Pekino la Foto-ekspozicio "Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro"
Aklamo pro la Eniro de la Tuta Mondo en la Novan Grandan Epokon de la Penso de Maŭ Zedong
Celebre al la 25-a Datreveno de la Publikigo de *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ
Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an de Prezidanto Maŭ Estas Programo por la Konstruo de Potenca Proleta Kultura Armeo
Aklamo pri la Sukcesa Prezentado de la Ok Modelaj Revoluciaj Teatraĵoj en Pekino
Herooj de la Proletaro Okupu la Scenejon de la Pekina Opero
Modlo de la Alta Figuro de Proleta Heroo La Simfonio *Sagiabang*
Solena Internacia Kunsido por Lerni la *Paroladojn* de Prezidanto Maŭ
Varma Jubilo de la Revoluciaj Popoloj de la Mondo pro la Granda Venko de la Penso de Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto
Sur la kovrilo — Sceno el la Moderna Revolucia Pekina Opero *La Ruĝa Signal-lanterno*
Sur la dorskovrilo — Postlabora Prezentado de Artaj Programeroj Fare de Revoluciaj Amasoj



Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la artaj batalantoj de la Pekin-opera Trupo de Gujĝou-provinco iras al la kamparo trans montoj por lerni kaj labori kune kun malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj fari prezentadojn por ili.

